

IE IL P'OPOLA CINIO

中國報通

11 1988





VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ

Ruĝaj Folioj en Ŝjangŝan-monto

Fotoj de raportistoj de EPC


Ŝjangŝan-monto, unu el la 16 famaj vidindejoj de Pekino, situas en la okcidenta parto de la urbo. Aŭtune sur la monto fariĝas ruĝaj la verdaj folioj de la kotinusoj (**Coktinus coggygria**), aceroj kaj persimonoj. Rigardate de malproksime la ondanta monto ruĝe vestita aspektas senlime elvokiva.



Ruĝaj foliaroj




Telferoj al la montosupro



Ĉe la pordo de Ŝjangŝan-parko

Survoje al la montosupro




En la sezono, kiam la folioj ruĝiĝas, viziti la monton estas bela ĝuo por la loĝantoj de Pekino. Tiam survoje navetas veturiloj kaj ĉie vidiĝas vizitantoj. Multaj maljunuloj kun siaj nepoj, junuloj kaj geamantoj promenas inter ruĝfoliaj arboj aŭ sidas dise sur herbejoj por ĝui la montan ĉarmecon.



Pli çarmas transe!



Pikniko



Pro memoro

ENHAVO

SUR LA KOVRILO:

La ĉina klasika danco "Koloraj Mod-
laĵoj en Dunhūang"

Foto de LIŬ SIGONG

VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ:

Ruĝaj folioj en Ŝjangŝan-monto
Fotoj de raportistoj de EPC

ĈINAJ ARTOJ:

Modernaj ksilografaĵoj de Ĉinio
Hongkongo

SUR LA DORSKOVRILO:

(FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ)

Balta marbordo ĉe Rostock, DR Ger-
manio

Foto de PETER HAUSER

La Blanka Monto ĉe Sunleviĝo
(proksime de la franca urbo Tournus)

Foto de T.LORENT

- 2 Dum la 73-a UK
- 10 "La neŭtrala lingva fundamento estu lingvo interhoma"
- 11 Kion ni faru por tiu ĉi nova jarcento?
- 12 Ponto de la Espero
- 14 SUR NIA LIBROBRETO: Simpozio pri esperantismo
- 21 POR KOMENCANTOJ: Tri antikvaj fabloj
- 16 ESP-NOVAĴOJ
- 18 Privataj entreprenoj en Ĉinio
- 58 VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (23): Nova aspekto de
antikva urbo Ĝiŭĝjang
- 22 En la hejmo de ginsengoj, zibeloj kaj makulaj cervoj
- 24 Azia ĉampionino de 10 000-metra ebenkuro
- 26 Ostogustigisto Ĝuo Ŭejhŭaj
- 28 ĈINA MEDICINO:
Sendrogaj terapioj de la ĉina medicino (I)
- 37 Redukti aĝon je dek jaroj
- 41 ĈINA LITERATURO: Naskiĝo de ci-o kaj hŭaĝjan-skolaj
ci-istoj
- 43 El laŭmelodiaj versaĵoj de Tang-dinastio
- 30 "La Sovaĝa Kampo", signifa provo de la ĉina opero
- 44 Ora ĉevalbreda insulo
- 46 Vojaĝo en Ĉinghaj-provinco
- 50 Lamao-ĉiĉerono
- 52 Trezorejo de surŝtonaj sutroj
- 54 Azio en maltrankvilo
- 65 ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Ĉinaj salolagoj
- 56 PLADOJ KAJ LEGENDOJ: Blanka nuboj ĉirkaŭita de
ruĝaj floroj kaj blanka jado kun verdaj pinoj
- 49 ĈINAJ MOROJ: Festo de Sunbonvenigo
- 67 KURANTAJ AFEROJ
- 9 Anonco
- 32 45 53 KORESPONDI DEZIRAS
- 32 Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

DUM LA 73-A UK

de HŬANG FENGĜU

La 73-a UK okazis en Roterdamo, mondfama havenurbo de Nederlando, de la 23-a ĝis la 30-a de julio 1988. 2 316 esperantistoj el 63 landoj ĝuis la solenan kongreson.

ELSTARA LABORO DE LKK

La Loka Kongresa Komitato konsistis el esperantaj aktivuloj de diversaj lokoj de Nederlando kun gracia sinjorino Ans J. Bakker-ten Hagu kiel sia estro. Dank' al ilia elstara preparlaboro, ĉiuj aktivadoj en la kongreso iris en bona ordo. Kiel diris d-ro Humphrey Tonkin, la prezidanto de UEA, en la fermo de la kongreso, "Tiu ĉi kongreso estas sentumulta kongreso, kaj ĉiuj homoj estas kontentaj pri ĉio, kion ili ricevis en la kongresejo."

Precipe menciindas, ke inter la dek LKK-anoj


estis sep virinoj, kiuj montris per sia saĝo kaj sindonemo, ke virinoj ludas gravan rolon neignoreblan en la monda Esperanto-movado. Mi, kiel virino, sentas grandan fieron pri ilia brila sukceso.

LA JUBILEA FESTO

Posttagmeze de la 26-a de julio, en la salono Zamenhof okazis la Jubilea Festo, kiu estis la plej solena kaj plej grava de la kongreso. Tio estis rimarkinde malsama ol la antaŭaj kongresoj. Diplomatoj de multaj landoj en Nederlando, inkluzive de Li Ŝiĉji, duaklasa sekretario de Ĉinio, ĉeestis ĝin laŭ la invito. Ĉiuj ĉeestantoj ĝoje kolektiĝis por celebri la finiĝon de la unua jarcento de Esperanto kaj bonvenigi la komenciĝon de ĝia dua jarcento.

D-ro Humphrey Tonkin faris longan paroladon

Ĉinaj esperantistoj antaŭ la kongresejo



Bela vespero por ĉinaj, japanaj kaj sveda samideanoj en la hejmo de s-ino Loes Demmendaal (dekstre)



pri la nova Strategia Plano de UEA en la dua jarcento. Li diris: "Kion ni faru por pretigi nin por tiu ĉi nova jarcento? Ĉi tie en Roterdamo la Komitato de UEA pridiskutas la novan Strategian Planon de UEA. Ĝi emfazas la instruadon de Esperanto, informadon pri ĝi, la praktikan aplikadon de la lingvo, kaj edukadon al tutmonda konscio, al la internaciista idealo."

Por efektiviĝi tiun ĉi komunan celon, li esperas, ke la esperantistoj de diversaj landoj laboros pli solidarece, disciplineme kaj ĝoje. En sia parolado li prezentis multajn esperojn al la ĉeestantoj, unu el kiuj estas, ke oni devas havi novan konscion pri la graveco de la Universala Esperanto-Asocio. Tio kompreneble estas senduba. Hodiaŭ, kiam ni vidis, ke la Esperanto-movado vigle disvolviĝas tra la mondo, kiel ni povus forgesi la Universalan Esperanto-Asociacion, kiu troviĝas en unu modesta domo en Roterdamo, Nederlando. Kaj ni ĉiuj sincere deziras, ke ĝi ludu pli gravan rolon en la dua jarcento.

LA ESPERO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN AFRIKO

La nombro de esperantistoj el Afriko, kiuj partoprenis en la 73-a UK, estis pli granda ol tiu de ĉiu ajn antaŭa kongreso. Tio estis unu el la karakterizaĵoj de la ĉi-foja kongreso. Kvankam ili ne tre flue parolas en Esperanto, tamen en ili videblas la espero de la Esperanto-movado en Afriko.

En la kongreso mi havis la honoron ĉeesti la kunsidon pri "Agado en Afriko". La salono kun pli ol 100 sidlokoj estis plenplena de ĉeestantoj. La malfruigintoj devis nur stari aŭ eĉ sidi sur planko. En la kunsido ĉiuj konkure faris parolon kaj varme diskutis, kiel propagandi Esperanton kaj disvolvi Esperanto-movadon en Afriko, kiel fari bonefikan instruadon de Esperanto en ĝi, kiel prepari lernolibrojn kaj kiel kolekti monrimedojn. La ĉeestantoj ĉiuj esperis, ke la Esperanto-movado rapide prosperos en Afriko.

LA KUNSIDO DE EPĈ-LEGANTOJ


Posttagmeze de la 26-a de julio okazis en la salono Hodler kunsido por EPĈ-legantoj. La kunsidon prezidis s-ino Tan Ŝiŭgu, vicĉefredaktoro de la redakcio de El Popola Ĉinio. Ĝin ĉeestis Ĝu Mingji, asista ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo. Ĉirkaŭ 300 afablaj legantoj ĉeestis nian kunsidon. Tio prezentis bonan okazon al laborantoj de EPĈ kaj ĝiaj legantoj kore interparoli, interŝanĝi siajn opiniojn kaj esprimi la amikecon.

La ĉeestantoj donis altan takson pri nia revuo. Ili laŭdis la revuon per plej belaj vortoj, kio multe nin kuraĝigas. S-ro Pierre Zanin de Italio emocie diris: "Mi volas diri nenion al la revuo EPĈ, mi nur volas diri, ke ĝi estas plej bela, plej bona Esperanta revuo, ŝatu ĝin!" Dirinte, li ascendis la podion kaj kisis sinjorinon Tan por esprimi sian koran dankon al la redakcio de EPĈ.

Kaj samtempe kun tio, iuj legantoj donis multajn proponojn kaj kritikojn al nia redakcio. Estante laborantinoj de la redakcio, mi kaj la prezidantino de la kunsido rigardas ĉion ĉi kiel zorgon, subtenon kaj amikecon de la legantoj al nia revuo. Nia redakcio donos grandan atenton al iliaj proponoj kaj kritikoj kaj serioze diskutos pri ili por fari EPĈ komuna revuo de la tutmonda esperantistaro.

LA INFANA KONGRESETO

Vespere de la 28-a de julio, ni vizitis la Infanan Kongreseton ĉe la antaŭurbo de Roterdamo, kiu koincidis kun la kongreso. Tie renkontiĝis 33 infanoj el 15 landoj, inter kiuj la plej juna estis nur 5-jara. Sub la gvido de ses instruistoj, ili sin amuzis per kantado, dancado, remado, papertondado, ekskurso, pentrado, ludado de tablotenis kaj vizitado. Ili kun malsamaj ŝtatanecoj kaj malsamaj haŭtkoloroj parolis nur unu saman lingvon Esperanto, per kiu ili salutis sin reciproke, interparolis kaj rapide konatiĝis unu kun alia. Dank' al Esperanto ili fariĝis bonaj amikoj.



Tajĝiĉjŭan-kurso en la kongresejo



Ĝu Mingji, respondeculo de ĈEL, deziras bonan sanon al s-ro G. Waringhien, la plej aĝa el la kongresanoj.

Kiam mi intervjuis tiujn gajajn kaj amindajn esperantistetojn, ili konkure respondis miajn demandojn. Ni vidis en ili la belan estontecon de Esperanto. Jen kial d-ro Tonkin nomis ilin la plej honoraj gastoj de la kongreso.


LA ĈINA TAJĜIĈJŬAN BONVENA

Por amikeco kaj pli bona praktiko de Esperanto, ĉinaj esperantistoj el Ŝenĵang funkciigis Tajĝiĉjŭan-kursojn en la kongresejo. Ili gvidis la kursojn matene kaj vespere ĉiutage dum la kongreso. Kiel grava rimedo fortigi la sanon kaj preventi malsanojn, ĝi

estas bonvena al esperantistoj. En la internacia vespero la prezento de simpligita Tajĝiĉjŭan-gimnastiko ricevis longan kaj varman aplaŭdodon de la ĉeestantoj.

ALTA TAKSO AL ESPERANTA TELERIDFILMO "LA ESPERO" DE ĈINIO

La porinstrua Esperanta televidfilmo "La Espero" farita de la urbo Ĉingdaŭ de Ĉinio estis alte taksita tuj post sia projekciado dum la kongreso. S-ro Roman Dobrzynski, prezidanto de la Pola Esperanto-Asocio, diris: "Ĉinio faris revolucion en




La inaŭguro de la 73-a UK

Ĉinaj esperantistoj kaj alilandaj samideanoj





Estraranoj de UEA kaj gvidantoj de ĈEL kunsidas pri la Centro de Azia Agado.



Afrikaj esperantistoj

Gemaljunuloj
rejuniĝas en "nia
hejmo".



Laborantino de EPĈ en la Internacia Infana Kongreseto





En la kunsido de EPC-legantoj



Inĝ. Ludoviko
Zaleski-Zamenhof
(meze) en la
kongreso

Anonco

En la januara numero de nia revuo ni anoncis, ke ĉiuj niaj legantoj kaj perantoj, kiuj varbos 300 abonantojn kaj sendos la abonpagon al ni, povas senpage viziti en Ĉinio 7-10 tagojn. Nun iuj el ili jam plenumis tion, ni esprimas al ili koran dankon kaj gratulon. Ni esperas, ke tiuj, kiuj varbis proksimume 300 abonantojn, faros plu penadon kaj ne perdos la bonan ŝancon vojaĝi al Ĉinio.

Dank' al la fervora helpo de diverslandaj samideanoj "Fotoj Faritaj de E-istoj", paĝo de EPC, daŭris ĝis hodiaŭ. Ni deziras, ke tiu laboro iru pli bone, kaj ke fervoraj samideanoj kontribuu al ĝi kolorajn fotojn kun enhavoj diversaj, kiaj pejzaĝaj fotoj kaj

fotoj pri moroj kaj vivo de popoloj. Ni deziras precipe fotojn kun arta valoro.

Nia revuo prezentos en la nova jaro E-aktivadojn okazontajn de diverslandaj esp-organizoj en 1989. Pro tio ni deziras ricevi fidindajn informojn pri ili antaŭ la fino de decembro 1988, kun klara sciigo pri la nomo, organizanto, tempo, loko, aliĝ-maniero ktp.

Nia redakcio havas jarkolektojn de EPC de 1985-1987. Ĉiu volumo kostas 15 dolarojn. La mendantoj rekte skribu al Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (Guoji Shudian), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

—La Red.

la instruado de Esperanto." La estraro de UEA donis grandan atenton kaj altan takson al la televidfilmo, opiniante, ke ĝi estas iniciato en la instruado de Esperanto. Ili proponis esperantigi la han-lingvan tekston de la filmo, por ke ĝi estu distribuata tra la mondo. Post ĝuado de la filmo multaj esperantistoj petis mendon de ĝia bildbendo.

GASTI ĈE SINJORINO LOES DEMMENDAAL

Dum la kongreso s-ino Loes Demmendaal dufoje invitis nin ĉinajn esperantistojn gastigi ĉe ŝi. Ŝi estas malnova amikino de multaj ĉinaj esperantistoj. Dum la tagoj en Roterdamo ŝi donis al ni fervoran prizorgon kaj helpon. Mi konatiĝis kun ŝi en la 71-a UK en Pekino. Kompreneble, ni tre ĝojis denove renkontiĝi en Roterdamo. Pro ŝia afableco kaj gastamo,

multaj esperantistoj iam gastis aŭ tranoktis ĉe ŝi, tiel oni nomas ŝian hejmon hejmo de esperantistoj.

SinJORINO Loes Demmendaal persone preparis por ni abundan vespermanĝon laŭ la gusto de nederlandanoj. Gustumante la bongustajn manĝaĵojn, ni ĝoje babilis pri ĉio interesa, pri moroj kaj kutimoj de diversaj landoj, tute senĝene, intime, kiel en nia propra hejmo. Ni kore dankas s-inon Loes Demmendaal pro ŝia afableco kaj amikeco al la ĉinaj esperantistoj.

SinJORINO Loes Demmendaal, vi ĉiam estas inter ni!

La 8-taga kongreso finiĝis en bedaŭro pro disiĝo. Tamen, la tagoj kaj noktoj, kiujn ni pasigis en Roterdamo, kaj tiuj scenoj plenaj de intimeco, amikeco kaj afableco estos neniam forgesblaj.

“La neŭtrala lingva fundamento estu lingvo interhoma”

—Parolado de inĝ. Ludoviko Zaleski-Zamenhof en la Jubilea Festo en la 73-a UK

Pasintjare ni festis la centjaran jubileon de nia lingvo, kaj hodiaŭ finiĝas la unua paŝo de ĝia dua jarcento. La plej grava kaj la plej promesa indiko kiun mi povas observi estas la kreskanta evoluo de Esperanto. Jes, mi konstatas: Esperanto vivas, ĉar ĝi progresas. Ĝi evoluas teknike, kiel lingvo; evoluas ankaŭ la ideoj kiujn ĝi vehiklas. La Universala Esperanto-Asocio, hodiaŭ okdekjara, montriĝas ankaŭ ĉiam juna...

Kompare kun nia lingvo, samaĝaj inventoj, en kampoj tre diversaj, prezentas hodiaŭ eksmodigitajn teknikojn, tiam, kiam kelkaj samaĝaj filozofiaj pensoj aperas hodiaŭ ne plu bonvenaj al la nuntempaj kondiĉoj.

La neŭtrala lingva fundamento, iniciatita en 1887 de la juna doktoro Zamenhof, sukcesis adaptiĝi, restinte konforma al siaj fundamentaj, teknikaj principoj, al la fulma progreso atingita dum la pasinta jarcento en ĉiuj kampoj de nia ekzistado. Certe, la kondiĉoj de ĝia aplikado ŝanĝiĝis. Ĝi ne plu estas la unika instrumento, por ke “ni komprenu unu la alian”. Ekzistas hodiaŭ diversaj lingvoj ŝajne konformaj al internaciaj kontaktoj en respondaj profesiaj kampoj kaj en respondaj geografiaj regionoj. Ekzistas eĉ lingvoj de komunikado inter maŝinoj, bone konataj de ĉiu ajn komputisto. Tial la kampo por Esperanto ne estu lingvo de maŝinoj, sed daŭre estu lingvo de homoj, servanta ilian ĉiutagan inter-



Inĝ. Ludoviko Zaleski-Zamenhof en la kongreso

komprenon, ne necese konkuranta la anglan, la ĉinan, la hispanan aŭ la rusan en oficialaj internaciaj, aŭ, ni diru pli korekte, interŝtataj kunvenoj.

La neŭtrala lingva fundamento estu lingvo interhoma. Anstataŭ ol strebi fariĝi instrumento de politikaj aŭ komercaj interŝtataj marĉandadoj, ĝi vehiklu la konvinkon

de libereco kaj egaleco de ĉiuj individuoj, de ĉiuj homoj, sendepende de ilia har- aŭ haŭtkoloro, de iliaj politikaj aŭ religiaj ideoj, kaj de iliaj respektivaj gepatraj lingvoj. Tiamaniere ĝi daŭrigu kontribui al la “granda rondo familia” starigita de doktoro Zamenhof, vivanta en paco, ĉiu “familiano” ĝuanta plenajn homajn rajtojn.

Kion ni faru por tiu ĉi nova jarcento?



D-ro Humphrey Tonkin en la kongreso

Tio ĉi estas la lasta parto de la parolado de D-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, en la Jubilea Festo en la 73-a UK. Eble laŭ la titolo vi jam scias, kial ni elektas kaj publikigas ĝin ĉi tie.

La Red.

Kaj kion ni faru por pretigi nin por tiu ĉi nova jarcento? Ĉi tie en Roterdamo la Komitato de UEA pridiskutas novan Strategian Planon de UEA. Ĝi emfazas la instruadon de Esperanto, informadon pri ĝi, la praktikan aplikadon de la lingvo, kaj edukadon al tutmonda konscio, al la internaciista idealo. Ĝi atentigas ke ni ankoraŭ ne plene kaj plej efike utiligas niajn grandajn homfortojn, ke ni devas pli solidarece, disciplinite kaj (se mi rajtas tiel esprimi min) ĝoje labori por nia komuna celo. Mi esperas, ke la Komitato, post zorga konsidero kaj eventualaj modifoj, akceptos tiun ĉi planon, kiu donos al ni bazon por la estonta agado kaj fiksos niajn ĉefajn prioritatojn. Ĝi estos fleksebla plano, ŝanĝebla en estontaj jaroj, sed ĝia kombino de praktikaj celoj kaj gvidaj idealoj espereble ebligos koheran kaj celkonscian agadon en

venontaj jaroj.

Kial mi uzas la vorton "ĝojo"? Kial mi parolas pri idealoj? Ĉar, karaj gekolegoj, la laboro por Esperanto ne estas facila. Tiel bela, simpla kaj trafa ideo ofte renkontas mokojn, ofte trovas reziston, inter tiuj, kiuj kontentas pri la nuntempo aŭ, manke de propraj idealoj, ne povas agnoski ilin ĉe aliaj. Tiu bela ideo, tiu logika solvo, ne estas facile klarigebla al aliaj sen zorga konsidero de la argumentoj, kaj eĉ tiam ĝi povas kolizii kun la egoistaj aŭ malvastaj intereso-
soj de tiuj, kiuj ĝuas en la nuna lingva malegaleco avantaĝojn. Ne estas facile labori por tiel postulema mastro kiel estas tiu nia komuna lingvo: necesas respondi leterojn, skribi leterojn, interveni ĉe instancoj, varbi homojn por kursoj, instrui ankoraŭfoje la korelativojn, redakti, kunsidi, multobligi,

telefoni, glui, ekspedi, protesti, kunordigi, pacigi, registri, kalkuli, kvitanci, protokoli -- temas pri tuta terminaro de organizado kaj administrado.

Sed tiuj verboj, tiuj operacioj, ne estas celoj, sed rimedoj; ne estas atingoj, sed operacioj. Disputi pri detaloj, trovi erarojn ekzistantajn aŭ neekzistantajn en protokoloj, krei ĵaluzon aŭ malpacigon inter la homoj, aŭ eĉ tiel kondukti, ke nur oni pravus, kaj neniel la aliaj -- tiuj estas ofte la agoj de tiuj, kiuj perdis la ĝojon de esperantisteco; de tiuj, kies koro ne plu saltas je la unua kantado de la Himno en kongresoj; de tiuj, kiuj ne plu sentas tiun koncentrigon de intelektaj fortoj kiam ili kun eksterstarantoj diskutas pri la meritoj de Esperanto. Tiuj estas la agoj, de tiuj kiuj perdis la grandajn celojn kaj faras celon el la propra pravo, el la pro-

pra venko.

Pro tio, karaj gekolegoj, mi parolas pri ĝojo. Pro tio mi atentigas, ke la rutinaĵoj de la esperantista vivo estas nur punktetoj en tutmonda strebado de miloj da homoj -- esencaj punktetoj, sed nepre konsiderenda en pli granda kunteksto.

Kaj la vojo estas malpli facila ol ĝi ŝajnas. Pli da pordoj malfermiĝas al ni (kiel mi ofte diras) ol ni kapablas trapasi. Pli da bona volo ekzistas inter tiuj kiuj ĝis nun ne aŭdis pri Esperanto, aŭ inter tiuj kiuj ne pripensis ĉiujn ĝiajn detalojn, ol ni imagas. Se venas rezisto, ŝanĝu la taktikon, aŭ aliru la celon laŭ alia direkto. Estu saĝe memkritika. Lerne mem pli bonajn kaj efikajn argumentojn. Kaj faru tion ĝoje, ĉar la celo de nia lingvo estas ĝoja celo. Havu kuraĝon, ĉar niaj antaŭuloj havis kuraĝon kaj ĉar la celo ĝin meritas. Trovu en ĉiu homo la bonan kaj ne insistu pri la malbono. Trovu tion, kio taŭgas, ne elstarigu tion, kio maltaŭgas. Kaj komune ni venkos la obstaklojn, kiuj staras antaŭ ni -- ankaŭ la obstaklojn de ni mem levitajn.

Mi esperas, ke vi ĉiuj iros hejmen fine de la nuna semajno refortigitaj. Mi esperas, ke vi forportos novajn sciojn kaj novan energion. Mi esperas, ke vi ne foriros kun intelekta valizo pakita de via propra pravo, etikedita nur de trafaj rebatoj en komitatkunsidoj aŭ de sukcesa dereligo de tiu aŭ alia ideo, kiun vi opinias malsaĝa. En via valizo estu scio, en via valizo estu novaj kontaktoj, en via valizo estu sento de membreco en internacia kaj interhoma socio, kaj la etikeditoj estu etikeditoj pri veraj pozitivaj atingoj kaj novaj planoj por la venonta laborperiodo.

Kaj fine mi esperas, ke via valizo plenos je nova konscio pri la graveco de nia Universala Esperanto-Asocio, kiu tie ĉi troviĝas en unu modesta domo en Nederlando, sed kies influo disradias tra la tuta mondo kaj trans la jarcentoj de nia internacia lingvo.

ĜANG ĈINGĜEN:

PONTO DE LA ESPERO

La unua porinstrua Esperanta televidfilmo "La Espero" de Ĉinio estis sukcese farita kaj la 22-an de junio okazis ĝia premiero en Ĉingdaŭ, Ŝandong-provinco, Ĉinio.

La televidfilmo estas farita de la Ĉingdaŭ-a Asocio por Kultura

Interŝanĝo kun Aliaj Landoj, Ĉingdaŭ-a Esperanto-Asocio kaj Ĉingdaŭ-a Televidstacio. La naskiĝo de "La Espero" estis subtenata de la Universala Esperanto-Asocio, Ĉina Esperanto-Ligo, redakcio de El Popola Ĉinio, Radio Pekino kaj Centra Televido de Ĉinio. La instruadon plenumas

La inaŭguro de "La Espero"



parolistoj el la Esperanta Sekcio de Radio Pekino.

La filmado de "La Espero" komenciĝis en la lasta oktobro kaj daŭris ok monatojn. La tuta kurso nombras 24 lecionojn. Ĉiu leciono konsistas el teksto, dialogo kaj esprimoj el fundamentaj vortoj. Iuj ankaŭ enhavas movbildojn kaj baladojn. En la formo de televidfilmo, ĝi donas multan scion, prezentas artisman kaj ĝuigas interesaĵojn. Organisme kombinante la lingvan instruadon kaj specialan scenon, ĝi paŝopostpaŝe konigas la 16 regulojn de la internacia helpa lingvo kaj rilatajn lingvaĵojn, por ke la komencantoj akiru la kapablojn aŭdi, paroli kaj legi en kompare mallonga tempo.

Koncerna respondeculo de la urbo Ĉingdaŭ prezidis la premieron.

Liŭ Ĝen, gvidanto de la urba partia komitato, donis parolon en la premiero. Li diris, ke Esperanto kiel artefarita lingvo eniris sian duan jarcenton. Kiam ĝi naskiĝis, ĝi montris sian fortan vivipovon, kun la celo kontraŭstari rasan diskriminacion, akceli la mondpacon

kaj doni al la homaro helpan lingvon.

Li diris ankaŭ, ke la Esperanto-movado de Ĉingdaŭ havas longan historion. Ekde 1912 nemalmultaj prudentuloj dediĉis sin por Esperanto. Kun ekonomia disvolviĝo la Esperanto-movado evoluis paŝopostpaŝe. Nun en la urbo pli ol 100 homoj lernas kaj uzas Esperanton. Tial, la porinstrua televidfilmo estas nepra sekvo de la politiko de pordomalfermo kaj la disvastiĝo de la Esperanto-movado en Ĉingdaŭ. Oni donis al la filmo la nomon "La Espero" pro tio, ke la reĝisoroj esperas, ke ĝi fariĝos figur-materialo de Esperanto-amikoj, kaj ke la urbo kontribuos al la Esperanto-movado de Ĉinio kaj tiu de la mondo. Ili deziras, ke la televidfilmo plifortigu la konadon de diversaj popoloj al Ĉingdaŭ kaj ties popolo kaj fariĝu ponto inter diversaj popoloj kun malsamaj haŭtkoloroj kaj malsamaj kredoj.

9 esperantistoj el 5 landoj invitive partoprenis la premieron. Inter ili estis Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, Roman Dobrznyn-

ski, prezidanto de la Pola Esperanto-Asocio, Vilmos Benzik, ĉefredaktoro de "Hungara Vivo", kaj William Menary, reprezentanto de la prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

Ĉeestis ĝin ankaŭ Cicio Mar, fama ĉina tradukisto kaj verkisto, Ĝang Ĝenhŭa, vicedestro de Radio Pekino. Li Ŝiĝjun, membro de la Akademio de Esperanto kaj antaŭa vicĉefredaktoro de "El Popola Ĉinio".


Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, Ĉu Tunan, antaŭa vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj estro de la societo de "Amikoj de Esperanto", Ĉen Ĵuan, estro de la Laborkomitato por Lingvistiko kaj Skriba Lingvo kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, Simo Milojeviĉ, ĝenerala direktoro de UEA, kaj la Japana Esperanto-Instituto sendis al ĝi gratulajn leterojn kaj telegramojn.

En la sekvanta tago ĉiuj partoprenantoj diskutis pri la filmo. Ili alte taksis ĝin kaj donis siajn opiniojn pri ĝiaj mankoj.

Alilandaj samideanoj en la inaŭguro



SIMPOZIO PRI ESPERANTISMO



SERTA GRATVLATORIA IN HONOREM JUAN REGULO vol. II Esperantismo. Eldonita de Universidad de la Laguna. Formato: 17 x 23.5 cm. 790 p. Prezo ne montrita.

Tiu ĉi estas la dua volumo de la kvarvoluma serio *SERTA GRATVLATORIA IN HONOREM JUAN REGULO*, eldonita de la Universitato de la Laguna por celebri la 70-an datrevenon de la naskiĝtago de prof. Juan Régulo Pérez. En sia "enkonduko" d-ro H. Tonkin skribas pri ĝi: "CED estas forte honorata en tio, ke ĝi povas partopreni la festadon de la grandaj atingoj de prof. Régulo per aŭspiciado de la unua volumo. Tiu volumo per si mem atestas la maturiĝon de faka studado de la fenomeno Esperanto. Mi kuraĝas sugesti, ke antaŭ dudeko aŭ trideko da jaroj tiel ampleksa kolekto de aŭtentike sciencaj studoj ne estus eĉ pensebla..." Vere, ĝi estas tre grava simpozio pri esperantismo eldonita okaze de la centjariĝo de Esperanto.

La kolekto entenas 56 artikolojn. Por mallonga recenzo estas neeble iri en detalojn de la enhavo

de la studoj. Mi menciuj nur la titolojn de kelkaj el ili kaj iliajn aŭtorojn: A. Albault: *La Akademio de Esperanto: starigo kaj esenca rolo*, W.Auld: *Kulturbazo historia de la Esperanto-movado*, J. Balbin: *Kial mi verkas Esperante?* V. Benczik: *La rolo de la eldonejo Stafeto*, R. Bernard: *Esperantaj kabaretoj*, D. Blanke: *Pri la termino planlingvo*, W. Bormann: *Mondlingvo longperiode*, M. Boulton: *La barlasttona travivaĵo*, P. Daŝgupto: *Adverboj en Esperanto*, F. de Diego: *Genezo kaj tradukproblemoj de la Esperanta Don Quijote*, M. D. Goninaz: *Kiel priskribi Esperanton? Problemoj metodologiaj kaj terminologiaj*, R. Eichholz: *Esperanto kiel interlingvo en mina tradukado*, H. Frank: *Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo*, B. Golden: *Principoj por la espeantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj*, E. de Kock: *La regula STAFETO kaj la originala Esperanta poezio*, Ivo Lapenna: *Juraj terminologiaj problemoj kun aparta konsidero al la Esperantolingva jura terminologio*, U. Lins: *La baraktado de IPE*, Stefan Maul: *Ĉu eblas revoluciigi la internacian inform-sistemon helpe de*

la Internacia Lingvo Esperanto? G. Mattos: *Lingvistika priskribo de la verbo en Esperanto*, M. Masao: *Juan Régulo Perez kaj la Esperanta originala literaturo*, P. Neergaard: *Plantnomoj en la Lingvo Internacia*, K. Piĉ: *Simpozio pri -ata/-ita*, C. Piron: *Esperanto, formo de humanismo*, B. Ragnarsson: *Esperanto kiel anti-lingvo*, M.H. Saheb-Zamani: *Irano, islamo kaj la supernacia lingvo—Esperanto*, C. Stop-Bowitz: *Biologiaj nomenklaturetoj kaj ilia esperantigo*, H. Tonkin: *Esperanto: kulturo, lingvo, historio*, H. Vatre: *Vortstatistikaj esploroj ĉe 15 novelistoj*, W.A. Verloren van Themaat: *Kriterioj por la internacieco de la vortaro en planlingvoj*, G. Waringhien: *25 jaroj el la vivo de esperantista eldonejo*, J.C. Wells: *Hispanaj kaj anglaj problemoj en la prononcado de Esperanto* kaj P. Zlatnar: *La internacia lingvo Esperanto en la lerneja sistemo de lingvo-instruado—Spertoj en Jugoslavio*. Mi pensas, ke vi trovos ion interesan por vi inter ili, ĉu ne? Kredeble la cititaj nomoj de akademianoj, profesoroj, esperantologoj kaj verkistoj lasis al vi profundan impreson.

En sia artikolo d-ro W. Bor-
mann skribas: "Se la esperantis-
toj akceptus facilecon kiel esencan
kriterion de estonta mondlingvo,
ili devus ne tiel senpense ŝarĝi sian
lingvon per reguloj." Li malapro-
bas la ŝveligon de la Esperanta vor-
taro per duoblaĵoj kiel ekzemple
plaĝo apud *strando*, *astronaŭtiko*
apud *kosmonaŭto* kaj la neologis-
mojn enkondukitajn por anstataŭi
la mal-vortojn (kiel ekzemple *lan-
ta* por *malrapida*, *turpa* por
malbela, *frida* por *malvarma* kaj
kurta por *mallonga*). "Tiel oni pli
grandigas la kvanton de la lerna-
ĵo," li opinias, "sen ke oni plialtigas
la esprimkapablon de la lingvo.
Ebla kontribuo de tiaj vortoj al
belsonado kaj beleco de la lingvo
ne povas kontraŭpesi la malutilon
pro la aldona lernedevo." Sed s-ro J.
Rumler pledas en sia 24-paĝa trak-
tato "Koncepto pri la Diversaj Sti-
loj kaj Ĝia Apliko al la Esperanta
Leksiko", ke "por la stilo komuna
validas la devizo *sufiĉe kaj necese*,
por la stilo faka validas la devizo
koncize kaj precize kaj en la ar-
tliteratura stilo funkcias la regulo
abunde kaj redunde." Laŭ s-ro J.
Rumler *redunde* signifas *superflue*.
Kaj vere, li proponas uzi *ak* kaj *ed*
apud *kaj*, *aŭtem* kaj *ma* apud *sed*,
men apud *malpli*, *ab* apud *de*, *enim*
apud *nome*, *erst* apud *nur*, *interim*
apud *dume*, *nam* apud *ĉar*, *nul-*
men apud *tamen*, *omno* apud *ĉio*,
sovente apud *ofte* ktp. ktp. Ĉu vi
konsentus kun li? Kaj en la libro
troviĝas kritikoj pri PAG kaj an-
kaŭ kritikoj al tiuj kritikoj. Do
vere libera akademia etoso regas
en la "simpozio". Sed mi bedaŭras,
ke mi ne povas prezenti al vi ĉiujn
interesaĵojn tenatajn en la libro.
Mi povas diri nur, ke vere interesa
kaj valorega estas la riĉa kolekto
de esperantismaj verkoj.

Mi rimarkis, dum la tralegado,
nur tre malmultajn preserarojn.
Tio atestas pri zorga kontrollegado
de la presprovaĵoj. La papero estas
tre bona, la preso tre klara kaj la
bindo tre eleganta. Mi varme reko-
mendas la verkon al ĉiuj bibliote-
koj ĉu publikaj aŭ privataj, kom-
preneble ankaŭ al ĉiuj legemaj es-
perantistoj.

Recenzis Laŭlum

ABONU "EL POPOLA ĈINIO"

Nun komenciĝas abonvarba kampanjo 1989 por "El Popola Ĉinio". EPĈ kun interesaj artikoloj kaj belaj bildoj raportas pri Ĉinio en diversaj flankoj kaj E-movado en kaj ekster Ĉinio. Tiu, kiu abonas aŭ reabonas nian gazeton en la kampanjo (de 1988.10.01 ĝis 1989.02.28), ricevos unu koloran kalendaron 1989 en Esperanto. La abonvarbantoj ricevos ĉinstila(j)n memoraĵo(j)n laŭ sia kontribuo en la varbado.

Sendu la abonilon al nia peranto en via lando aŭ rekte al ni: *Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.*

ABONTARIFO DE EPĈ

(ekvalidas la 1-an de oktobro 1988)

lando	valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	15.00	25.00	35.00
Aŭstrio	ATS	200	340	480
Belgio	BEF	550	930	1300
FR Germanio	DEM	30.00	50.00	70.00
Britio	GBP	8.00	13.60	19.00
Finnlando	FIM	64.00	108.00	150.00
Francio	FRF	90.00	150.00	210.00
Hispanio	ESP	1200	2000	2900
Italio	ITL	18000	30600	43000
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Jugoslavio	YUD	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	34.00	58.00	82.00
Nov-Zelando	NZD	20.00	34.00	48.00
Portugaliao	PTE	1100	1800	2600
Svisio	CHF	25.00	42.00	60.00
Usono	USD	12.00	20.00	28.00
Kanado	CAD	14.00	23.00	33.00

Por aliaj landoj en Eŭropo:

	GBP	8.00	13.60	19.00
	USD	10.00	17.00	24.00

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

	GBP	5.00	8.50	12.00
	USD	6.50	11.00	16.00

**ALIA TELEVIDA FILMO POR ESP-
INSTRUADO PROJEKCIITA**

Alia grandskala televida filmo por Esp-instruado estas farita lastatempe en la urbo Ŝenjang, nordorienta Ĉinio. La filmo konsistanta el 50 lecionoj, ĉiu po 25 minutoj instruas per interesaj movbiloj kaj ĉelokaj planoj. Ĉen Haŭsu, vicministro de la Ĉina Ministerio de Radio, Kino kaj Televido kaj vicprezidanto de la societo Amikoj de Esperanto surskribis titolon por la filmo "Voĉo de Estonto". La filmo estas kune farita de la Ljaŭning-a Universitato de Radio kaj Televido kaj la Ŝenjang-a Esperanto-Ligo. La supre menciita universitato funkciigos televidan Esp-kurson kune kun aliurbaj televidstacioj de la provinco. La televidstacio de Ŝenjang oficiale projekciis la filmon en la 2-a de aŭgusto.

**ESP-KURSO EKFUNKCIIGATA EN
FUŜUN**

La Oficista Politekniko sub la Karbomineja Administracio de Fuŝun ekfunkciigis hedevegitan Esp-kurson en majo, kiun partoprenas 80 lernantoj. Gvidantoj de la politekniko donis grandan atenton al la instruado. Antaŭ la komenco de la kurso, ili faris specialan argumenton pri la Esp-instruado.

**LA HENAN-A JUNULARA ESP-
LIGO FONDITA**

La nomita ligo estas fondita la 9-an de julio en Ĝengĝoŭ, la ĉefurbo de Henan-provinco. Ĝi estas la dua provinc-nivela junulara Esp-organizo aperinta en Ĉinio, post la Junulara Esperanto-Asocio de Hejlongĝjang-provinco. Nun similaj asocioj fondiĝis en 17 ĉinaj urboj.

**JAPANA AMIKO VIZITIS ŜEN-
JANG**

Por Esperanta turismo kaj amikeco inter japanaj kaj ĉinaj esper-

antistoj, prof. Misawa Masahiro, prezidanto de Hokkaido-Esperanto-Ligo, invitive de la Ŝenjang-a Esperanto-Ligo, faris enketadon kaj vizitadon en Ŝenjang de la 12-a ĝis la 27-a de junio. Prof. Misawa Masahiro vizitis esperantistajn familiojn, Esperantan angulon, la Ljaŭning-an Universitaton de Radio kaj Televido, Ljaŭning-an Universitaton, la Imperiestran Palacon en Ŝenjang k.a. Li faris raporton titolitan per "Ni konstruu verdan galaksion inter Japanio-Ĉinio" al membroj de la Ŝenjang-a Esperanto-Ligo.

Post la vizitado en Ŝenjang, prof. Misawa Masahiro, akompanate de la ĝenerala sekretario de la Ŝenjang-a Esperanto-Ligo Ĝaŭ Ĉenghŭa, vizitis Harbin, Pekinon kaj aliajn lokojn, kaj renkontiĝis kun respondeculoj de la tieaj Esp-asocioj.

**BROŜURO PRI MUELEJA LANDO
—NEDERLANDO**

Okaze de la 73-a UK en Roterdamo aperis belega broŝuro en Esperanto kun informoj pri nederlandaj muelejoj, eldonita en kunlaboro kun la Nederlanda Esperanto-Asocio.

Vento estas antikva fonto de energio. En Nederlando nun ekzistas ankoraŭ ĉ. 1 000 muelejoj movataj per vento, kaj ĉiu el ili estas monumento pri antikva tekniko, kiujn oni zorgoplene konservas kaj protektas.


La broŝuro estas bona memoriĝilo por tiuj, kiuj vizitis Nederlando, kaj plie nederlandanoj mem trovos en ĝi interesajn informojn. (Havebla ĉe NEA. prezo 7,50 gul.)

**VENONTAJ AGADOJ DE UFE EN
PARIZO**

Ne nur ŬEA festis sian okdekjariĝon, ankaŭ Unuiĝo Franca por Esperanto havis sian 80-an kongreson. Ĝi okazis de la 20-a ĝis la 24-a de majo en Rouen, kun centoj da partoprenantoj.

La administraj kunvenoj traktis ĉefe la estontan agadon. UFE organizos kiel kutime en la fino de novembro kulturalan festivalon en Parizo, kaj antaŭ la UK en Brighton "frenezan semajnon", ankaŭ en Parizo, kie nefrancoj povos malkovri pere de esperantlingva gvidado la konatajn kaj malpli konatajn monumentojn, kvartalojn, kulturaĵojn de la franca ĉefurbo.

S-ro Misawa Masahiro (meze) en la hejmo de ĉina esperantisto U Hŭajmin



UFE daŭrigos sian informan kampanjon en diversaj revuoj. Pretiĝas la eldono de nova franc-esperanta vortaro.

Sekvanta kongreso okazos en la centro de Francio, en Vichy.

UNUAFOJE ĈINA INSTRUISTO DE ESPERANTO EN JUGOSLAVIO

De la 1-a ĝis la 10-a de julio 1988 okazis en Stambulĉiĉ, apud Sarajevo, ĉefurbo de Bosnio, Jugoslavio, kurso de Esperanto (A por komencantoj kaj B por progresintoj) kun partopreno de 23 kursanoj en la aĝo de 13-55 jaroj, kiun organizis la Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino en Sarajevo.


La kurson gvidis 4 instruistoj de Jugoslavio, Hungario kaj Ĉinio. Liang Ziming, direktoro de Universitata Esperanto-esplorsekcio UEA kaj honora membro de ISAE, kiel la unua ĉino faris lecion en Jugoslavio. Li faris ankaŭ prelegon pri Ĉinio. La gekursanoj estis tre kontentaj pri la instruado kaj alprenado de scioj pri Ĉinio. Ili esperas, ke ĉina helpo pri instruado Esperante en Jugoslavio daŭros.

TRADUKOLOGIA KONFERENCO PRI PLANLINGVOJ

Inter la 17-19-a de majo 1988 Humboldt-Universitato de Berlin (DR Germanio) organizis internacian konferencon pri la "Tradukologio kaj edukado de tradukistoj". Oni prezentis pli ol 100 prelegojn, inter kiuj ankaŭ aperis la temo pri planlingvoj, nome "Planlingvo kaj tradukologia teorio" de d-ro Sergej Kuznecov de instituto pri lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj de USSR, kaj "Planlingvoj kaj tradukado, ĉe la ekzemplo de Esperanto" de d-ro sc. Detlev Blanke. Ambaŭ prelegoj elvokis viglan intereseon kaj diskuton kaj aperos en volumo pri la konferenco.

KVAR E-KURSOJ EN VENEZUELO

Tre aktiva Venezuelana Esperanto-Unuiĝo ĉi-jare gvidas 4 E-kursojn en Zulia Universitato kaj la urbo San Cristobal



Parto de estraranoj de UFE en la fermo de la 80-a kongreso



Estraranoj de la Venezuelana Esperanto-Unuiĝo kaj lernantoj de Esperanto-kurso

(Tachira).

Ekde kelkaj monatoj VEU organizis bibliotekon kaj pro tio ĝi petas kunlaboron de ĉiuj esperantistoj de la mondo per sendo de E-libroj kaj revuoj al: Venezuelana

Esperanto-Unuiĝo (David G. Valcillos V.), Calle 79 N-ro 3c-72, Maracaibo-4002, Venezuelo.

Privataj entreprenoj en Ĉinio

Antaŭ 9 jaroj, Ĉen estis senfama kampara junulino. En 1980, kiam ŝi komencis mem prepari kaj vendi rostitajn kokojn, ŝia kapitalo estis nur 200 jüanoj, kiujn ŝi prunteprenis de alia. Nun ŝi estas la unua riĉulo de la urbo Taj'an, Ŝandong-provinco kaj mastrino de la frandaĵ-vendejo "Ora Stelo" kun kapitalo de preskaŭ miliono da jüanoj kaj 50 dungitoj. En la nuna Ĉinio milionuloj kia Ĉen ne estas rare videblaj. Laŭ ŝtata statistiko, en Ĉinio troviĝas pli ol 220 000 privataj entreprenoj, kies dungitoj estas pli ol 8 homoj, la totala nombro de la dungitoj atingis 3.6 milionojn da homoj.

KOMPLEMENTO DE PUBLIKA POSSEDSISTEMO

"Ni malfacile batalis 30 jarojn, tamen nun restariĝis antaŭ ni la antaŭliberiga socio", tio montras la malkontenton de iuj konservativuloj pri disvolvo de individua kaj privata ekonomioj. Vere jam en 1956, Ĉinio plenumis la socialisman reformadon al la privata ekonomio, preskaŭ ĉiuj privataj industriaj kaj komercaj entreprenoj fariĝis ŝtataj aŭ kolektivaj. Ĉinio tiam fiere anoncis finiĝon de la historio de ekspluatado de homoj al homoj en Ĉinio.

Hodiaŭ privataj entreprenoj ja

prosperas en la tuta lando, kaj plie, la privata ekonomio havas leĝan pozicion en la konstitucio. La ŝtato publikigis leĝon pri privataj entreprenoj por protekti iliajn laŭleĝajn rajtojn kaj kuraĝigi ilian disvolviĝon.

Tiu 180-grada ŝanĝiĝo neeviteble vekis miskomprenon ĉe iuj personoj en- kaj eksterlandaj, kvazaŭ sur la nuna ĉina kontinento restaŭriĝus kapitalismo kaj Ĉinio revenus al la epoko antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio.

Fakte, ne estas hazarda la naskiĝo kaj disvolviĝo de privata ekonomio en Ĉinio. Ĝi estas objektiva bezono de la disvolviĝo de produktaj fortoj en la nuna Ĉinio.

En la pasintaj jardekoj la ekonomia disvolviĝo de Ĉinio en la kadro de planizita ekonomio kaj produktaja ekonomio estis ekstreme malekvilibra. La nivelo de la produktaj fortoj estis malalta. En la longa tempo la strukturo de nacia ekonomio malracia kaj en pluraj kampoj la ekonomiaj rilatoj streĉitaj. Plurspecaj produktaj rimedoj por industrio kaj agrikulturo kaj varoj por popola vivo ne povis kontentigi la bezonon. La komerco, manĝaĵ-liverado kaj aliaj sociaj servoj ne povis kontentigi la bezonon de la popola vivo kaj ĉiam pli multiĝas la senlaboruloj. Tuj solvi tiujn problemojn estas malfacile por la ŝtato. Sub tiuj kondiĉoj, por akceli la ekonomian disvolviĝon kaj garantii glatan reformadon oni devas praktiki flekseblan politikon, disvolvi ekonomion de plurspecaj posedsistemoj sub la premissa, ke la publika posedsistemo estas

Direktorino Ĉen Ĝjun



la ĉefa parto, inkluzive de disvolvo de privata ekonomio, por akceli la disvolviĝon de la produktaj fortoj. En la komenco la ŝtato estis skrupula pri disvolvo de privata ekonomio kaj aplikis sintenon ne malpermesi, ne limigi kaj rigardi portempe kun celo observi, ĉu disvolviĝo de la privata ekonomio estas utila al la nacia ekonomio aŭ ne.

Post kelkaj jaroj, la privata ekonomio multe disvolviĝis kaj montris sian komplementigan rolon de la publika ekonomio en akcelado de la produktado, vigligo de la merkato, pliigo de laborŝanĝoj kaj kontentigo de la vivbezono de la popoloj. Ĝi mildigis multflanke ekonomiajn kontraŭdirojn. Prenu trafikon kiel ekzemplon, en la tuta lando sur la ŝoseo iras 2.5 milionoj da privataj aŭtoj kun jara transporta povo de 5 miliardoj da tunoj, tio multe mildigis la pasaĝer- kaj var-transportadon.

Nun la ĉinaj privataj entreprenoj troviĝas en frua periodo de sia disvolviĝo. Ilia skalo ĝenerale estas ne granda kaj nur malmultaj el ili havas pli ol 100 dungitojn. En 1987 la totala produktovalorado de privataj entreprenoj konsistigas 1% de la totala industria produktovalorado de la tuta lando, tial la privata ekonomio estas nur kompletiĝa parto, bridata de la publikposedsistema ekonomio. Koncernaj fakuloj asertis, ke eĉ kiam la produktovalorado de privataj entreprenoj konsistigos 10% de la totala industria produktovalorado de Ĉinio, ili ne povos ŝanceli la ekonomian strukturon de la publika posedsistemo. Tial, laŭ nia ŝtata politiko, la privataj entreprenoj plu disvolviĝos en sufiĉe longa periodo.

FLEKSEBLA TAKTIKO DE LA ENTPRENADO

Kvankam la privataj entreprenoj de Ĉinio nun ne estas tre grandskalaj, tamen dekomence ili sin montris rapidaj en la decido, flekseblaj en entreprenado kaj kapablaj en traktado de la ŝanĝita situacio. Tio estas provoko al la rigida administra sistemo kaj postgiginta entreprena maniero formi-



En privata vendejo

taj en multaj jaroj de la ŝtataj kaj kolektivaj entreprenoj kaj devigas ilin altigi ilian konscion pri konkurenco kaj ŝanĝi la produktan stilon kaj entreprenan stilon, sekve de tio vigliĝas la ekonomia vivo de la tuta socio.

La 41-jara Ĉji Jun en la pasinteco estis laboristino de Daĉing-olekampo. La de ŝi entreprenata Hŭabin-kompanio konsistas el komerca domo, hotelo kaj restoracio kun kapitalo de pli ol miliono da jŭanoj. Ŝia entreprena metodo estas profito malgranda kaj vendo grandkvanta laŭ konkreta stato de la merkatoj. En 1983 la vataj produktaĵoj havis grandan debiton en Daĉing, tiam eĉ malbonkvalitaj vataj litkovriloj en ŝtataj vendejoj vendiĝis altpreze. Ŝi tuj aĉetis pli ol centmil bonkvalitajn vatajn litkovrilojn, ŝi profitis je du jŭanoj de ĉiu vata litkovrilo, je unu jŭano malpli alta ol tiu de ŝtataj vendejoj. Rapide forvendiĝis siaj vataj litkovriloj kaj ŝi gajnis sufiĉe grandan profiton. Ŝia vendo-maniero sendube estas peza bato al la oficist-komercista stilo de ŝtataj vendejoj kaj devigas ilin reguligi siajn varo-prezojn kaj la entreprenan stilon.

Vere estas iuj privataj entreprenoj, kiuj aplikas kontraŭleĝajn rimedojn por alta profito, penis por imposto-evito, vendis malbonkvalitajn varojn kiel bonkvalitajn aŭ donis al aĉetantoj nesufiĉan kvanton. Ankaŭ donaco kaj subaĉeto estas ofte vidata en privataj entreprenoj. Vere, la privataj entreprenoj malfermas sian vojon per mono, akiris materialojn kaj varojn malfacile akiritajn por la ŝtataj entreprenoj kaj poste vendis ilin je alta prezo. Tia fenomeno vekis malkontenton ĉe multaj ŝtataj entreprenoj.

ROMPIĜIS "FERAJ BOVLOJ"

En la interna administrado, la oficistoj kaj laboristoj de privataj entreprenoj ne havas "feran bovlon" nek "egalan porcion da manĝaĵo". Malbon-konduktaj homoj estas eksigitaj. Privataj entreprenoj ŝparas ĉiun groŝon kaj emfazas ekonomian efikon. La tuta personaro, de la mastro ĝis ordinara dungito, tre atentas ŝparon. Ŭej Ŝjiŭang, mastro de la Ŝjiŭang-a Manĝaĵ-prilabora Fabriko, diris: "La laboristoj de mia fabriko estas pli ŝparaj ol mi. Ĉar ili scias klare, ke la prospero de la fabriko decidas



Jiang Ŝifan (dekstre), estro de la Ŝaling-a Fabriko de Elektraj Fadenoj de Ŝenĵang, kaj laboristoj

ilian enspezon. Tial ili laboras konscie kiel en sia propra hejmo.”

Nun, la oficistoj kaj laboristoj de privataj entreprenoj ĝenerale enspezas pli multe ol tiuj de ŝtataj entreprenoj, ĝuas bonstatigan servon saman kiel tiuj de ŝtataj entreprenoj, kaj eĉ pli altan. Per tio ili allogas al si spertajn laboristojn kaj talentulojn de ŝtataj entreprenoj. La 34-jara Ma Ĝin estis lerta laboristo de granda konstrumateriala entrepreni funkciigata de la ŝtato, en Dingŝji, Gansu-provinco kaj laboris 15 jarojn. Ĉi-jare li senhezite rezignis sian laboron kaj fariĝis buldozisto de privata brika fabriko fore je 150 km.

TIMO ESTI “KAPITALISTO”

La mastroj de nunaj privataj entreprenoj plejparte devenis el

kampanoj, laboristoj kaj senlaboraj gejunuloj, etparte el intelektuloj. Kvankam ili estas riĉaj kaj dungas dekojn kaj eĉ centon da laboristoj, tamen ili ne volas, ke oni diru, ke ili estas kapitalistoj. Kiam la interparolo tuŝas ilian kapitalon, ili do ekmutas. Iu mastro de privata entrepreni de Hebej-provinco maltrankvile diris al loka gvidanto: “En la malnova socio mi estis ekspluatata de bienuloj, sed nun mi dungas laboristojn. Diru al mi: ‘Ĉu tio estas ekspluatado? Ĉu mi estas kapitalisto?’ ”

Pro timo esti kapitalistoj, mastroj de iuj privataj entreprenoj kontribuis grandan monsumon al socia bonstatiga afero por akiri bonan famon. Aliaj multe elspezas por diversa ĝuo. Mastro de iu vendejo de rostitaj kokoj en la urbo Ĝĵinan dotis siajn filinojn en ilia edziniĝo po 80 000 jŭanoj. En Ŭen-

ĝoŭ, kie prosperas privataj entreprenoj, entreprenaj mastroj kun riĉaĵo super miliono da jŭanoj des pli timas fariĝi “objekto de revolucio” kaj suferas “teruron pri milionulo”. Iuj ŝtele forprenis sian kapitalon kaj eksigis dungitojn. Aliaj aĉetis altklasajn objektojn, konstruis por si luksan loĝdomon aŭ elspezas grandan monsumon por konstrui sian tombon.

Efektive, la naturo de privata entrepreni decidas ĝian ekspluatadon. La ŝtato kuraĝigas disvolvigon de privataj entreprenoj, nature permesas moderan ekspluatadon. Por eviti abruptan larĝigon de la diferenco en socia distribuado kaj bridi troan individuan konsumon de entreprenaj mastroj, la antaŭ nelonge publikigita “Provizora Regularo pri Privataj Entreprenoj” faris klaran difinon: “La salajro de fabrikestro, administranto aŭ direktiestro de entrepreni ne superu dekoblon de la meznombra salajro de ties entrepreni. La enspezo de entrepreni mastro inkluzivas liajn salajron kaj profiton impostitan, laŭ la leĝo li devas pagi reguligan imposton de individua enspezo.”

Por elimini la timon de entreprenaj mastroj esti “kapitalistoj”, la ŝtato klare difinis en la regularo, ke la mastro de privata entrepreni ĝuas proprieton al siaj investaĵoj kaj povas laŭleĝe heredigi ilin. La ŝtato nomas la posedanton de privata entrepreni “privata entreprenisto” por diferencigi ĝin disde la malnovaj nomoj “kapitalistoj”, “etpropietulo” kaj similaj.



Tri Antikvaj Fabloj

Perdi Ŝafojn

Zang kaj Gu kune paŝtis ŝafojn, sed perdis ilin. Oni demandis, kion dume faris Zang kaj Gu. La unua respondis, ke li legis libron. La dua respondis, ke li sin okupis pri hazardludo. Malsamaj estis iliaj faroj, sed samaj la rezultoj: Ili ambaŭ perdis la ŝafojn.

Filo de Najbaro

Homo batis sian filon pro tio, ke tiu estas impertinenta kaj sentaŭga. Se ankaŭ najbara maljunulo tion farus, dirante: "Mi batas vin laŭ la volo de via patro," ĉu ne absurda estus ties konduto?



Ombro kaj Piedsignoj

Iu timis sian ombron kaj abom-



enis siajn piedsignojn. Li rapide kuris por forlasi ilin. Ju pli li rapidigis sian kuradon, des pli multigis liaj piedsignoj kaj proksimis al li la ombro. Opiniante sian kuradon malrapida, li plirapidigis ĝin ne volante fari paŭzon, kaj finfine mortis de lacego.

Li volis forigi sian ombron, sed ne staris en malluman lokon. Li volis forigi siajn piedsignojn, sed ne ĉesis kuri. Kiel malsaĝa!



Cervobredejo

En la hejmo de ginsengoj, zibeloj kaj makulaj cervoj

—Vizito al la Instituto pri Lokaj Produktaĵoj de Ĝjilin-provinco

de ĜENG ĜENGĜJE

Je ekfajfo dekoj da blankaj ruĝkrestaj grupoj alflugas al vizitantoj de sur verda herbejo. Ili en paroj elegante dancas disvolvante siajn flugilojn. Kelkaj etendas sian kolon kaj faras longan, klaran kaj laŭtan krion.

La ruĝkresta grupo estas rara birdo propra al Ĉinio. Ĝi, longa je pli ol 1.2 metroj, havas maldikajn kaj longajn krurojn. Flugante sur la blua ĉielo, ĝi etendas siajn kapon, kolon kaj krurojn, tiel ke ĝi aspektas tutkorpe simetria kaj facilpoza. La tieajn grupojn bredas la Instituto pri Lokaj Produktaĵoj de Ĝjilin-provinco, kiu bredas ankaŭ fazanojn, sovaĝajn anserojn kaj aliajn birdojn.

La instituto situas en la urbeto Zūoĝja. Tie la medio estas bela; la ĉirkaŭaj montodeklivoj estas kovritaj de densaj arbaroj. Ĝia oficeja domo kuŝas en la sino de verdaj arboj kaj ĉarmaj floroj.

Ĉji Ĉing'an, la estro de la oficejo de la instituto, varme akceptis min, dirante, "Nia instituto fondiĝis en 1956, nun ĝi havas dek branĉojn: tiuj pri zibelo, lutreolo, arĝenta vulpo, izatiso, niktoreŭto kaj aliaj sovaĝaj ekonomiaj bestoj; tiuj pri ginsengo, gastrodio kaj aliaj drogplantoj; tiuj pri fruktarbo, monta vito (*Vitis amurensis*) kaj aliaj sovaĝaj ekonomiaj plantoj; kaj tiuj pri makula cervo kaj gummulo. En la lastaj 30 jaroj la instituto akiris 84 scienc-esplorajn fruktojn kaj el tio gajnis miliardon da jŭanoj.

Ĉji gvidis min tra la ginsenga ĝardeno. Tie tegmentoj bonorde kovras la ginsengobedojn. Folio de ginsengo similas al manplato. El la smeraldeverda foliaro elstaras ĝia floro.

Tieaj laborantoj, parolemaj, diris al mi multon pri ginsengokulturo. La plejmulto de montaj gin-

sengoj en Ĉangbaj-montaro kreskas en arbarzonoj altaj je ĉ.900 m. super la marnivelo. Ankaŭ la ginsengokulturejoj estas sur monto-deklivoj kun la sama alto. La nunaj ginsengokulturejoj sin trovas tie, kie antaŭe estis arbaro. Mi demandis, kial oni kovras ginsengojn per ombrotegmentoj. La mastro respondis, ke ginsengo estas ombro-ama; ĝi bezonas sunlumon, sed ne eltenas rektan sunumon; ĝi timas akvon, sed ne eltenas trosekecon; kaj ĝi postulas fekundan grundon, sed ne povas vivi en grundo tro fekunda. La sovaĝaj ginsengoj plejparte kreskas ĉirkaŭ arbegoj, tra inter kies densa foliaro povas ĵetiĝi sunlumo. Tial oni devas starigi ŝirmilojn por kulturi ginsengojn. Mi alproksimiĝis albedo da ginsengoj kaj trovis ruĝajn ginsengofruktojn, super verdaj bedoj, ĉiu piz-granda, rubene kristala.

Ĉji diris al mi, ke kulturi ginsengojn estas ne facile, kaj ankaŭ prilabori ilin malfacile. Prilaboro de ginsengoj bezonas dekelkajn procedojn, kiaj broslavado, forigo de radikharoj, vaporumo, sunumo, bak-sekigo k.a. Post tiuj procedoj elproduktiĝas diversnormaj ginsengajoj: ruĝaj, blankaj, sukeraj kaj pordonacaj. Estas interese, ke kvankam la virinoj lavantaj ginsengojn tuttage trempadas siajn manojn en malvarma akvo, tamen ili ne sentas malvarmon. Plie, la haŭto de iliaj manoj estas nefendiĝema kaj pli delikata kaj pli glata ol tiu de aliaj homoj.

Elirinte el la ginsenga ĝardeno, Ĉji akompanis min al zibelbredejo. Enpaŝinte en la bredejon, mi tuj estis kaptita de viglaj, amindaj zibeloj. La bredejo konsistas el vicoj da ferkaĝoj sur bretaroj. Ĉiu oblonga kaĝo entenas unu zibelon. Ĉe angulo de la kaĝo estas ligna skatolo, kiu servas por zibelo kiel ripozejo kaj dormejo. Kiam zibelo dolĉe dormas en la skatolo, la kaĝo aspektas malplena, kvazaŭ nenio troviĝus en ĝi. Tamen, kiam 30-40 centimetrojn longaj sibirikosimilaj zibeloj eliras tra truoj de la skatoloj, tuj estiĝas varma etoso. Ĉiuj kaĝoj fariĝas scenejoj por brava prezentado de zibeloj. Ili jen grimpas en la kaĝoj kiel sciuroj kaj simioj, jen abrupte sin turnas kaj enruliĝas en la skatolojn per rapidaj kaj akurataj movoj. Bredanto diris al mi, ke la zibeloj estas raraj porfelaj bestoj, kiuj vivas nur en Ĉinio, Sovetunio, Koreio, la Mongola Popola Respubliko. Nur Ĉinio kaj Sovetunio sukcese bredas zibelojn. La ĉinaj zibeloj vivas en praarbaroj de la nordorienta parto de la lando, kie la klimato estas malvarma kaj la zibela felo estas mola kun densaj maldikaj haroj. Tia felo estas bone varmizola. Faltinte sur la harojn de zibelo, neĝeroj, akveroj ne povas resti tie, sed anstataŭe, glate ruliĝas surteren. La zibela felo de nordorienta Ĉinio ne nur bone konservas varmon, sed ankaŭ portas koloron. Manteloj, kolumoj, ŝaloj, pasamentoj kaj aliaj ornamaĵoj el ĝi aspektas luksaj kaj elegantaj. En la antikva

Ĉinio nobeloj kaj altranguloj kutimis surporti la ĉapelon kun zibela vosto ornamita per oraĵo kaj arĝentaĵo por montri sian noblecon. Zibela felo servis kiel tributo al la kortego en la feŭda socio. Ĝi ĝuas la reputacion de "mola oro" kaj "pelta reĝo". Eĉ hodiaŭ ĝi estas ankoraŭ la plej valora felo.

Fine, Ĉji akompanis min al la cervobredejo. Nia aŭto kuris laŭ serpentuma montvojo. Mi vidis en arbaroj ambaŭflanke de la vojo elektrajn fadenojn, kiuj ligas arbotrunkojn. La fadenoj ĉirkaŭas kelkajn montetojn. "Tio estas paŝtejo kun elektra ĉirkaŭbarilo. En ĝi paŝtiĝas makulaj cervoj." Ĉji diris al mi.

Ĉirkŭirinte monteton, nia aŭto haltis antaŭ vico da cervodomoj el ruĝaj brikoj. En la domoj estas makulaj cervoj kaj guemuloj. Kelkaj domoj estas malplenaj. La cervoj en ili estas forpelitaj al la paŝtejo kun elektra ĉirkaŭbarilo. Apud la cervodomoj funkcias sunenergiaj fontoj kun baterioj kaj impuls-sendiloj, kiuj povas elektrigi la barilon. Tuŝante la barilon, cervo tuj sentas sin ŝokita kaj fuĝas. Bredi cervojn en tia paŝtejo ebligas racie utiligi paŝtejon, redukti furaĝkoston, malpezigi la ŝarĝon de paŝtistoj kaj samtempe altigi la kvaliton kaj kvanton de

Sunumado de ginsengoj



cervokorno.

Ĉji konigis al mi la makulan cervon.

Longa je 1.5 metroj, belaspekta makula cervo havas longajn kaj maldikajn kruojn. Ĝiaj okuloj estas vigle brilaj. Sur ĝiaj gluteoj estas okulfrapaj blankaj makuloj. La cervinoj ne havas kornojn. Cerva korno diferencas de tiu de bovo aŭ ŝafo. La masiva cervo korno havas kelkajn branĉojn. Ĉiujare, dum aprilo kaj majo la maljunaj kornoj defalas kaj la junaj elkreskas. Juna korno estas valora drogo. Oni dehakas al cervo la kornojn unu- aŭ dufoje jare, alie ĝi maljuniĝas kaj falas per si mem. Oni povas ricevi junan kornon dekelkfoje de unu bredita cervo. La kornoj de 4-9-jaraj cervoj estas plej bonkvalitaj. Nove elkreskinta korno portas sur si velur-similan haŭton, interne de ĝi estas multaj kartilagoj, dilatataj kaj diafanaj vejnoj. Paro da junaj kornoj estas kvazaŭ du kornoj. Se vi palpas ilin, vi sentas ilin molaj kaj varmetaj. Cervokorno entenas hormonon, kiu akcelas la funkcion de organo kaj cikatriĝon de vundo kaj malaltigas sango-premon. Nun ĝi estas vaste aplikata en kuracado de neŭrastenio, diversaj hipofunkcioj, vundoj, virinaj kaj okulaj malsanoj.

AZIA ĈAMPIONINO DE 10 000-METRA EBENKURO

Ŭang Ŝiŭting



Juna ĉina kamparanino Ŭang Ŝiŭting fariĝis azia ĉampionino de 10 000-metra ebenkuro. Ŝia kresko portas kolorojn kaj ordinaran kaj mirigan.

PARO DA BLANKAJ SPORTŜUOJ

Ŝi estis ordinara kamparano antaŭ decembro 1985.

Ŝi naskiĝis en Laŭŝan-gubernio, Ŝandong-provinco. Ŝia familio kun 8 membroj vivis modestan vivon. Jam en sia infaneco ŝi ekhelpis siajn gepatrojn por vivteni la tutan familion.

En ŝia hejmloko multaj knabinoj ne vizitis lernejon, ĉar oni opiniis, ke vivteni estas pli grave ol lerni. Kompare kun siaj kolegoj ŝi estis feliĉa. Ŝia patro estas instruisto kaj amatoro de longdistanca kuro. Li ne nur lernigis ŝin, sed ankaŭ kune kun ŝi faris ebenkuron. Tio estis rara en la tiama kamparo de Ĉinio kaj neeviteble vekis klaĉon, kiam ŝi kuris sur la vilaĝaj vojoj. Por eviti aliajn, ŝia patro ŝin vekis antaŭ la tagiĝo kaj ili kuradis unu post la alia. "Mia patro estas mia unua trejnisto," ŝi diris.

Kiam ŝi studis en la unua klaso de la mezlernejo, ŝi partoprenis sportkunvenon okazigitan de la lernejo. Por tio ŝia patro aĉetis por ŝi paron da blankaj sportŝuoj. Kiam ŝi gajnis la unuan lokon en la 3 000-metra ebenkuro, ŝi diris: "Mi devas atribui mian sukceson al la blankaj sportŝuoj."

Kiam ŝi studis en la dua klaso, ŝi refoje gajnis la unuan lokon en la 3 000-metra ebenkuro portante la sportŝuojn kaj rompis la gubernian rekordon. Tiam, neniu prenis tion kiel miraklon, eĉ ŝi mem ne rimarkis la latentan forton de siaj piedoj. Poste ŝi lernis en agrikultura mezlernejo, kiu ne respondicis pri laborigo de siaj abiturientoj, kiuj devas reveni hejmen por sin okupi pri terkulturado. Do ŝi ĉesigis sian lernon kaj revenis hejmvilaĝon. Tie ŝi semis, rikoltis sur kampo same kiel aliaj junaj kamparaninoj. Ŝi lerte puŝis solradan ĉareton kun centoj da kg. da pezaĵoj sen ŝanceliĝi. La longdistanca kurado, ŝatata de ŝi, estis tute ignorita.

KAMPARANA MAJSTRO-SPORTISTO

En la lastaj jaroj, dank' al la ekonomia reformo kaj disvolvigo en la kamparo, debutis talentaj kamparanoj kaj eminentaj sportistoj en la kamparoj. En oktobro 1985, la Unua Tutlanda Kamparana Sportkunveno okazis en Ŝandong-provinco. La tieaj kamparanoj-sportamatoroj volis sin montri en sia hejmloko. Kiel gubernia rekordulo, Ŭang ricevis invitilon. Forlasinte la kamplaboron, ŝi veturis al la provinca ĉefurbo por partopreni la streĉan ekzerkadon.

En la sportkunveno, ŝi, knabino neniam trejnita, speciale finis la 3 000-metran kuron per 9'27"4, kiu superis la normon de nacia majstro-sportisto. Kaj ŝi fariĝis la unua kamparana majstro-sportisto de Ĉinio.

Kiel jado elterigita, ŝi interesis

multajn specialajn sportajn sociajn, kiuj sendis invitojn unu post alia esperante, ke ŝi povos eniri en sian vicaron. La trejnisto de la Ŝandong-a teamo de longdistanca kuro haste venis en ŝian hejmon kaj ŝin venigis en sian teamon.

"SEKRETA ARMILO"

La 1-an de oktobro 1986, streĉe iris la virina 10 000-metra ebenkuro de la Azia Sportkunveno, Ŭang Ŝiŭting unue sekvis japanan kaj sudkorean sportistinojn. Kiam ili kuris 6 000 metrojn, ŝi subite pliigis sian rapidecon kaj lasis la japanan sportistinon malantaŭ si je ĉ. 20 m. kaj poste ŝi kuradis ĉiun cirklon per 76 sekundoj. Kiam ŝi la unua atingis la finon, la poentabulo montris 32'47"77. La nova rekordo de Azio kreiĝis.

"Jen sekreta armilo de Ĉinio!" oni tiel komentaris. Ili serĉis ŝian nomon en la nomlisto de la sportistoj, sed ne trovis. Ŝi ja fariĝis membro de la nacia teamo nur du semajnojn antaŭ la konkurso. Oni ne havis tempon por registri ŝian nomon sur la nomliston.

"Kial vi gajnis tiel grandan sukceson en malpli-ol-unujara trejnado?" demandis ĵurnalisto.

"Mi mem ne scias," ŝi honteme klinis sian kapon.

Ŝia trejnisto tamen estis klara pri tiu sekreto. Li eksplikis: "La longdistanca kurado estas peniga, kaj ŝi eltenis la suferojn." Foje, ŝi senhalte kuris 18 km., portante malkonvenajn sportŝuojn. Pro tio, ŝiaj piedfingroj fariĝis nigraj. Alifoje en kampa vetkurado, najlo eniĝis en sian maldekstran piedon, sed kunpremite la dentojn, ŝi ĝin eltiris kaj finis la tutan vetkurdon. Kiam ŝi demetis siajn ŝuojn, oni rimarkis, ke ŝia maldekstra ŝuo estas plena je sangmakuloj.

AL LA NOVA CELO

Post la Azia Sportkunveno, ŝi


revenis al sia gepatra domo. La hejmvilaĝo estis vivoplena kiel en festa tago: Oni forlasis la kamplaboron, la elementa lernejo ĉesigis lecionojn por rigardi la heroinon, kiu kreskis inter ili kaj gajnis gloron por ili. Ŭang Ŝiŭting emociiĝis ĝis larmoj.

En siaj feriaj tagoj ŝi konigis al la kunuloj siajn travivaĵojn dum la konkursoj eksterlande. La vilaĝanoj diris, ke ŝi, silenta knabino, fariĝis senĝena kaj esperplena. Ankaŭ ŝi rimarkis, ke la malgranda montvilaĝo, kiu ŝin nutris, estas aparte aminda.

Ŝi famiĝis. Sed ŝi restas tiel diligenta en la ekzercado kiel antaŭe.

Ŝiaj kamaradoj ŝerce diris, ke ŝi vivas kiel horloĝo, ŝi ĉiam ĝustatempe manĝas, enlitigas kaj sin ekzercas laŭ la postuloj de la trejnisto. Ŝi marŝas antaŭen al nova celo.

Nova rekordo stariĝis! Julie 1987, en la tutlanda atletika sportkunveno ŝi refoje la unua atingis la finon kaj rompis la de ŝi kreitan azian rekordon de la 10 000-metra kurado: Ŝi mallongigis la rekordon je 11 sekundoj. En la Dua Internacia Ĉampionea Atletika Sportkunveno okazigita en Romo, septembre 1987, ŝi konkuris kun la mondnivelaj sportistoj kaj enviciĝis inter la 8 plej fortaj sportistoj de la 10 000-metra ebenkuro de la mondo per 31'48"88, kiu levis la azian rekordon je preskaŭ unu minuto. Novembre 1987 en la Sesa Tutlanda Sportkunveno okazigita en Kantono ŝi levis la azian rekordon, kiun ŝi kreis en la internacia ĉampionea konkurso, je 21 sekundoj. Tiam ŝia atingo egalas al la 6-a loko de la mondo tiuflanke. Julie 1988 en la Internacia Atletika Konkurso okazigita en Norvegio per 32'02"21 ŝi gajnis la trian lokon de la virina 10 000-metra ebenkuro.



Gŭo Ŭejhŭaj kaj lia edzino studas pri kuracarto.

DA ŬEJ:

Antaŭ 192 jaroj iu uŝuist-ostogŭstigisto vojaĝis aliloken. Li grave malsaniĝis en la vilaĝo Ping-le, je 10 km. nordoriente de Lŭo-ĵang, Henan-provinco. Feliĉe, vilaĝano Gŭo Ŝjangtaj venigis lin al sia hejmo, lin zorge flegis kaj kuracis. Dank' al tio li iom post iom resaniĝis. Ĉe la adiaŭo li incis sian savanton pri la arto de ostogŭstigado. De tiam Gŭo Ŝjangtaj laboris super la arto kaj iom post iom famiĝis.

Pri lia ostogŭstigado cirkulis multaj legendoj: Iu disrompis al si oston kaj tute resaniĝis malpli ol unu monaton post kiam Gŭo Ŝjangtaj pinĉis la oston kaj aplikis al ĝi boluson por kunligi la rompitajn ostojn. La kuracado de luksacio de koksosto sentigas nereteneblan doloron, sed li ekpuŝis ĝin per la mano laŭ moviĝo de la korpoparto de paciento, tiel ke la koksosto retrovis al si la antaŭan lokon. Se iu tordis al si lumboston kaj vizitis lin, li do postulis, ke la suferanto staru ĉe muro. Poste li estis bastonanta lin, kaj tiu ĉi pro teruro haste sin movis por eviti la baton, rezulte de tio la paciento sentis sin multe pli bone...

Pasis du jarcentoj kaj la arto de ostogŭstigado propra al Gŭo-familio herediĝis de generacio al generacio ĝis hodiaŭ. En la antaŭa duono de 1988 mi intervjuis Gŭo Ŭejhŭaj, estron de la Lŭoĵang-a

Ostogŭstiga Hospitalo. Li estas unu el la heredintoj de Gŭo-familia ostogŭstigado en la sesa generacio.

La maldika, pli-ol-60-jara Gŭo kun meza kresko kaj luma vizaĝo impresas sobre kaj aplombe.

En 1929 Gŭo Ŭejhŭaj naskiĝis en la ostogŭstigista familio. Kiam li estis 16-jara, lian patron trafis hemiplegio. Li do devigite ĉesigis sian lernadon kaj ekokupiĝis pri kuracado. Li metis liton, seĝon kaj bovlon por medikamentoj sub la malĵunan soforon ĉe sia domo kaj kun sia patrino kuracis pacientojn el diversaj lokoj.

En 1956 fondiĝis ostogŭstiga hospitalo en Lŭoĵang kaj ili ne plu laboris sub la soforo. Kaj en la postaj dekoj da jaroj, dank' al sia kapablo li altigis la arton de ostogŭstigado al nova nivelo. Nun la Lŭoĵang-a Ostogŭstiga Hospitalo havas 700 malsanullitojn, funkciigas instituton kaj gvidas la tutlandan centron de ostogŭstiga fako, kiu respondecas pri instruado de ostogŭstiga instituto. Gŭo estas vicestro de la Ĉina Asocio de Ostogŭstigistoj kaj estis elektita kiel membro de la Kvina kaj Sesa Tutlandaj Popolaj Kongresoj.

Ostogŭstigado estas grava konsistiga parto de la tradicia ĉina medicino, kiu originas el la popola arto de ostogŭstigado de Gŭo-


familio. En la praktiko ĝi sekvis la principon diagnozi kaj kuraci laŭ distingo de simptomoj kaj karakteriziĝas per ĝustigo de rompita osto, deflankiĝo de osto kaj masaĝo, interna kaj ekstera kuracado, kuracado en kombino de movo kaj senmovo kaj alta taksado de funkcia retrovo. En longtempa praktiko la ostogŭstigistoj de Gŭo-familio generacio post generacio disvolvis la arton de tradicia ostogŭstigado kaj resumis spektron da reduktaj kaj fiksjaj manieroj, kiaj skuado kaj frapado, turnado kaj tirado, eltirado kaj streĉado, inkrustado kaj mildigado, puŝado kaj premado, ĝustigado de rompita parto kaj reduktado de frakturo en inversa direkto.

La malnova elartikiĝo de osto ĉiam estas rigardata kiel malfacila problemo en ostologia kliniko. Ĝenerale, estas facile trovi la lokon por artikolo, kiu deflankiĝis antaŭ malpli ol 10 tagoj, sed malfacile antaŭ pli ol 10 tagoj. Ju pli longe daŭras elartikiĝo de osto, des pli malfacile estas redukti ĝin. Asimilante la tradician arton de ostogŭstigado, li kaj aliaj ostogŭstigistoj akiris bonan rezulton en la kuracado de malnova elartikiĝo de osto per kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj.

Ordinare, ili movas anesteziatajn muskolojn kaj ostojn de paciento, faras al li partan masaĝon, aparti-

Ostogustigisto

Gūo Ŭejhūaj



Gūo Ŭejhūaj en kuracado

gas la adherajn molajn histojn ĉirkaŭ artikoj kaj poste retrovas al ĝi la lokon en diversaj manieroj. Laŭ la konsilo de kuracistoj la paciento devas preni ĉinan medicinaĵon por vigligi sangocirkuladon kaj lertigi la artikojn, varmigi aŭ lavi la korpoparton ekster la artikoj per ĉina medicinaĵo por stimuli sangocirkuladon kaj vigligi muskolojn, fiksi al si la ostojn kaj ekzerci ĝian funkcion. Antaŭ pli ol unu jaro Ĝang Ĉengji falis en elartikiĝon de koksosto. Alkroĉiĝis al la ostoj multaj granulomoj kaj la kruroj perdis la konscion. Li estis portita al la hospitalo. Post pli-ol-dumonata kuracado li reakiris al si irkapablon.

Post ricevo de tia kuracado 80% de la pacientoj resaniĝis kaj per tio li malfermis novan vojon al tia kuracado. La scienc-esplora atingo gajnis la premion de la Tutlanda Scienca Konferenco de 1978.

Gūo diris al mi: “En la pasintaj pli ol 100 jaroj, limigite de la objektivaj kondiĉoj, niaj antaŭuloj tiuflanke ne povis akiri kontentigan rezulton en kuracado. Sed nun, dank’ al anestezo kaj radiologio, ni povas kuraci trimonatan elartikiĝon de koksosto kaj ŝultra ostojn kaj 50-tagan deflankiĝon de kubuta artikoj per la manoj. Kompreneble, ni malofte uzas skalpelon en kuracado.”

En praktiko de ostogustigado

Gūo turnas sian atenton ne nur al la rolo de manmanovro, sed ankaŭ al tiu de medikamento. Li resumis la principon prenigi medikamenton en la periodoj frua, meza kaj posta de frakturo. Tio estas, oni devas preni medikamenton ĉefe por forigi sangokoagulaĵon en la frua periodo por stimuli sangocirkuladon kaj vigligi ĝinglulojn en la meza periodo kaj por sin toniki en la posta periodo, ĉar tiam oni jam debiliĝas pro longa malsano. Laŭ liaj spertoj, fortikaj pacientoj, kiuj malsaniĝis antaŭ nelonge malsaniĝintoj devas preni grandan dozon da medikamento por akiri kiel eble plej rapidan efikon; pacientoj kun ordinara sano, kiuj malsaniĝis antaŭ ne tre longe, devas esti kuracataj ne tre forte, nek tre malforte; kaj malfortuloj malsaniĝintaj antaŭ longe devas esti kuracataj milde.

En dekoj da jaroj li gvidis esploradon pri multaj temoj pri ostologio. Inter ili 23 estis premiitaj, ekz-e, “Kuraco de frakturo kun eksteren-turniĝo de humero en kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinaj” gajnis la premion de gravaj scienc-teknikaj atingoj donitan de la Tutlanda Higiena kaj Scienc-teknika Konferenco. Li gvidis la kompiladon de “Kursoj pri Ostogustigado”, “Konciza Ostogustigado” k.a. kun 400 000 ideogramoj. Li riĉiĝis kaj disvolvis la ar-

ton de ostogustigado de Gūo-familio per kombino de la arto kaj modernaj scienco kaj tekniko.

En la hospitalo mi vizitis ankaŭ Ŝje Jaĝing, edzinon de s-ro Gūo, kuracistinon de la hospitalo. Ŝi estas unu el la inventintoj de fiksframo kun levilo. Kiel samgeneracia heredinto de Gūo-familio en ostogustigado, ŝi akumulis riĉajn spertojn pri ostologio en dekoj da jaroj. Ŝi bone posedas la arton de ostogustigado kaj precipe lertas kuraci frakturon de infanoj. Ŝi klarigis al mi la rolon de la fiksframo. Laŭ ŝia diro la frakturo de humero estas ofte vidata. La loko de frakturo estas proksima al artikoj, tial fiksi kaj redukti ĝin estas sufiĉe malfacile. Kunlabore kun aliaj, surbaze de la principo de levilo en dinamiko kaj dank’ al multaj observoj kaj eksperimentoj, ŝi inventis la fiksframon kaj tiel gajnis la premion de higiena kaj scienc-teknika atingo de Henan-provinco en 1985.

De antikve en Ĉinio daŭras la tradicio: Ĉiun arton oni heredigas nur al sia filo sed ne al sia filino, kompreneble absolute ne al fremdulo. Ankaŭ tio ne estis escepto por la antaŭuloj de Gūo Ŭejhūaj. Tamen Gūo Ŭejhūaj kaj liaj samgeneracioj malkaŝis la arton. Sekve de tio, ĝi malfermiĝas al la publiko kaj rapide disvolviĝas.

Sendrogaj Terapioj de la Ĉina Medicino (I)

de ĜANG ĜAŬJUN

En sia kuracado la ĉin-medicinaj kuracistoj uzas ne nur drogojn, sed ankaŭ diversajn sendrogajn terapiojn kun longa historio, gvidate de diagnozado kaj kuracado laŭ distingo de simptomoj. Tiuj terapioj estas akumulitaj kaj hereditaj en longtempa praktiko.

En pratempo, kiel diras legendo, se oni sentis iun korpoparton dolora, oni do stimulis ĝin per polurita pinta ŝtono aŭ plata ŝtonpeco por forigi la suferon. Tiel ĝermis punkturo, kiu disvolviĝis poste en akupunkturajn kaj moksojn. Ĝi estis la plej primitiva sendroga terapio de la ĉina medicino.

En 200 a.K., la fama klasika verko "Hŭangdi Nejĝing" de la ĉina medicino havis detalan registron pri ĝinglŭooj de homa korpo, akupunkturo, punkturo, malpermesoj en punkturo, mokso kaj malpermesoj en mokso.

Julie de 1972, oni fosis tombon de la frua Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.-25 p.K.) en Maŭangduj de la ĉirkaŭurbo de Ĉangŝa, Hunan-provinco, Ĉinio. El la elterigitaj medicinaj libroj estas multaj notoj pri sendrogaj terapioj, kiaj akupunkturo kaj mokso, masaĝo, ĉigong-o, spira kaj fizikekzerca terapio kaj psika terapio.

Krom la supre diritaj, estas ankaŭ terapioj haŭte oleskrapa, kupa, magneta, kota, akva, sabla, arbara, malvarma kaj varma, kiuj havas efikon preventan, kuracan kaj sanigan.


Akupunkturo kaj mokso estas unu el la gravaj sendrogaj terapioj de la ĉina medicino. Ĝi konsistas el punkturo kaj mokso. La antaŭa aplikas speciale faritajn nadlojn piki akupunkturajn punktojn de homa korpo por preventi kaj kuraci malsanojn. Kaj la lasta varmigas per brulanta artemizia moksaĵo akupunkturajn punktojn de ĝinglŭooj por la sama celo. Ambaŭ terapioj havas saman bazon.

Komence, punkturo estis farata per poluritaj plata ŝtonpeco, ŝtonpinglo kaj ostopinglo. En Han-dinastio (206 a.K.-220 p.K.) oni vaste uzis oran aŭ arĝentan nadlon. Kaj nun oni anstataŭe uzas nadlon el korodimuna ŝtalo.

La pasintaj eminentaj ĉin-medicinaj kuracistoj majstris ne nur en droga kuracado, sed ankaŭ plejparte en akupunkturo kaj mokso.

Punkturo povas kuraci multajn malsanojn internajn, kirurgiajn, ginekologiajn, pediatriaajn kaj sensoranajn, precipe sendolorigi. Ĝi povas senigi artikan doloron kaŭzitan de reŭmatismo kaj doloron kaŭzitan de artik-tordo, traŭmato kaj operacio. Ĝi povas mildigi ankaŭ doloron de kapo, dento, brusto, brusta flanko, stomako, abdomeno, lumbalgion kaj dismenoreon. Kaj krome, ĝi povas efike

Ĉin-medicina kuracisto en kuracado



kuraci sunfrapon kaj ŝokon.

Kial pinge piki akupunkturajn punktojn de homa korpo povas kuraci tiel multajn malsanojn?


La teorio de ĉina medicino diras, ke la ĝinglŭo-oj cirkuligas energion kaj sangon, interligas ĉiujn organojn de homa korpo kaj plenumas kun ili normalan funkcion de la korpo. Se iu ajn parto de la korpo malsaniĝas, tio influas la funkcion de ĝinglŭoj. Akupunkturo estas stimuli akupunkturajn punktojn, sensivajn punktojn de ĝinglŭoj. Dank' al tio oni normaligas la funkcion kaj atingas kuracan efikon.

La moderna esploro unuapaŝe konstatis, ke punktura sendolorigo koncernas la nervan sistemon. Dum la pikado oni stimulas dikajn fibrojn de nerva histo, tio estigas acidon, anestezon, pezecon kaj ŝveligon ĉe paciento. Kiam tiuj sentoj atingas mjelon, la dikaj fibroj bridas la doloro-konduktan aktivadon de maldikaj fibroj, ke la dolora sento malfacile atingas la cerbon kaj malfortiĝas la doloro. Kiam sperta ĉin-medicina kuracisto faras pikadon al paciento, la paciento sentas acidon, anestezon, pezecon kaj ŝveligon (ekscito okazas ĉe dikaj fibroj), kaj la kuraca efiko estas bona. Kiam nesperta kuracisto faras la pikadon, la paciento krias je forta doloro (ekscito okazas ĉe maldikaj fibroj), kaj la kuraca efiko estas malbona.

La artemizia buleto uzata en mokso estas herbodrogo kun varmeta naturo. Ĝi estas aroma, porlargiĝa kaj muskolo-trapenetriva. Prilaborita artemizo moliĝas kaj facile brulas, sed sen fajreroj.

Post ricevo de mokso la paciento sentas mildan varmon en la koncerna korp parto, kiu kongestas la haŭton, akcelas ĝinglŭojn kaj sangocirkuladon kaj reguligas la visceran funkcion per ekscitado al akupunkturaj punktoj. Tial, mokso estas ofte uzata por kuraci dolorojn kaŭzitaĵojn de hipofunkcio, kiaj doloro stomaka, abdomena, lumba kaj dorsa, artika kaj menstrua.

Estas du specoj da moksoj, senpera kaj pera. La senpera mokso estas farata per artemizia moksajo



Ĉin-medicina kuracisto en moksado

sur korp parto kaj la pera estas farata kun zingibro, ajlo aŭ salo inter la haŭto kaj brulanta moksajo.

La senpera mokso estas uzata por kuraci astmon, ftizon, limfan tuberkulozon kaj aliajn kronikajn malfacile kuraceblajn malsanojn. La mokso estas jena: Meti pinĉon da artemizia moksajo sur ebenan tabulon kaj knedi ĝin en konuson kun alto de 1 cm. kaj diametro de 0.8 cm. Poste meti la moksajojn sur elektitan akupunkturajn punkton de la paciento kaj ĝin ekbruligi.


La pera mokso estas jena: Meti zingibron, ajlon aŭ salon sub la artemizian konuson kaj sur la akupunkturajn punkton, por ke la brulanta artemizio ne tuŝu la haŭton. Ekz-e, antaŭ ol fari mokson kun zingibro kiel apartigaĵo, oni devas tranĉi zingibron pecon en platetojn kaj fari kelkajn truojn sur ili en la mezo, meti ilin sur la elektitan akupunkturajn punkton. Poste oni devas meti sur ĝin artemizian konuson kaj ekbruligi ĝin. Kiam la paciento sentas brulan doloron, oni devas anstataŭigi la konuson per nova, la brulado daŭru ĝis la haŭto de la korp parto fariĝas ruĝa. La terapio estas uzata plejparte por kuraci gastroenteriton kaj hipofunkciajn malsanojn, kiaj kronika

gastroenterito, polucio, impotenteco, reŭmata artrito k.a.

Krome, ankaŭ la terapio de trieĝa nadlo, terapio de ume-flora nadlo, orel-akupunktura terapio k.a. estas konsistigaj partoj de akupunkturo.

La terapio per trieĝa nadlo alinomiĝas sangellasa terapio. Per trieĝa nadlo oni pikrompas akupunkturajn punkton aŭ malprofundan vejneton sur la korpa surfaco de paciento, ke ĝi ellasu malmultan sangon por atingi kuracan efikon. La terapio vigligas ĝinglŭojn, sangocirkuladon, forigas sangostagnon, febron kaj venenon, mildigas ŝveladon, kvietigas doloron, refreŝigas la menson ktp, tial ĝi uziĝas por kuraci akutajn febrajn malsanojn, kiaj alta febro kaŭzita de ekstera malvarmumo, vomado kaj laksado, sunfrapo, akuta konjunktivito, cerbo-vaskulan sangadon, svenon kaj ŝokon; doloron kaŭzitan de vento, malvarmo kaj humideco kaj sensentiĝon ĉe membraj finoj. Sed tiu terapio estas malpermesita uziĝi al tiuj, kiuj facile sangas, al gravedulinoj kaj akuŝintinoj, al tiuj, kiuj suferas seriozan vundon kaj multe sangis, kaj al malfortuloj ofte suferantaj malfaltan febron kaj anemion.

La orelakupunktura terapio estas metodo piki akupunkturajn



Ginzi

ŬEJ LJAŬ:

“La Sova- ĝa Kam- po”, signi- fa provo de la ĉina opero

Depresio de la ĉina opero en la lastaj dek jaroj maltrankviligis la rigardantojn kaj ĉagrenis la fakulojn. Sed en la lasta aŭtuno, mi havis la ŝancon rigardi operon “La

Sovaĝa Kampo” en la Unua Arta Festivalo de Ĉinio. Mi ĝojiĝis pro la renovigita formo de opero.

Esence ĝi estis la unua opero verkita surbaze de la origina stilo

de okcidenta opero, kiu sukcese uzis la formojn de recitativo kaj ario, esprimis la psikojn de la roloj per kunkantado, plene disvolvis la sendependan esprimovon de la

punktojn sur la oreloj per nadlo dika 1.5-3.0 mm kaj intraderma nadlo aŭ meti specialan herbosemon sur akupunkturajn punktojn de orelo fiksitajn per leŭkoplasto. La terapio donas rapidan efikon.

La teorio de ĉina medicino diras, ke ĉiuj ĝinglŭoj de la homa korpo kondukas al la oreloj. Tial, se iu interna organo aŭ histo malsaniĝas, la malsano montriĝas ĉe la rilata akupunkturaj punktoj de la orelo aŭriklo tra ĝinglŭo. Tiam la akupunkturaj punktoj, ĉe kiu la pa-

ciento sentas klaran doloron je premado, havas malatan rezistancon, aliformiĝas aŭ kolore ŝanĝiĝas. Se tiam oni pikas per nadlo la punkton, tio povas cirkuligi ĝinglŭojn kaj sangon kaj reguligas la visceran funkcion, kaj sekve atingas la kuracajn efikojn.

Eksperimenta esploro de moderna medicino pri la strukturo de orelo aŭriklo konstatis, ke la nervoj de orelo aŭriklo originas el cerbaj nervoj, spinaj nervoj kaj vegetativaj nervoj, kiuj eble estas

gravaj vojoj, interligantaj la orelojn aŭriklojn kaj ĉiuj partoj de homa korpo.


Orelakupunkturaj terapioj kuracas kun bona efiko stomakan kaj abdomenan doloron, lakson, maldigeston, konstipon, vomon, anormalan sangopremon, neŭrastenion, kapdoloron kaj sendormecon. Se oni fiksas herbosemojn per leŭkoplasto sur rilataj akupunkturaj punktoj de orelo aŭriklo, tio ne nur mildiĝas la malsanon de gala litiazo, sed ankaŭ forigas kalkuluson.

orkestro, dum la drasta teatra konflikto estis esprimita ne de interparolado sed de la kompleta efiko de la orkestro kaj voĉmuziko. Dank' al tiuj metodoj ŝanĝiĝis la monotona ŝablono de la ĉina opero konsistanta nur el dramo kaj kantado.

“La Sovaĝa Kampo” estis adaptita laŭ la samtitola dramo de la ĉina dramomajstro Caŭ Ju. La verko rakontas venĝon de kamparano en la dudekaj jaroj de la nuna jarcento: Kompromitite de la tirano Ĝjaŭ Janŭang, kamparano Ĉoŭ Hu, perdis la hejmon kaj estis enkarcerigita. Poste li sukcesis fuĝi el la prizono kaj informiĝis, ke jam mortis la tirano, dum lia amatino Ĝinzi fariĝis edzino de Ĝjaŭ Daŝing, filo de la tirano. Li do decidis venĝi sin kontraŭ la edzino kaj filo de la tirano.

La komponinto de la opero s-ro Ĝin Ŝjang estis kuraĝa en sia komponado. Li ne nur fandis en la ĉinan operon nacian muzikon, sed ankaŭ enkondukis modernajn metodojn de fremdlanda muziko. De la unua noto ĝis la lasta, la opero ĉiam profunde skuis la animon de la rigardantoj per la riĉeco de la figuroj kaj la ekstreme potenca penetrivo.

Ekzemple tuj ĉe la komenco de la opero la komponinto kuraĝe projektis sentekstan kaj preme sufokan ĥoraĵon, kiu kunfandiĝis kun la sovaĝa kampo, tombejo, malserena ĉielo kaj peza nebulo. Tio simbolis la ĝemadon kaj kriadon de la heroo Ĉoŭ Hu, baraktan-



Ĉoŭ Hu kaj Ĝinzi


ta en la fundo de la maljusta socio de la malnova Ĉinio. La disonanca muziko turniĝis en misteran kaj malhelan bildon.

En la opero la trista temo senĉese ripetigita kaj variigita, precipe la dueto en malsamaj tonaloj en la tria akto, klare kaj emocie malkovris la subtilan animstaton de la heroo Ĉoŭ Hu. Dank' al tio la evolvo de la intrigoj, la disvolvo de la karakteroj de la roloj kaj la muziko asimile kunfandiĝis kiel akvo kun lakto.

La opero multe interesis la ri-

gardantojn kaj fakulojn. Antaŭ nelonge personoj de la opera rondo multe diskutis pri la preferinda esprimo de ĉina opero. Ili aŭskultis la operon kaj plejparto el ili opiniis, ke praktiko estas la plej grava, multaj problemoj diskutataj povos esti solvitaj en praktikado.


Antaŭ nelonge mi informiĝis, ke parto de la ĉefaj roluloj de la opero prezentos en Usono sub la gvido de la komponisto s-ro Ĝin Ŝjang. Mi esperas, ke “La Sovaĝa Kampo” radikiĝinta en Ĉinio floros ankaŭ eksterlande.




KARIKATURO

Li batas min...
El la gazeto “Glucks Revue”,
liverita de Felix Baumgart

Porviva spaco







Ĉe rivero

DE ĜU LJANSENG

Knabino ĉe Tajhu-lago

DE JANG MINGJI






Al foiro DE DONG KEGJUN



Reveno de fiŝkaptado DE GANG GENĈJI



En pluveto

DE GAŬ HAJPENG

Knabino kaj kato

DE ĜOŬ SIŬFEN



Redukti aĝon je dek jaroj

(Novelo)

Onidiro trablovis kiel zefiro en la oficejo:

“Oni diras, ke supera instanco publikigos dekreton por redukti ĉies aĝon je dek jaroj!”

“Bela revo!” Ĉiuj dubis pri tio.

“Mi ne devigas vin kredi,” la proklaminto kolere persvadis per fakto, “Post dujara enketado kaj trimonata simpozio ĉinaj aĝo-esploristoj skribis projekton kaj prezentis al supera instanco. Ĝi baldaŭ estos sankciita.”

La dubintoj ekŝanceliĝis:

“Ĉu estas reve? Tio ja estas plej sensacia novaĵo!”

La proklaminto pli certigis:

“La Aĝo-Esplora Asocio konkludis unuanime, ke la dek ĥaosaj jaroj de la ‘kultura revolucio’ vane forrabis de ĉiuj dek jarojn, kaj nun oni devas redukti sian aĝon je dek jaroj...”

Kiel prave! La dubintoj jam preferis kredi:

“Se jes, mi estos do ne 61-jara, sed 51-jara. Ha, kiel feliĉe!”

“Mi estos do ne 58-jara, sed 48-jara, hahaha!”

Kiel ĝojiga novaĵo!”

“Vere saĝa elpensajo!”

La milda zefiro fariĝis ciklono kaj envolvis ĉiujn en la oficejo:

“Ĉu vi aŭdis, ke ĉies aĝo estos reduktita je dek jaroj?”

“Nedubeble, redukti dek jarojn!”

“Redukti dek jarojn!”

La homoj transdiris unu al alia.

Unu horon antaŭ la fino de deĵoro, la oficejo jam fariĝis senhoma.

* * * * *

Apenaŭ atinginte la hejmon, 64-jara Ĝi Ŭenjaŭ laŭte kriis al la kuirejo: “Minghŭa, vi venu!”

“Kio?” aŭdinte la vokon de la edzo, Fang Mingh-

ŭa haste elkuris kun purigataj spinacoj en mano.

Ĝi Ŭenjaŭ staris meze en la ĉambro, kun la manoj sur la koksoj, kaj la mieno plena de kontenteco. Aŭdinte la paŝojn de la edzino, li abrupte turnis sian kapon al la edzino, kun patosa rigardo, kaj diris rezolute:

“Nia ĉambro bezonas rearanĝon. Morgaŭ ni iru mendi novan meblaron.”

La surprizita edzino proksimiĝis al li kaj diris en



mallaŭtigita voĉo:

“Ĉu vi prudentiĝis? Ni havas nur kelkmil dolarojn; kion fari, se la mono forkonsumiĝos?”

“Ba, kion vi scias!” Maljuna Ĝi ruĝiĝis pro mala-probo de la edzino kaj kriis: “Ni havos novan vivon!”

La filo kaj filino samtempe eliris el sia ĉambro, aŭdinte la laŭtan proklamon de la patro. Kio okazis al paĉjo?

“Foriru, ĉi tie ne estas via afero.” Maljuna Ĝi forpelis la gefilojn scivolemajn.

Post tio li fermis la pordon, faris du saltajn paŝojn antaŭen kaj ĉirkaŭprenis la edzinon je ŝiaj diketaĵ ŝultroj. La tenera esprimo de la edzo rara en la dekoj da jaroj post la edziĝo pli surprizis ŝin ol la elpenso aĉeti novan meblaron. Ŝi timis, ke delirus la edzo. Lastatempe la edzo multe ĉagreniĝis, ke li devis forlasi la oficon de buroestro pro la aĝo super la permesata limo. Li neniam montris karesecon tage kaj eĉ en nokto, li nur veadis, kvazaŭ li tute ne sentus la edzinon apude kuŝantan en la lito. Kio okazis hodiaŭ, ke li, jam de pli ol 60 jaroj, imitis la farojn de junuloj en filmo kaj televido? Ŝi ruĝiĝis de honto.

Sed Maljuna Ĝi sentis nenian ĝeniĝon. Liaj okuloj brilis fajre. Li tiris la miran edzinon en siaj brakoj al la liana seĝo kaj sidigis ŝin. Li ĝoje flustris al ŝi ĉe la orelo:

“Mi malkaŝu al vi sekreton. Baldaŭ publikiĝos dekreto, ke ĉies aĝo estos reduktita je dek jaroj.”

“Redukti aĝon je dek jaroj?” La spinacoj falis el ŝia mano. Ŝi larĝe malfermis la okulojn pro surpriziĝo:

“Mia ĉielo, ĉu vere?”

“Jes, tute vere, baldaŭ publikiĝos la dekreto!”

“Ho, mia ĉielo!” Fang Minghŭa ekstarigis, subkonscie ĉirkaŭbrakumis la edzon je liaj ostaj ŝultroj, fulme kisis lin sur lia longa vango. Ŝi miris de sia faro, kia okazis jam antaŭ tridek jaroj. Maljuna Ĝi ŝtoniĝis momenton pro la atako, kaptis la edzinon je la manoj kaj faris kun ŝi rotaciadojn en la ĉambro.

“Aj, mi kapturiga!” Fang Minghŭa fine liberiĝis siajn manojn el la liaj kaj frapetis sur sia pufa brusto, kaj nur tiam haltis la gaja turnado.

“Nu, Hŭa, vi diru, ĉu ni ne devas aĉeti novan meblaron?” Maljuna Ĝi memfide rigardis al la edzino jam rejuniĝinta en la aspekto.

“Jes, necese!” Flagris ŝiaj grandaj okuloj.

“Ĉu ni ne devas rekomenci la vivon?”

“Absolute!” ŝi respondis en tremetanta voĉo, kun larmoj ĉe la okulanguloj.

Maljuna Ĝi sidiĝis en malgrandan sofion, fermis la okulojn. Ondiĝis en lia cerbo tre diversaj pensoj.

Subite li malfermis la okulojn kaj diris kategorie:

“Nia privata vivo tamen estas bagatelo. Pli ĝojige estas, ke mi havos la ŝancon labori pliajn dek jarojn. Mi decidas ŝanĝi la fizionomion de la oficejo. La personaro estas sendisciplina; la estro de la oficeja kabineto ne taŭgas por la posteno; la ŝoforoj estas tro malĝentilaj kaj arogantaj...”

Li skuis la brakojn, kaj la larĝaj okuloj eljetis brilon pro la nesubigebla ekscitiĝo:

“Estas necese nomumi novan gvidantaron. La nuna gvidantaro ne estas kontentiga, inter la blinduloj regas strabuloj. Ĝang Mingming estas naive pedanta, sensperta por la ofico. En la dek jaroj mi devos havi novan gvidantaron senescepte el junuloj, el la novvenintoj, studentoj jus diplomitaj. Prefere ili estu 23-24-jaraj, kaj mi povos helpi ilin dek jarojn...”

Sed la edzino ne interesiĝis pri lia gvidantaro. Ŝi dronis en bela imago pri la estonta vivo.

“Mi volas ŝanĝi ankaŭ la sofojn.”

“Jes, anstataŭigu per modaj.”

“Mi volas molan matracon.”

“Tute prave. Ĝis nun ni havas nur malmolan litkusenon kaj ni devas havi molan komfortan matracon.”

“Sed la mono...”

“Mono estas bagatelo,” Ĝi Ŭenjaŭ, malproksimvida, diris en braveco: “Pli grave estos, ke ni akiros pliajn dek jarojn. Tempo ja estas neakirebla kontraŭ ajna sumo da mono!”

Kiam ili interparolis kun granda ekscitiĝo, la filino malfermetis la pordon kaj demandis: “Panjo, kion ni havos por vespermanĝo?”

“Preparu laŭ via plaĉo.” Fang Minghŭa respondis senzorge, komplete forgesante la preparadon de vespermanĝo.

“Ne,” Maljuna Ĝi skuis la manon kaj decidis: “Hodiaŭ ni havu vespermanĝon en restoracio. Mi regalau vin per rostita anaso. Vi kaj via frato iru mendu lokojn, mi kaj via patrino ekiros post momento.”

Kiel ĝojiga afero por la filino. Sen demandi pli detale, ŝi flugis al la frato.

La gefratoj rapidis al la restoracio interparolante survoje. La frato konjektis, ke eble la patro daŭre restos sur la ofico de buroestro, kaj la filino konjektis, ke la patro estis promociita. Kompreneble ili neniel povis diveni la enigmon.

Maljuna Ĝi kaj la edzino daŭre interparolis hejme.

“Hŭa, vi devas tualeti. Post la redukto vi aĝos nur 48 jarojn!”

“Mi? 48-jara?” Fang Minghŭa murmuretis al si

kvazaŭ en sonĝo. Ŝia vigla juneco malaperinta antaŭ longe nun denove pulsas en ŝia korpo, kio ŝin konsternis.

“Morgaŭ vi aĉetu por vi printempan mantelon en flava koloro.” Maljuna Ĝi ekzamine rigardis la streĉitan grizan uniformon de la edzino, kategorie kaj proteste diris: “Kial al ni ne decas vesti nin per modaj vestoj? Atentu, post vespermanĝo mi tuj aĉetos jakon de itala fasono, kian havas Ĝang Mingming. Li aĝas 49 jarojn; kial li povas vesti sin per tia jako, dum mi ne?”

“Jes!” Fang Minghŭa fingre kombis al si la senbrilajn, sekajn kaj malordajn grizajn harojn kaj diris: “Mi nigrigos la harojn kaj vizitos luksan beligejon. Hm, junuloj ĉikanas, ke ni estas konservativaj. Se ni rejuniĝos je dek jaroj, ni aranĝos nian vivon pli estetika ol ili...”

Maljuna Ĝi ekstaris kaj laŭte respondis:

“Jes, ni devas bone aranĝi la vivon. Ni vojaĝos al la montoj Hŭangŝan kaj Luŝan, al la pitoreskejo Ĝoŭĝajgoŭ. Ni vojaĝos al maro malgraŭ ke ni ne scipovas naĝi. Aĝo de 50 jaroj estas tre taŭga; ve, antaŭe ni tute neglektis la aranĝon de la vivo.”

Anstataŭ suspiri, Fang Minghŭa kalkuladis: “Post redukto de dek jaroj mi estos 49-jara, kaj mi povos daŭre labori almenaŭ ses jarojn antaŭ emeritiĝo. Mi plenumos la oficon pli konsciencie.”

“Kio?” hezitis Maljuna Ĝi.

“Ses jarojn, jes, mi povos labori ankoraŭ ses jarojn.” Fang Minghŭa ankoraŭ restis en ekscitiĝo.

“Vi... vi ne laboru plu,” Ĝi Ŭenjaŭ malaprobis, “Vi fartas nebone...”

“Sed mi fartas tre bone,” Fang Minghŭa montriĝis energioplena, opiniante sin bonfarta.

“Kiu plenumos la dommastrumadon, se vi ne forlasos la oficon?”

“Ni havu servistinon.”

“Ej, la nunaj servistinoj estas senkonsciencaj. Ĉu ni povas konfidi al tia servistino la domon?”

Hezitiĝis Fang Minghŭa.


“Krome, vi jam emeritiĝis, kaj ne devas reveni al la ofico. Ĉu ne estiĝus haoso, se ĉiuj emerituloj revenus al la ofico?” Tion dirante Ĝi Ŭenjaŭ pretervole frostotremis.

“Tion mi ne zorgas. Mi povos labori ankoraŭ ses jarojn,” insistis Fang Minghŭa, “se vi ne lasos min reveni en la buroon, mi havu oficon alie, eble en iu kompanio.”

“Sed nun aperis tro multaj kompanioj kaj tie ĉiam regas malordo.

“Mi iros ĝuste por forigi la malordon.”

“Vi mem decidu.”



Gajigis Fang Minghŭa la kapjeso de Maljuna Ĝi, kvazaŭ sankcio de estro de personara departemento:

“Kiel bone! La Esplora Asocio plej bone komprenas nin. Rejuniĝinte je dek jaroj, ni povos rekomenci ĉion. Neatendita feliĉo!”

“Sed mi atendis, mi atendis eĉ en sonĝo!” Denove ekscitiĝis Maljuna Ĝi: “La ‘kultura revolucio’ vaniĝis miajn dek jarojn. Ho, dek jaroj! Kiom da laboroj oni povas fari en dek jaroj? Sed vane pasis dek jaroj kaj mi rikoltis nur grizajn harojn kaj multajn malsanojn. Kiu kompensas miajn perdojn? Ĉu mi mem? Sed kial mi mem? Redonu al mi la junecon, la dek jarojn. Kiel kompetente laboris la asocio, ĝi jam devus enketi kaj esplori tion pli frue.”

Fang Minghūa timis, ke la edzo rememoros la suferojn en la pasinteco, kaj turnis lin de la temo:

“Nu, ni iru al la restoracio!”

* * * * *

Kiel humoris la 49-jara Ĝang Mingming? Ĉu en humoro gaja aŭ zorgoplena? Ĉu dolĉa aŭ amara? Li mem ne povis ekspliki. Ŝajne mikstajn sentojn li havis, sed neniu el ili li povis distingi.

Li ĝojigis, ke la aĝo estos reduktita je dek jaroj. Estante sciencisto li bone scias la valoron de tempo. Dek jaroj estis senkompare valoraj por mezaĝaj intelektuloj ĉirkaŭ 50-jaraj. Laŭ eksterlandaj raportoj, nemalmultaj distingiĝe sukcesis kaj impone impresis sur internacia simpozio en sia aĝo de dudek kelke da jaroj kaj fariĝis mondfamaj kompetentuloj per avangarda sukceso en sia kampo. Dum Ĝang Mingming, elstara lernanto en universitato, esperdona lernanto en la okuloj de la instruisto, venis en la mondon sub malfavora stelo. En la “kultura revolucio” li estis sendita en la kamparon por terkulturado. Kiam li revenis en la urbon, li sentis sin tute fremda al la lernitaj scioj, kaj tremetadis jam la manoj. Nun li akiros dek jarojn, kaj li povos rekomenci sian kareeron. Kaj krome, li povos utiligi la dek jarojn kiel dudek jarojn en la premiso de pli profunda absorbiĝo en la esplorado de sia fako. Espereble li povos sufiĉe disvolvi sian talenton en la pioniraj sciencaj laboroj de la mondo.

Li sentis ĝojon same kiel la aliaj kaj eĉ pli.

Sed lia kolego diris al li frapetante al li sur la ŝultro:

“Maljuna Ĝang, kial vi tiel ĝojas?”

“Kial ne?” Li ne povis kompreni, ke li ne devus ĝoji.

“Post redukto je dek jaroj Ĝi Ŭenjaŭ aĝos 54 jarojn, li ne bezonos do forlasi la oficon, kaj konsekvence perdiĝos via ŝanco por enoficiĝi kiel bur-estro.”

Ho jes, post redukto de dek jaroj Ĝi Ŭenjaŭ certe ne forlasos la oficon, do Ĝang Mingming ne povos anstataŭi lin kaj restos inĝeniero sin fermanta en biblioteko kaj laboratorio...

Sed antaŭ kelke da tagoj oni vokis lin al la ministerio kaj diris al li, ke Maljuna Ĝi devas forlasi la oficon pro la granda aĝo, ke li estos la estro de la buroo... Ĉu nun ankoraŭ validas la decido?

Sed fakte li ne volis esti estro. En lia kariertabelo lia plej alta rango estis grupestro. Li neniam ambiciis promociiĝon kaj la rangon de bur-estro. Lia unika ŝato estis librolegado. En la “kultura revolucio” li sin fermis en laboratorio kaj neniu alparolis.

Sed kiam oni estis preparantaj por nomumi novan gvidantaron, Ĝang Mingming estis vaste preferata en pluraj opiniosondoj, same kiel li ĉiam okupis

unu el la unuaj tri lokoj en la lernejoj jaroj. Ĉi-foje li estas venigita al la ministerio, kaj neŝangeble decidiĝis lia promociiĝo. Tamen Ĝang Mingming neniel povis rememori, en kiu okazo kaj en kiu afero li montris talenton necesan por gvidanto, ke li estis alte taksata kaj ŝatata de la gvidantoj kaj la kolegoj. Ju pli li pensis, des pli li hontis. Li ne estis kompetenta rilate administradon nek gvidadon.

Lia edzino Ŝjue Minĵu ne estis bela nek saĝa, tamen tre taŭga edzino. Ŝi klare scias pri la afero de la edzo, kaj eĉ la aferoj en lia oficejo! Ŝi diris nun al la edzo:

“Via elekto dependas ĝuste de via netaŭgeco por la ofico.”

Miris Ĝang Mingming: Kia absurda logiko! Sed post pripenso li iom konsentis kun la edzino. Eble ĝuste pro liaj sensperteco, hezitemo kaj sindeteno en konkuro por potenco, oni ne bezonis sin gardi kontraŭ li.

Komprenoble iuj malaprobis. Oni diris, ke foje en la kunveno de la partikomitato de la buroo la kunvenantoj disputis duontagon pri la “problemoj” de Ĝang Mingming. Li ne sciis, pri kio ili disputis, kaj li ne sciis ankaŭ, kiajn “problemojn” li estigis. Li nur eksentis, ke de tiam li fariĝis “disputata” homo.

En la senĉesaj opiniosondoj kaj disputado Ĝang Mingming kutimiĝis al sia rolo, kutimiĝis esti rigardata kiel “promociota” homo. Li iam eĉ venis al la memfido, ke li povos bone plenumi la rolon, malgraŭ ke antaŭe li neniam estis bur-estro.

“Estu trankvila en via bur-estra ofico,” diris Minĵu, “ĉar la rango ne estis ĉasita de vi mem. Estante bur-estro, vi ne bezonos almenaŭ iri al la oficejo per superplena aŭtobuso.”

Sed nun li ne povis esti bur-estro. Ĉu bedaŭrindaĵo? Jes, sed ne granda. Li ne povis ekspliki sian senton.

Li revenis hejmen kun tia sento.

“Vi revenas ie ĝusta tempo. Vespermanĝo estas preta.” La edzino iris el la kuirejo kun du pladoj kaj bovlo da supo.

“La apio estas tre delikata,” diris Ĝang Mingming, “Ĉu ne multe kostas? Ĵurnalo diras, ke apio kuracas hipertension.”

Anstataŭ respondi la edzino nur ridetis.

“La supo estas tre bongusta.”

La edzino ankoraŭ silentis.

“La porkaĵo stufita kun sekigita brasiko estas...” Ĝang Mingming daŭre laŭdis la pladojn, kvazaŭ li estus gastronomo.

Nun la edzino bremsis lian laŭdadon:

“Kio okazis al vi hodiaŭ?”

(Daŭrigo sur p.66)

Naskiĝo de Ci-o kaj Hŭaĝjan-skolaj Ci-istoj

de MEJ ĜI

La ci-oj estas nova speco de poemoj aperinta en Tang-dinastio. Ili estas nenio alia ol tekstoj de kantoj adaptitaj al muziko. Tial ilia naskiĝo kaj evoluo havis intiman rilaton kun muziko.

La prospero de urba ekonomio de Tang-dinastio akcelis la kontaktigon inter la landinterno kaj landlimaj nacimalplimultaj regionoj de Ĉinio. Tiam muziko de la okcidentaj nacimalplimultaj regionoj de Ĉinio multe enkondukiĝis en la internajn lokojn, ĝi kun multaj melodioj furoris kaj en la palaco kaj inter la popolanoj. Krome, en Tang-dinastio furoris ankaŭ la popolaj muzikaĵoj, nome tiuj strataj. Tiam en grandaj urboj estis multaj kantistinoj kaj muzikistoj. La tekstoj de iliaj kantoj ĝenerale estis tiuj de popularaj kantoj aŭ poemoj. Por akomodi la tekstojn al la muzikaj taktoj, ili adaptis aŭ verkis kanto-tekstojn kun malsamlongaj versoj. Tiel la ci-oj kiel literatura formo aperis unue ĉe la popolo.

Ĉar ci-oj devis esti kantataj laŭ certa ario, tial ili postulis rigorajn skemojn pri metriko kaj versoj. Ili havis multajn ariojn, ĉiu kun aparta nomo kaj fiksitaj versoj, dum ĉiu verso havis fiksitajn nombrojn da silaboj, ĉar ĝenerale ĉiu ĉina ideogramo havas unu sonon, tio fakte signifas fiksitajn nombrojn da vortoj. Ĉiu aparta ario havis siajn specialajn ritmon kaj rim-aranĝon. Tial oni devis verki ci-ojn laŭ iliaj malsamaj formuloj. La ci-o ĝenerale konsistas el supra kaj malsupra partoj por ripeti la muzikaĵon. Iuj ci-oj dividiĝas eĉ en tri aŭ kvar pecojn. Ilin oni nomas longaj arioj. Estis ankaŭ iuj, kiuj havas nur unu parton, ilin oni nomas malgrandaj arioj.

Ci-oj de Tang-dinastio aperis tre frue en la popolo. La nun konataj plej fruaj ci-oj de Tang-dinastio estas arioj en Dunhŭang. Ili ĝenerale havas simplan kaj naturan stilon, sinceran kaj klaran senton, saturiĝis de forta etoso de la vivo. Ili plejparte prezentas amon. Ekz., "Laŭ melodio Ŭangĝjangjŭe" priskribas, ke iu virino sopiras sian amaton, noktomeze rigardante la lunon. La ci-o prezentas ŝian profundan plendon:

*La lun'sur la ĉielo
Similas al arĝent-telero.
Profundas nokt', fortiĝas vento,
Forpelu l' nubojn, ke en lumo hela
Montriĝu l' viro malfidela.*

Ankaŭ "Laŭ melodio Ŭangĝjangnan" estas simila

ci-o. Ĝi priskribas mizeran sorton de amoro, komparante ŝian humiligitan vivon kun debranĉigita saliko por elverŝi ŝian ĉagrenon. Ĝi tekstas jene:

*Ne tuŝu min,
Ĉar tio estas malsincera.
Mi estas ja saliko ĉe-Ĉjuĝjang-rivera,
Kaj miajn branĉojn iuj fleksas kaj karesas
Kun amo efemera.*

Troviĝas ankaŭ ci-oj de Dunhŭang pri milito, sed pli multaj pri urba vivo, amoro, amsopiro inter viroj kaj virinoj.

El la literaturistoj de Tang-dinastio, Daj Ŝulun, Ŭej Jing'u, Liŭ Juŝji, Baj Ĝjuji, Ĝang Ĝihe kaj aliaj pli frue komencis verkadon de ci-oj. Sed ili verkis malmulte kaj prezentis malvastan vivon. En la komenca periodo de la verkado ili estis influataj de la popolaj arioj aŭ inspirataj rekte de ili, tial iliaj verkoj havis freŝan, klaran kaj viglan trajton. Ekz., "Laŭ melodio Jugezi" de Ĝang Ĝihe tekstas jene:

Ardeoj flugas antaŭ Ŝjisaj-monto,



*Grasdikas fiŝoj en la flor-rivero.
Kun pajlĉapelo,
En pluvmantelo,
Mi fiŝas spite al la pluvvetero.*

“Laŭ melodio Jiĝjangnan” de Baj Ĝjuji

*La suda lando belas —
Pejzaĝoj ĝiaj restas en memoro.
Ĉe la riveroj flamas floroj en aŭroro,
Printempaj akvoj smerald-blue verdas.
Ĉu povas ne sopiri pri ĝi mia koro?*

“Ŝjaŭŝjangŝen” de Liŭ Juŝji

*Makulbambuoj,
Makulbambuoj,
Ja amsopiron montras per la larmmakuloj.
Ĉu landa gasto volas aŭdi liran plendon,
En luna nokto, ĉe Ŝjangĝjang-a fluo.*

Baj Ĝjuji kaj Liŭ Juŝji estis kompare fekundaj ci-istoj en la meza periodo de Tang-dinastio. Ankaŭ “Laŭ melodio Ĉangŝjangsi” de Baj Ĝjuji estis tre eminenta.

La du “Laŭ melodio Tjaŭŝjaŭling” de Ŭej Jing’u kaj Daj Ŝulun estis la plej fruaj ci-oj priskribantaj landliman pejzaĝon. Tiu de Ŭej legiĝas jene:

*Ĉevalo huna,
Ĉevalo huna,
Ĉe Janĝi-monto paŝte diligentas,
Galopas sable, neĝe, henas ĝi solecan senton,
Rigardas dekstren kaj maldekstren— perdis
l’ orienton.
Krepusko sur la stepo sin etendas...*

Ĝi figure komparas senhejman soldaton, gardantan malproksiman landlimon, kun huna ĉevalo. Tiu de Daj Ŝulun prezentas malkontentan plendon de soldatoj longe gardantaj la landlimon per neĝo kaj luno. Ĝi tekstas jene:

*Landlimaj herboj,
Landlimaj herboj,
Soldatoj maljuniĝas je la herbelĉerpo.
Post la neĝado sude-norde de la monto,
La luno super vasta stepo brilas.
La luno brilas,
La luno brilas.
Jen hunaj kornotonoj koron ŝiras.*

El la ci-oj de Tang-dinastio troviĝas du vaste cirkulantaj verkoj “Laŭ melodio Pusaman” kaj “Laŭ melodio Jiĉin’e”. Laŭdire, ili estis verkoj de granda poeto Li Baj, sed pri tio oni ne trovis fidindan ateston. Ilia ideo estis ampleksa kaj sento profunda. Evidente ili superis multajn aliajn ci-ojn de la meza kaj posta periodoj de Tang-dinastio. Precipe la du versoj el la lasta “Jiĉin’e”

*En vent’ okcidenta la suno subira
Prilumas la tombojn de Han-imperio.*

Ili klare bildigis la iom-post-ioman kadukiĝantan Tang-imperion. Multaj personoj en la historio suspiris emocie, deklamante ĝin.

Post la meza periodo de Tang-dinastio, pli kaj pli

multaj literaturistoj verkis ci-ojn. Ŭen Tingjun (812? - 870? p.K.) estis ci-isto, kiu verkis plej multe siatempe kaj havis plej grandan influon al posteuloj. Li devenis de dekadenca nobela familio. Kvankam li verkis facile, tamen li malsukcesis en oficistigo. Sekve de tio, li ofte vizitis bordelojn kaj pro tio estis malrespektata de tiamaj burokratoj. Li vivis malfacile kaj nur en la maljuna aĝo funkciis kiel asistanto de profesoro de Ĝuozigjan — la plej alta lernejo de la ŝtato. Liaj poemoj kun pimpa stilo estis famaj same kiel tiuj de Li Ŝangjin, sed pli klare esprimis liajn personajn malfeliĉojn kaj malmulte respegulis aktualaĵojn. Li, lerta en prozodioj, bone konis melodiojn de ci-oj, tial li akiris pli grandajn sukcesojn en ci-verkado kaj superis aliajn ci-istojn tiuflanke. Nun troviĝas pli ol 60 ci-oj de Ŭen Tingjun, kies plejparto priskribas aspekton, vestadon kaj sintenon de virinoj. Ekz., “Laŭ melodio Puŝaman” priskribas ĵus vekigintan virinon en tualetado. Li per subtila priskribado montris ŝian pimpan kaj maldiligentan aspekton. Ĝi, kiel ĉefverko de Ŭen Tingjun, tekstas jene:

*La ora sun’ briligas la ekranojn,
Tempiharar’ invadas la neĝvangojn.
Ŝi ellitiĝis tarde, pentras la brovarkojn
Kaj entreprenas tualetofaron.
Inter speguloj ŝi aranĝas floron sian —
La floro kaj l’ vizaĝ’ beligas unu la alian.
Broditan jakon novan portas la virino.
Desegno ĝia? Oraj frankolinaj.*

Alia ci-o “Laŭ melodio Ŭangĝjangnan” priskribas iun virinon:

*Fininte l’ tualeton,
Ŝi sola sin apogis en rivera turo.
Mil veloj preterpasis — lia ne vidigis!
En vespersuno kaj rivermurmuro,
Ĉe Bajpingĝoŭ ŝi afliktiĝis.*

La similaj ci-oj havis sentimentalajn priskribojn.

Ŭen Tingjun estis lerta en prezentado de homa sento per priskribado de pejzaĝoj. Ekz., la versoj

*Ŝi ornamiĝas inter speguloj,
Konkuras floroj kaj ŝia vizaĝo.*

ne nur priskribas la heroinon belan kiel floro, sed ankaŭ aludas ŝian sorton similan al floro baldaŭ velkonta. La ci-o rakontas, ke la virino ĉe la vestiĝo vidis sur la vesto paroĵojn de oraj frankolinaj. Per tio la aŭtoro aludis ŝian solecon. En tio oni trovas, kial ŝi malfrue ellitiĝis. De tie oni trovis alian trajton de ci-oj de Ŭen, nome implicon. Li ofte aplikis komparaĵojn por fari siajn ci-ojn pensigaj. Sed liaj ci-oj ĉefe temas pri virina vivo, la versoj estas tro subtile poluritaj kaj la sento febla. Tiuj trajtoj multe influis la postajn ci-ojn. La t.n. Hŭaĝjan-a skolo formiĝis ĝuste sub tiu influo.

Ĝaŭ Ĉongzŭo de la Posta Ŝu-regno (ĉ.902 - 979) en la periodo de la Kvin Dinastioj elektis ci-ojn de Ŭen Tingjun, Hŭangpu Song, Ŭej Ĝuang kaj aliaj 15 ci-istoj kaj kompilis ilin en “Hŭaĝjan-kolekton”. La 18 ci-istoj havis saman stilon en la verkado, tial

EL LAŬMELODIAJ VERSAĴOJ DE TANG-DINASTIO

Laŭ pusaman

de LI BAJ

*L' arbaro vasta en nebul' al silka gaz' similas,
la frosta montoĉena verd' ĉagrenan senton spiras.
Vesperkrepusko en domegon venas,
karulon en etaĝo ĝi ĉagrenas.*

*Ĉe l' ŝtonŝtuparo staras hom' rigide,
al sia nesto flugas bird' rapide.
Sed kiu loko ja atendas lin?
Nur la kioskoj ĉangting kaj kioskoj dŭanting¹.*

Laŭ ĉangŝjangsi

de BAJ ĜJUJI

*Fluadas Bjan-rivero,
fluadas Si-rivero,
fluadas al l' antikva Gŭaĝoŭ la pramejo.
La montoj de U² en ĉagreno.*

*Senfinas la sopiro,
senfinas la ĉagreno,
kaj la ĉagreno ja finiĝos nur post la reveno.
Sur la balkono ŝi rigardas al la luna helo.*

Laŭ gengloŭzi

de ŬEN TINGJUN

*Incens' en vaz' juvela,
larmado ruĝkandela,
aŭtun' ĉagrena en salono mia bela.
La brovopentro svena,*


1. canging kaj duanting estis kioskoj en antikva Ĉinio konstruitaj apud vojoj por ripozo de irantoj.

2. U estis nomo de regiono kovranta parte la provincojn Ĝjangsu, Anhuj kaj Ĝegjang.

oni nomas ilin Hŭaĝjan-skolo. Ŭen Tingjun estis ĝia iniciatinto.

El la ci-istoj de Hŭaĝjan-skolo, Ŭej Ĝŭang (836? - 910) estis fama same kiel Ŭen Tingjun. Ankaŭ liaj ci-oj temis ĉefe pri virinoj kaj amo, sed la stilo de liaj verkoj estis gracia, diferenca de la pompo kaj tenero de la ci-oj de Ŭen. Ankaŭ la lingvo estis relative klara kaj natura. Ekz., lia ci-o "Laŭ melodio Sidiŝjang" skize priskribas strebon de naiva knabino al la amo kaj feliĉo. La figuro estas versimila:

*Ekskurs' en primavero.
Abrikotfloroj en prospero.
Kiu junulo sur kampvojo plej amindas,
Al li mi edziniĝu kun espero.
Eĉ se li min forlasus perfidule,
Mi restus en fidelo.*



*tempihararo ĝena,
en longa nokt' kun frido kapkusena.
Jen firmian-susuro³
en noktomeza pluvo
ĉagrenas vere pro foresto de l' karulo.
Susuro de folioj,
gutada melodio
ĉe l' ŝtupoj daŭras ĝis aŭrora strio.*

Esperantigitaj de LAŬLUM

3. Firmiano (Firmiana simplex) estas largfolia flora arbo tauga por beligi gardenon.

Lia alia ci-o "Laŭ melodio Njugŭanzi" havas sinceran kaj emocian priskribon:

*Hodiaŭ estas la 17-a de l' monato kvara.
En sama dato pasintjara,
Ni ĝis-revidon diris.
Ŝajnge mi mallevis la okulojn
Kun larmoj, kaj la brovojn mi kuntiris.
Ne sciis vi, ke tio l' koron ŝiris.
Nur en la sonĝoj mi vin sekve iris.
Escepte de la lun' sur la ĉielo,
Neniu scias pri l' sufero!*

Ŭej Ĝŭang verkis kvin ci-ojn "Laŭ Pusaman" kun simila stilo por rekte esprimi sian senton. Ili priskribas serenajn kaj pitoreskajn pejzaĝojn kaj donas belan ĝuon. Unuvorte, la arta sukceso de Ŭej Ĝŭang en ci-verkado estis pli granda inter la Hŭaĝjan-skolaj ci-istoj.

Ora Ĉevalbreda Insulo

La Ĉevalbreda Insulo kun areo de dek km² situas en la Flava Maro 7.5 km norde de la gubernia urbo Muping, kiu estas en la orienta parto de Ŝandong-duoninsulo.

Legendo diras, ke aŭtune de 219 a.K. la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio inspektis la insuleton kaj trovis ke tie la klimato estas tre milda, prosperas arboj kaj herboj kaj belas pejzaĝoj. La imperiestro ordonis, ke oni bredu ĉevalojn sur la insuleto. Kaj pro tio la insuleto ricevis la nomon Ĉevalbreda Insulo.

La insuleto ondanta kliniĝas de okcidente orienten. Ĉe ĝia norda ekstremo estas krutaj rokmuoj frontantaj al la maro, groteskaj

rifoj elstariĝis el akvo, kvazaŭ ora drako enmariĝus kaj lotusofloroj elakviĝus. Oriente, inter la verda insuleto kaj la maro sterniĝas ora ebena plaĝo kun akvo ondetanta kaj klara kiel brilanta brokaĵo. Tie produktiĝas famaj salikolo, tripango, pekteno, krabo kaj rara "cigna ovo" (*Saxidomus purpuratus*). Sur la insuleto estas 13 naturaj vilaĝoj kun 5 100 loĝantoj.

Kvankam ĝi estas ĉarma, tamen alvenis malofte turistoj, pro manko de porvivaj instalaĵoj sur la insuleto. La reformado alportas al ĝi viklecon. En 1983 la registaro de Muping-gubernio decidis ekspluati la Ĉevalbredan Insulon kaj invitis specialistojn fari al ĝi esploron por konstrui la insuleton en lokon por

sporta konkurso, kultura kaj scienc-teknika aktivado, turismo, ripozo kaj kunveno.

En 1984 la registaro investis grandan monsumon por instali subteran tubon kun longeco de 20 km. por provizi la loĝantojn per dolĉa akvo. Post tio oni konstruis transformatoran stacion, kiu havigis luman nokton al la insuleto. Por plibonigi la trafikon la registaro konstruigis asfaltitan ŝoseon pli ol 10 km. longan. La ŝoseo interligis la kontinenton kaj la insuleton. Ankaŭ 33 vojoj inter la vilaĝoj estas rekonstruitaj. Tie servas 14 restoracioj de marproduktaĵoj kaj lunĉejoj de lokaj etmangaĵoj. La insuleto havas sian frid-staplon kun rezerva povo de mil tunoj, kiu ebligas al la turistoj tutjare manĝi freŝajn marproduktaĵojn.

En 1985, la insuleto konstruis unuaklasan ĉevalkonkursejon kun areo de 150 000 m², kiu povas akcepti 10 000 spektatorojn. Ĝi jam sukcese traktis interkonsenton okazigi tie internacian konkurson de ĉevalkuro. Tie okazis ankaŭ rajdarta konkurso, motorobicikla kampa konkurso kaj tutlanda sagpafa ĉampioneca konkurso de la Sesa Tutlanda Sportkunveno de Ĉinio. En senkonkursa tempo ĝi servas al ĉevalkur-amatoroj.

Oriente de la insulo troviĝas mar-banejo kun areo de ĉ. 70 hektaroj. La ebena banejo kun subtila sablo kaj klara akvo allogas ĉiujare al si pli ol cent mil turistojn. Nun la banejo sin armas per kompletaj ekipaĵoj, baraĵo sude de la banejo longa 60 m. kaj larĝa 8 m. protektas sekurecon de banantoj.

Nova hotelo





Ĉemara banejo

Pasis nur kelkaj jaroj, la Ĉevalbreda Insulo ĉiujare allogas multnombrajn turistojn per siaj novaj instalaĵoj. Nun tie funkcias dekoj da hoteloj, trejna centro kaj sanatorioj. La gubernia registaro

de Muping nun komencas efektiviĝi sian novan 1990-jaran ekspluatplanon: plikonstrui la kazon por ke ĝi povu akcepti 5 000-tonelan ŝipon, konstrui ĉirkaŭinsulan ŝoseon 22 km. longan,

munti program-regan telefonion kun 500 telefonoj kaj plue konstrui dek pejzaĝajn konstruaĵojn, i.a.ond-rigardan pavilonon kaj parkon. Post nelonge la insuleto fariĝos pli ĉarma kaj alloga.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: unu internacia respondkupono por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* E-kurso kolektos ilus. pk. tutmondajn por funkciigi en 1989 ekspozicion de ĉiulandaj pejzaĝoj, reciprokos per ĉinaj ilus. pk. kaj fotoj pri ekspozicio. Adr.: Wangming, Jiangyin, Shengang Zhongxin

Xiaoxue, Jiangsu, 214443 China.

* Felix Gomez Martin, Hispanio, sciigas kun profunda malĝojo al ĉiuj siaj amikoj, ke lia edzino Eduvigis Julia mortis la 25-an julio, 1988.

* 20 geesperantistoj (20-60j.) el Czesochowa volas kor. kun geesperantistoj en Ĉinio, Japanio, Hong-Kong kaj Koreio. Interesiĝas pri turismo, sporto, literaturo, muziko, filatelio ktp. Adr.: Pola Esperanto Asocio, Filio en Ĉenstohovo, P.O.Box 588, 42-217 Czesochowa 17, Pollando.

* Internacia Koresponda Servo helpas al vi trovi korespondant(in)on, amik(in)on aŭ partner(in)on. Por pluraj informoj sendu unu internacian respond-kuponon al: Box 163 Stn. "A" Downsview, Ont. M3M 3A3 Canada.

* Esp.-grupo de uzino pro fiŝkaptado Sassnitz GDR dez. kor. kun fiŝistoj el la tuta mondo pri mondpaco kaj laboro. Adr.: Heinz Weissflog, Klub der Werktätigen, Seemannsheim, Karl Marx Strasse, GDR -Sassnitz, 2355.

* S-ro Hannes Lamprecht dez. kor. kun esp-istoj de ĉiuj landoj pri diversaj temoj. Adr.: Dedelow D.-str. 79, GDR -2131.

* S-ro Dragusko Sim. Petrov dez. kor. kun esp-istoj de diversaj landoj precipe poŝt oficistoj pri la temo de esperanto-movado. Adr.: Str. Slavjanska No 19, Sofia, Bulgario.

* Ĝiuginta Malukaite (19-j.) dez. kor. tm., interesiĝas pri muziko, arto, geografio kaj literaturo. Adr.: J. Janonio 8-1, Palanga 235720, Litovio, Sovetunio.

Vojaĝo en Ĉinghaj- provinco



Sur la bird-insuleto

Invitite de la Turisma Servo de Ĉinghaj-provinco, mi faris originalan vojaĝon sur la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo, en varma somero.

BIRD-INSULETO APUD ĈINGHAJ-LAGO

Ĉinghaj-lago kun areo de 4 600 kvadrataj kilometroj, je 150 kilometroj for de Ŝjining, la ĉefurbo de Ĉinghaj-provinco, estas la plej granda sallago de Ĉinio. Preter la lago iras ŝoseo al Lhasa de Tibeto.

Ambaŭflanke de la ŝoseo abunda herbaro etendiĝas de la lago ĝis la malproksima montpiedo. La larĝa stepo sterniĝas kiel verda tapiŝo. Tie vidiĝas flavaj kolzofloroj kaj diversaj sovaĝaj floroj. En somero, prospera sezono de paŝtataj brutoj, ĉirkaŭ Ĉinghaj-laFgo abundaj herboj allogas al si multe da tibetnacionoj, kiuj paŝtas gruntbovojn, ŝafojn, mulojn kaj ĉevalojn. En la aŭto kureganta sur la ŝoseo mi vidis tra la fenestro aron post aro da

nigraj gruntbrutoj kaj blankaj ŝafoj sur la verda stepo.


Pro klara kaj freŝa aero sur la altebenaĵo, la lagakvo estas tiel blua kiel la ĉielo. Kuŝas bird-insuleto kun areo de malpli ol unu kvadrata kilometro nordokcidente de la lago. De aprilo ĝis julio ĉiujare pli ol 100 000 migrobirdoj, kiaj makulkapaj agloj, pandionoj, brunkapaj mevoj kaj kormoranoj, alflugintaj de malproksimaj sudo kaj Sudorienta Azio, tie nestas, ripozas kaj generas, kio estas miraklo de la naturo.

Krom la plej granda insuleto Hajŝinŝan, kiu situas en la centro de la lago, ĉiuj aliaj kvar insuletoj kuŝas proksime al sensala akvo kaj herbejo, kaj apartiĝas de la naturaj malamikoj sur la kontinento. Tial, tiuj insuletoj donas bonan medion favoran al ripozado kaj generado de migrobirdoj. Estas pli ĝojige, ke tie estas vasta tero kun malmulte da homoj; la tibetnaciaj paŝtistoj tie vivantaj generacion post generacio estas bonaj amikoj de birdoj,

kiuj ne mortigas birdojn, nek kolektas iliajn ovojn, nek manĝas fiŝojn. Dank' al tiom bona ekologia medio la loko estas regno de birdoj ĉiusomere. La bird-insuleto jam estas difinita kiel la unua naturparko de birdoj de Ĉinio.

Ni vizitis la bird-insuleton, kiam ne mankis migrobirdoj sur ĝi. Malsamspecaj migrobirdoj ripozis sur du dsuletoj. Kormoranoj kolektiĝis sur ĉelaga granda roko punktita de nestoj. En ĉiu nesto kuŝis unu kormorano kovanta, dum la alia kormorano gardis ĉirkaŭe aŭ serĉis manĝaĵon. Rigardate tra lorno, multe da birdidoj ŝancele iris tien kaj reen ĉe siaj gepatroj, kvazaŭ ili urĝus la gepatrojn aŭ atendus, ke la lastaj donu al ili frandan nutraĵon.

Kvankam malsamspecaj, makulkapaj agloj kaj brunkapaj mevoj kolektiĝas kune sur ĉelaga strando. Densaj nestoj formis birdofamiliojn, la strando pleniĝas de birdoj kaj iliaj ovoĵoj, kaj ankaŭ nove elkovitaj birdetoj. En la birda



Tar-templo

mondo regas eksterordinara spektaklo: birdoj aŭ flugas en la lazura ĉielo, aŭ naĝas en blua ondararo, aŭ saltas sur la strando.

La densa kolektiĝo de la du malsamspecaj birdoj nature kaŭzas konflikton pri nesto kaj nutraĵo. Kvinta makulkapa aglo malamas, ke la najbara batalema brunkapa mevo ŝtelas ĝiajn konstruajn materialojn. Tamen ĝi ne povas disiĝi de la najbaro, kiu kapablas reakti rabobirdojn kaj malgrandajn bestojn.

Por protekti birdojn kaj faciligi al turistoj, oni konstruis antaŭ la insuleto duosubteran birdobservojn. Malgraŭe, iuj turistoj, elirinte el la observejo, transiras la dratreton, kuras inter birdamasojn kaj eĉ kolektas iliajn ovojn. Se ili vere fortimigas la birdojn kaj se la birdoj ne plu reflugos, do la bird-insuleto ne plu ekzistos kaj la loko perdos turisman valoron. Tial natura protekto de la insuleto estas gravega afero.

PROFUNDA AMO EN TENDO

Tibet-naciaj paŝtistoj bonvenigis nin en la paŝtejo oriente de Ĉinghaj-lago.

Paŝtistoj kun granda migreco prenas tendon kiel sian loĝejon. Enirinte grandan kvadratan tendon, mi vidis feltan tapiŝon sur planko kaj riĉajn manĝaĵojn sur malalta oblonga tablo. Mi kaj aliaj gastoj sidigis ĉirkaŭ la tablo.

Butero estas preparita el freŝa bovina lakto. Ĝi estas nemankigebla en la vivo de la tibetaj paŝtistoj, tamen bakita hordeo estas ilia ĉefa manĝaĵo. Imitante paŝtistojn, mi enmetis en bovlon lakton, teakvon, sukeron, buteron kaj bakitan hordean farunon, kiujn mi kirlis kaj knedis permane en bulojn. Jen kukoj el bakita hordeo, kiuj estas bongustaj kaj neaĉeteblaj en urboj.

Dum manĝado la gemastroj kaj ilia filino sonore kantis tostkanton. Ili kantante dancas kun belaj movoj. Post dancado ili laŭ sia moro

pretigis por ĉiu gastoj unu glaseton da hordea vino. Ankaŭ ni laŭ la moro de tibetanoj, trempinte la ringan fingron en la vino, fingre jetis la likvaĵon alten trifoje por montri la respekton al la ĉielo, tero kaj prapatroj, antaŭ ol eltrinki ĝin. La gastigantoj kaj gastoj ĉiuj estis tre gajaj, de tempo al tempo aŭdiĝis kantado kaj ĝojkriado el la tendo. Estas mirige, ke tibet-nacia knabino Ĉajke ne nur flue parolas en la ĉina lingvo, sed ankaŭ povas diri "saluton", "dankon" kaj "ĝis revido" ks. en la angla, japana kaj aliaj lingvoj. Kiam ŝi informiĝis, ke mi laboras en la redakcio de EPĈ, ŝi petis min diri tiujn salutajn vortojn en Esperanto, kiujn ŝi ripetis foje refoje. Mi emociiĝis pro ŝia lernemo. Mi sincere esperas, ke en iu tago ŝi povos diri "saluton" kaj aliajn simplajn vortojn en Esperanto kaj akceptos alilandajn esperantistojn.

Post la manĝado la gastigantoj invitis nin rajdi kaj pafadi sur la stepo. Ili pretigis por ni kompletojn da novaj tibetaj vestoj. La ti-



Tibet-naciecaj knabinoj proponas vinon al gastoj.

beta vesto kun altebenaĵa trajto konsistas el interna mallonga jako kun longaj manikoj kaj ekstera robo malfermita ĉe la dekstra flanko. Ordinare tibetanoj portas robon kun nuda dekstra brako ekstere, kaj kun zono ĉe la talio, supre de kiu formiĝas natura sako, en kiun oni povas enmeti nemalmultajn objektojn. Viro ordinaro kunportas delikatan glavon ĉe la talio por ornamo, tranĉi viandon kaj sin protekti. Virino kunportas multajn arĝentaĵojn.

REMOMORO PRI ANTIKVECO SUR ĴIJŬE-MONTO

Ĵijŭe-monto kun alteco de 3 520 metroj super la marnivelo estas akvodivida linio de marenflua sistemo kaj landinternaj riveroj de Ĉinghaj-provinco. Ĉe la montpasejo staras steleo kun la surskribo "Limo inter Tang kaj Tubo". Ĝi servis kiel la landlimo inter Tang-dinastio (618-907) kaj Tuboreĝimo en la ĉina historio, kaj la loko estis nepre trapasata de la antikva vojo de Tang-dinastio al Tubo.

Nun, sur la montpintoj ambaŭflanke de la montpasejo de Ĵijŭe-monto estas konstruitaj Ĵitingkiosko kaj Ĵüetingkiosko respektive, memore al princino Ŭenĉeng. Ĉiĉerono rakontis al ni pri princino Ŭenĉeng. Laŭdire, imperiestro Tajzong (627-650 sur la trono) de Tang-dinastio edzinigis princinon Ŭenĉeng al Sunzankampo, suvereno de Tuboreĝimo. Legendo diras, ke, kiam ŝi pretis forlasi la ĉefurbon Ĉang'an kaj veturi okcidenten, imperiestro Tajzong donis al ŝi Ĵijŭe-spegulon kaj diris, ke ŝi povos vidi siajn hejmlokon kaj gepatrojn en la spegulo, kiam ŝi sopiros al ili. Pri tio informiĝis Tubo-ministro bonveniganta la princinon. Timante, ke la princino revenos hejmen survoje pro sopiro al siaj gepatroj, li ŝtele ŝanĝis la spegulon per falsa. Kiam ili atingis la montpasejon, pro sopirego al sia hejmo la princino elprenis la spegulon kaj rigardis, sed ŝi povis vidi nek sian hejmlokon, nek siajn gepatrojn, krom sin mem. Ŝi ege malĝojigis. La ministro konsolis, ke ŝi ne sopiru al sia hejmloko. Aŭdinte tion, ŝi forĵetis la falsan spegulon en la montpasejon. Ŝi surĉevaliĝis kun larmoj kaj decideme eniris en Tibeton. Poste oni nomas la monton Ĵijŭe-monto.

Princino Ŭenĉeng eniris en Tibeton en 641 p.K. Ŝi kunportis en Tibeton landinternajn kulturon, avangardajn sciojn pri produktado kaj scienco kaj teknikojn. Ŝi faris pozitivan kontribuon en la ekonomia kaj kultura interŝanĝo inter han-oj kaj tibetanoj kaj en la akcelado de la socia disvolviĝo de Tibeto.

TRI MIRAKLOJ EN TAR-TEMPLO

La nomita templo konstruita en 1560 estas en la sudokcidenta angulo de la gubernia urbo Hŭangĝong. Post riparado kaj pligrandigo en diversaj dinastioj, la templo fariĝis antikva konstruaĵaro en la kombino de hana kaj tibeta stiloj, kiu konsistas el multaj haloj, preĝejoj, pagodoj kaj stupaoj. Ĝi estas

unu el la 6 grandaj temploj de Gelu-sekto (Flava Religio) de la tibeta budaismo, kaj rigardata kiel sanktejo.

Enirinte en la templon, oni vidas vicon da lamaismaj pagodoj rondaj en la supro kaj kvadrataj en la malsupro. Jen famaj Ĵuji-pagodoj. Ili simbolas 8 grandajn aferojn faritajn de Ŝakjamunio. La tuta templo estas konstruita laŭ montodeklivo kaj konsistas el la Granda Ortegola Templo, Malgranda Ortegola Templo kaj Granda Preĝejo. La salono estas pompa kaj solena. Ĉiutage tien venas religianoj al Ĉinghaj, Tibeto, la Interna Mongolio kaj aliaj lokoj por pilgrimi, kaj ankaŭ granda nombro da turistoj en- kaj eksterlandaj vizitas la lokon.

Estas admirindaj la tri mirakloj de Tar-templo: buteraj floroj, freskoj kaj brodaĵoj.

Buteraj floroj, kiel oferaĵoj, estas modlitaj de lamaoj de la templo. Ili modlis el bunta butero diversformajn homfigurojn, birdojn, bestojn, florojn, herbojn, arbojn, pavilonojn kaj kioskojn, ĉiuj estas versimilaj. La buteraj modlaĵoj temas pri religiaj rakontoj aŭ mitoj.

Freskoj estas faritaj sur muro aŭ sur traboj, sed plejparto el ili estas farita sur drapiroj, kiujn oni surgluis sur muro. Iuj aperas kiel rulaĵoj, kiujn oni pendigis sur muro. La freskoj estas faritaj per mineralaj tinkturoj, tial ili estas kolorbrilaj kaj ne senkoloriĝaj por longa tempo. Mi vidis freskon pli ol-500-jaran, kiu ankoraŭ konservas siatempan brilon. Freskoj estas ĉie ĉe templo, plejparte temas pri budhoj aŭ budhismaj rakontoj.

La brodaĵoj estas faritaj el tranĉitaj diversformaj silkaĵoj, kun ŝaf-lano, kotono ks. kiel plenigaĵoj. Per ili oni brodis tridimensiajn budhostatuojn, pejzaĝojn, montojn, fluojn, florojn, birdojn kaj bestojn.

Tar-templo ĝuas reputacion en Ĉinio kaj Sudorienta Azio pro siaj originalaj artaĵoj, kiuj allogas diverslokajn turistojn el la mondo, kaj la loko jam fariĝis fama turisma punkto de nordokcidenta Ĉinio.

Festo de Sunbonvenigo

de TJAN ŜJAŬŜIŬ

En la kvara monato de ĉiu jaro, la bulang-nacianoj, loĝantaj en Junnan-provinco de Ĉinio, solenas sian Feston de Sunbonvenigo; la festo estas nomata de Bulang-oj kiel "Songkan".

Laŭ bulangoj, la suno donas al la tero varmon kaj lumon kaj ĝi estas ne malhavebla naturaĵo en ilia vivo. La varma suno estas bela, ĉar ĝi donas animon al ĉio kaj portas al bulangoj lumon kaj ĝojon. Nur kiam la suno brilas sur la ĉielo, la bestoj elnestiĝas, la birdoj kantas, maljunuloj riparas plugilojn kaj erpilajn, maljunulinoj ŝpinas, gejunuloj ludas oreplacajn muzikojn... Pro tio la Festo de la Sunbonvenigo estas granda afero en la vivo de la bulangoj.

La festo devenis de antikva legendo. Ĝi diras, ke la universo estis kreata de dia giganto Gumija kaj liaj 12 filoj. Post la kreo la suno kaj ŝiaj 8 fratinoj kaj la luno kaj liaj 9 fratoj ĉiuj ekaperis. En la varmeĝo la seka tero kreviĝis, la plantoj velkiĝis, kaj la ŝtonoj polviĝis. Por savi la mondon, Gumija faris lignan arkon kun liana kordo

kaj bambuajn sagojn. La sagojn li venenis per akvo de Longtan-lago. Li surgrimpis la plej altan pinton, kaj pafmortigis 8 sunojn kaj 9 lunojn, ĝis la lastaj suno kaj luno timigite sin kaŝis en ŝtonan kavernon. Perdinte lumon kaj varmon, la mondo fariĝis malluma kaj malvarma, kaj homoj kaj aliaj vivantoj en ĝi vivis malfacile. Gumija kunvokis la birdojn kaj bestojn, konsultante kun ili pri invito al la suno kaj la luno, kiuj jam geedziĝis tiutempe. Ĉiuj aprobis lian proponon kaj volis venigi la sunon el la stonkaverno en malproksima oriento.

La venigontoj de la suno ekmarŝis en impona procesio. Hirundo gvidis, lampiroj prilumis la vojon. Tiujn, kiuj flugis sur la ĉielo, gvidis la laŭtvoĉa, elokventa virkoko; tiujn, kiuj kuris sur la tero, gvidis la kuraĝa kaj forta apro.

Atinginte la enirejon de la ŝtonkaverno ĉiuj vokis al la suno, petante ŝian eliron kun promeso doni bonajn manĝaĵojn al ŝi kaj la luno, por ke tiuj neniam suferu de malsato. El la petintoj la koko par-

olis plej elokvente; ĝi finfine persvadis la sunon kaj la lunon.

Denove la mondo havis lumon kaj varmon. Estiĝis tagoj kaj noktoj, kaj la vivo iris en ordo. Ĉie estis plena de viveco, ĝojo kaj feliĉo.


De tiam, je la festo "Songkan", bulangoj frue ellitiĝas kaj eliras el vilaĝo por bonvenigi la leviĝantan sunon.

Bulangoj bonvenigas la sunon ĉe kamporado oriente al la vilaĝo. Tie oni starigas koloran tendon. La tuta vilaĝanaro ekmarŝas en procesio frumatene antaŭ sunleviĝo. Unuj tenas diverskolorajn standardojn, aliaj portas bambuajn ujojn kun gluecaj rizaĵoj, purpurrizaj kukoj, fiŝaĵoj, viandoj, kokaĵoj, fruktoj, krevmaizo kaj aliaj manĝaĵoj por la festo. Laŭ ritmo de gongo-trioj, oni dancas imitante movojn de diversaj bestoj. Ili dancante kaj kantante eliris el la vilaĝo kaj sin direktas al la kolora tendo. La varma spektaklo vekas imagojn ĉe homoj, kvazaŭ ili revenus en pratempan epokon, kiam ĉiuj bestoj kaj birdoj bonvenigas la sunon.

La ceremonio de Sunbonvenigo okazas en la tendo. Oni metas diversajn manĝaĵojn sur pecon da ruĝa ŝtofo. Maljunuloj sidas ĉe la ŝtofo, dum infanoj sidas je certa distanco for de ĝi. Prezidanto de la kultado murmuris bonaŭspiciajn laŭdkantojn, esprimante amon kaj adoron al la suno. Tiam la suno estas leviĝanta iom post iom. Oni eksplodigas petardojn ekster la tendo. Oni entuziasme ekkantas kaj dancas por prospero de la vilaĝanaro kaj la brutaro kaj abunda rikolto en la nova jaro.



LAMAO-ĈIĈERONO



Ĝinbaĝjancuo

En Labuleng-templo en Ŝjahegubernio, Gansu-provinco, ĉe la orienta parto de Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo, vivas lamao-ĉiĉerono, kiu parolas fremdlingve. Li estas Ĝinbaĝjincuo, saĝa kaj laborema. Li estas laŭdata en la turisma servo de la templo, kvankam li lamaigis nur antaŭ 4 jaroj.

La 24-jara lamao kun densaj brovoj kaj grandaj okuloj estas bela. Li naskiĝis en tibetana pentrista familio kaj kreskis en montvilaĝo sur paŝtejo.

Menciante sian lernadon de la fremda lingvo, li diris kun rideto:

“Unuflanke mi mem lernas diligente kaj aliflanke mi lernas de alilandaj turistoj.”

En junio 1985, la templo estis oficiale malfermita al la eksterlandanoj. Aroj kaj aroj da ĉinaj kaj fremdlandaj turistoj venis por ĝin viziti. La templa administrantaro elektis, por urĝa bezono, 4 junajn lamaojn, kiuj parolas hanlingve, kiel voĝ-vidantoj. Ĝinbaĝjincuo ja estis unu el ili. La studado de la budhismaj sutroj en Labuleng-templo estas fama jam de longe. Ĝiaj konstruaĵoj kun originala stilo koncentre montras la lokajn kulturajn kaj artajn trajtojn.

Fremdlandaj turistoj tien venis veturinte longan vojon ĝuste por koni la lokajn morojn, kutimojn kaj artajn trezorojn kune faritajn de tibeta kaj aliaj popoloj. Sen scioj de fremdaj lingvoj, oni ne povas interpreti. Ĉu vere ne havas talentulon la templo? Tiam, la koro de Ĝinbaĝjincuo maltrankvile ondis kaj decidis memlerni fremdan lingvon kun pli da diligenteo por ŝanĝi tiun malfavoran situacion.

Do, li aĉetis koncernajn vortarojn, librojn kaj sonbendojn, kaj entuziasme kaj senlace lernis fremdan lingvon en la libera tempo post lerno de budhismaj sutroj. Post nelonge en la memlernado, li ekprovis interparoli fremdlingve kun alilandanoj. Lia prononco neeviteble miksiĝis kun loka akcento, kio plurfoje ridigis eksterlandajn turistojn, sed li neniam perdis sian fidon kaj prenis la vizitantojn kiel siajn instruantojn, ankaŭ kiuj kuragiĝis lin multe praktiki kaj korektis lian prononcon. En palbebruma daŭro pasis tri jaroj kaj li multe levis sian fremdlingvan nivelon. Nun li povas flue interparoli kun eksterlandaj turistoj.

Iun helan tagon en la pasinta somero, la konstruaĵoj de Labuleng-templo aspektis precipe grandioze sur la stepo kun ĉarmaj pejzaĝoj. Iu itala delegacio el 23 personoj venis viziti la templon. Ilin forte allogis la pentraĵoj sur la muroj, plafonoj, pordoj kaj kolonoj, flirtantaj buntaj silkaj flagoj, kaj pendantaj budhaj figuroj kaj tibetaj artaĵoj plastike kaj versimile faritaj. Gvidate de Ĝinbaĝjincuo, ili tie pasigis tutan antaŭtag-

ĈINA

ANTOLOGIO

(1919-1949)


Dum ĉirkaŭ 30 jaroj de post la "Novkultura Movado de la 4-a de Majo" kaj la "Literatura Revolucio" en 1919, disvolviĝis la ĉina moderna literaturo. Dum tiuj tri jardekoj, Ĉinio paŝis en forta malkvieteco de mal-lumo al lumo. En la 30 jaroj de la evoluo de la ĉina moderna literaturo, rikoltiĝis abundo da valoraj verkoj de ĉiuj literaturaj ĝenroj. En tiu ĉi volumo montriĝas noveloj, raportaĵoj, eseoj kaj poemoj en diversaj stiloj kaj skoloj de la ĉina moderna literaturo, kiujn reprezentas Lusin, Gŭo Moĵŭo, Maŭ Dun, Bakin k.a.

Div. aŭtoroj kaj tradukintoj
Kompil. La redakcio de Ĉina Esperanto-Eldonejo

612p. Ilus. 14.8×21 cm. Bind. 10-Es-2064S
Prezo: £6,40 US\$9,80

Mendu

ĉe: Libroservo de UEA Perantoj de EPĈ
aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio, P.O.
Kesto 313, Beijing, Ĉinio



mezon. Je la adiaŭo, estro de ilia vizitgrupo diris al iu respondeculo de la templo: "Ni ne atendis, ke en Labuleng-templo estas ĉiĉerono, tiel flue parolanta fremdlingve. Li bone konas la templon. Dank' al lia gvidado kaj klarigo, la hodiaŭa vizito lasis al ni neforgeseblan

impreson. Ni dankas vin, ĉinaj lamaaj amikoj!"

En sia 3-jara ĉiĉerona laboro Ĝinbaĝjincŭo akceptis pli ol 10 000 en- kaj eksterlandajn turistojn, kiuj ofte fotis lin por esprimi sian dankon. Tiaokaze li ĉiam bon-

venigis la vizitantojn klinante la kapon kun la mano antaŭ la brusto, portante en la mano rozarion kaj adiaŭis ilin klinante la kapon kun ambaŭ manoj antaŭ la brusto. Tio faris al la vizitantoj neforge-seblan impreson: Li estas pia kaj afabla budhisto!

Trezorejo de surŝtonaj sutroj

Oni nomas Bajdaj-monton, en Fangŝan-gubernio sudokcidente de Pekino, la Monto de Surŝtonaj Sutroj, ĉar sur la monto pasinte sidis Junĝju-templo, kiu konservas surŝtonajn sutrojn.

Junĝju-templo estis fama bud-

hisma sanktejo de la dinastioj Suj (581-618) kaj Tang (618-907). En la ŝtonaj kaj subteraj kavernoj apud la templo konserviĝas 1 100 valoraj surŝtonaj sutroj el pli ol 3 300 volumoj kun pli ol 15 000 ŝtonpecoj. Tio estas la plej grandnombra ideografia ŝtongravuraĵa-

ro konservita en Ĉinio. Tiu granda sutrogravura afero daŭris pli ol mil jarojn. Ĝi komenciĝis de Suj-dinastio kaj finiĝis en Ming-dinastio (1368-1644).

En la unua jarcento p.K. budhismo eniris Ĉinion kaj prosperis en sia tempo. Sed en la postaj jaroj, plurfoje okazis bonzo-masakrado, templo-bruligo kaj cindriĝis grandnombraj mane skribitaj sutroj. Pro tio, bonzoj ne povis ne konsideri la problemon kiel rezervi sutrojn. En Suj-dinastio fama bonzo Ĝing Ŭan ĵuris, ke li gravurigos sutrojn sur ŝtonojn kaj kaŝos ilin en profundan monton. La afero ricevis aŭspicion de nobeloj kaj korteganoj de Suj-dinastio. Ĝing Ŭan organizis homfortojn por gravuri sutrojn kaj en 30 jaroj gravuris 12 sutrojn. Post lia morto la sutrogravura afero daŭris generacio post generacio. La oka jarcento p.K. estis la prospera periodo de sutrogravura afero, tiutempe oni gravuris multajn gravajn sutrojn. En la pasintaj pli ol mil jaroj oni boris sur la monto 9 ŝtonkavernojn por konservi la gravuritajn sutrojn.

La pli ol 3 000 volumoj da surŝtonaj sutroj havas gravan valoron por la posteuloj en iliaj ordigo kaj esploro de budhismaj sutroj. Post miljara ripeta transskribo aperis multaj eraroj en budhismaj klasikajoj, la surŝtonaj sutroj en Fangŝan estis serioze gravuritaj, plej ĝustaj kaj fidindaj. En surŝtonaj sutroj en Fangŝan troviĝas nemalmultaj raraj volumoj antikve perditaj, kelkaj specoj de budhismaj sutroj ne aperas en la nun eldonitaj budhismaj sutroj.

En la surŝtonaj sutroj en Fangŝan troviĝas 6 000 diversaj notoj,

Bejta-pagodo de Junĝju-templo





Surŝtonaj sutroj en Junĝju-templo

kiuj estas valoraj materialoj por esplori la politikon, socion, ekonomion, historion, geografion k.a. de la antikva norda Ĉinio. Krome, estas ankaŭ centoj da notoj, sur kiuj gravuriĝis nomoj de pli ol 30 gildoj, inkluzive de tiuj pri viand-

vendo, gisfer-farado, frukto-vendo k.a., kiuj kontribuis monon al la gravurado de sutroj. En aliaj historiaj materialoj oni ne trovis tiel grandkvantajn notojn pri gildoj de Tang-dinastio.

La surŝtonaj sutroj en Fangŝan estas ankaŭ kaligrafia kompleto, en kiu oni povas klare vidi evoluon historion de la ĉina kaligrafio post la dinastioj Suj kaj Tang. Ideografiaĵoj el multaj surŝtonaj sutroj estas superaj. En la gravuritaj surŝtonaj sutroj estas multaj ideografiaĵoj populare stilaj, diferencformaj, simpligitaj kaj nove kreitaj, kiuj estas fidindaj materialoj por esplori la evoluon historion de la ĉinaj lingvo kaj ideografiaĵoj.

Junĝju-templo konstruiĝis en Tang-dinastio, en kaj ekster kiu pasinte staris multaj ŝtonplatoj kun gravuritaj ideografiaĵoj. Bedaŭrinde, tiu miljara antikva templo detruigis en la mezo de la kuranta jarcento, sed la surŝtonaj sutroj enterigitaj en la 9 sutrokonservaj kavernoj estas sendifektaj. La ĉina registaro, en- kaj eksterlandaj budhismaj kaj laikaj amikaj

societoj kaj personoj kontribuas monsumon por rekonstrui la templon. Jam finiĝis ĝia unuaperioda konstruado "Halo de Ĉiela Reĝo" kaj alia halo, kaj daŭras ĝia duaperioda konstruado.

La Ĉina Budhisma Asocio jam prifosis la surŝtonajn sutrojn en la kavernoj kaj kopiis ilin. La unua volumo de "Surŝtonaj Sutroj en Fangŝan" estas jam fotopresita. Laŭ takso, ĝi estos granda kompleto el 55 volumoj.



KORESPONDI DEZIRAS

- * Studento 28-j. dez. kor. kun gestudentoj precipe en Japanio. Morteza Mirbaghian, P.O.Box 3331(524), Qom. Irano.
- * Hosain Abrahamzadeh 20-j. dez. kor. tm. Adr.: Sarbaz Shahid str. The end of Sttarkhan str. Kuye Gorbany. tea house Gorbany, 51438 Tabriz. Irano.
- * 21-j. studentino, kiu studas polan filologion, dez. kor. tm. pri ĉt., interesiĝas pri filmo, muziko, literaturo kaj sporto. Adr.: Iwona Pecyna, ul. Torunska 57/53, 87-800 Wloclawek, Pollando.
- * Eleonora Bartha 19-j. dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: 4000 St. Gheorge, al. Muzeului, BL. 4. SC. B Ap. 5. Jus. Corasna, Rumanio.
- * Virino 22-j. dez. kor. tm. pri muziko, literaturo, naturo, vivmanieroj kaj mondproblemoj. Adr.: Kerstin Viertel, Str. d. Treundschaftl 10, Zi. 204, Sandendorf, 4413, GDR.
- * Leteramik(in)oj estas serĉataj de s-ino Sybille Jones, Wolfenbuttel Str. 1 A, 3000 Hannover-Dohren, FR Germanio. Hobioj: pentraĵoj kaj geografio.
- * Witold Sobek 18-j. dez. kor. tm. esperante, angle kaj germane pri ĉt. Adr.: ul. Lukasinskiego 14/19, 37-700 Przemysl, Pollando.
- * 22-j. studento de Politekniko interesiĝas pri muziko, ŝako, geografio, kolektas bk. pm. Adr.: Arvydas Mickus, Ikl Pareikalavimo, Kaunas, Centr. Paŝtas, 233000 Litovio, USSR.
- * 22-j. studento, kiu studas medicinon, volonte kor. kun samaĝuloj tm. pri muziko, medicino, foto, tradicioj kaj junulara vivo, interŝanĝas librojn, pk. kaj E-ajojn. Adr.: Dainius Pranauskas, str. Putnos 9-78, 232042 Vilnius, Litovio, USSR.
- * 23-j. sveda studento pri ĉina, ti-beta lingvoj dez. kor. kun mjaŭoj pri mjaŭa lingvo, kulturo ktp esperante kaj ĉine. Joakim Enwall, p/a Nilsson, Laxavagen 36, 12160 Johanneshov, Svedio.
- * Lernanto 17-j. dez. kor. tm. pri ĉt. Adr. A. Avami, P.O.Box 396, Mamshamar, Irano.
- * Gekomencantoj de Grupo Esperantista de Lodzo dez. kor. pri ĉt. kun personoj prefere 20-45-j kaj 13-18-j. Adr.: Magdalena Bukowczyk, 92-525 Lodzo, Str. Gorkiego 1A. m2. Bl. 318B, Pollando.
- * Geedzoj Jiři 36-j. kaj Hana 25-j. dez. kor. kaj interŝanĝi bk el tuta mondo. Intereso: li - geografio, turismo, fotografado, ŝi - literaturo, naturo, sanvivo, ambaŭ - vivo en diversaj landoj. Jiři + Hana Vomačka, Koterovska 30, CS - 301 41 Plzeň, Ĉeĥoslovakio.

Azio en Maltrankvilo

La karikaturo montras: Peza ŝarĝo de 3 miliardoj da loĝantoj, kiel ekstreme granda bebo, pezas sur malgranda lulilo — la azia kontinento.

Ĉe ni ĝi ne vekas ridon, sed profundan maltrankvilon. La maltrankvilo atakas la tutan Azion.

La nombro de aziaj loĝantoj atingis 3 miliardojn en 1988. Por tio la Azia Parlamentana Forumo de Loĝantaro kaj Ĝia Disvolviĝo proponis, ke ekde la 1-a de julio komenciĝos “tago de la 3-miliarda loĝanto”, por ke la publiko fortigus sian konscion pri loĝantaro kaj alprenu pli grandskalan kaj aktivan agadon por solvi la problemon pri rapida kresko de loĝantaro. La propono estas multe atentata kaj subtenata de parlamentoj kaj registaroj de diversaj landoj de Azio kaj la internacia publiko.

Oni vidis rigoran fakton: En Azio, kies areo konsistigas 20% de la terglobo, vivas 60% de la totala loĝantaro de la mondo.

En la mondo el la 9 landoj, ĉiu kun pli ol 100 milionoj da loĝantoj, 6 troviĝas en Azio.

En la 200 jaroj de 1750 ĝis 1950 la nombro de azia loĝantaro kreskis de 490 milionoj al 1 350 milionoj. Post la Dua Mondmilito, precipe post la 50-aj jaroj la loĝantara kresko evidente rapidiĝis, la procentaĵo de la meznombra jara loĝantara kresko leviĝis de 0.8% en la 50-aj jaroj al pli ol 2%. De 1950 ĝis 1980 la nombro de azia loĝan-

taro pliiĝis je 1.2 miliardoj. En la 30 jaroj post la milito la loĝantaro kreskis je 340 milionoj pli multe ol tiu en la 200 jaroj. En la lastaj 8 jaroj en Azio la loĝantaro kreskis je 450 milionoj.

La dilatiĝo de loĝantaro kaŭzis al Azio serion da seriozaj problemoj.

Unue, reduktiĝas la agro. La denseco de la loĝantaro en Azio estas 3-oble de tiu de la mondo, kaj per tio ĝi okupas la unuan lokon en la mondo. La aziaj landoj ĝenerale estas agrikulturaj escepte de Japanio, Singapuro k.a. Laŭ statistiko la loĝantoj vivtenataj de ĉiu kvadrat-kilometro da agro en Azio estas 2.5-oble pli multe ol tiu de la mondo. Tro malmulta estas la pokapa meznombra agro kaj malalta la po-hektara produktokvanto, kio malfacile garantias la fundamentan vivbeznon al la azia popolo. En la mondo estas pli ol 500 milionoj da malsatuloj, el kiuj 300 milionoj vivas en Azio.

Due, plimultiĝos analfabetoj. En Azio la nombro de loĝantoj malpli-ol-15-jaraj konsistigas 1/3 de la totala nombro de la loĝantoj. Al plejparto de la landoj en tiu ĉi regiono mankas eduka monrimedo, la ekzistantaj edukaj institucioj kaj instalaĵoj ne povas kontentigi la postulon pri enlernejigo de la gejunuloj kaj geknaboj. Se la stato daŭros, la analfabetoj, nombrantaj nun 666 milionojn, daŭre pliiĝos.


Trie, tagon post tago akriĝos la kontraŭdiroj de senlaboreco, loĝa-

do kaj energioj. Aziajn landojn ofte ĉagrenas la problemoj de senlaboreco, kiu estas tre serioza en iuj landoj. Pro malalta produktonivelo kaj mallarĝa laboriga merkato de la kamparoj en plejparto de aziaj landoj, kamparanoj senĉese fluas en urbojn, kio pliseriozigos la problemojn de loĝado, laborigo, energio, higieno, sanprotekto k.a. en la urboj.

Resume, la troa dilatiĝo de loĝantaro estas unu el la kaŭzoj de malriĉeco kaj postĝinteco en multaj aziaj landoj. Laŭ statistiko nun la pokapa meznombra nacia produktovaloro de la mondo estas 2 880 usonaj dolaroj, tiu de la evoluintaj landoj 9 930, sed tiu de Azio 970, t.e. nur 1/3 de tiu de la mondo kaj malpli ol 1/10 de tiu de la evoluintaj landoj.

Antaŭ tiu serioza situacio la registaroj kaj popoloj de la aziaj landoj pli kaj pli klare konscias la seriozecon de la loĝantara problemoj, ili alprenas diversajn rimedojn por praktiki naskolimigon kun la celo bridi la loĝantaran kreskon.

En la pasintaj dek jaroj Ĉinio faris grandan penadon kaj akiris rimarkindajn sukcesojn en bridado de loĝantara kresko kaj altigo de ĝia kvalito. Tamen ankoraŭ estas tre peniga tasko por Ĉinio bridi loĝantaran kreskon. En 1987 la nombro de la ĉina loĝantaro kreskis je 22 milionoj, la jara naskokvanto jam superis 2%, tial naskolimigo ankoraŭ estas la nacia politiko de Ĉinio. La ĉina registaro



persistas en sia proponado, ke “ĉiu geedza paro nasku nur unu infanon”.

En Hindio 70% de la loĝantoj loĝas en kamparo kaj la loĝantaro kreskas sufiĉe rapide. Laŭ la ci-

feroj publikigitaj lastatempe de la Naskolimiga Fonduso de Hindio, la hinda loĝantaro duobliĝis en la pasintaj 31 jaroj kaj nun jam superis 800 milionojn. Tio certe kaŭzas pli kaj pli grandan premon al

la socio, ekonomio, edukado, sekureco, loĝado, medio, ekologia ekvilibro k.a. de Hindio. Por tio la hinda registaro alprenis rimedojn de “edukado kaj persvado” kaj materia premiado por ke oni volonte praktiku naskolimigon, kio ricevis bonan efikon. De aprilo 1985 ĝis marto 1986 en Hindio la naskokvanto malpliĝis je 3.1 milionoj. Nun la hinda registaro ellaboras longtempan planon kun investo de 2.5-3 miliardoj da usonaj dolaroj por disvolvi naskolimigan movadon, por efektiviĝi la celon, ke procentaĵo de la loĝantara kresko reduktiĝos de 2.1% al 1.2% en 2000.

Multaj aliaj landoj, kiaj Singapuro, Japanio, Bangladeŝo, Pakistano, Sri-Lankao, Filipinoj, Tajlando, Malajzio kaj Indonezio, ricevis certajn sukcesojn en naskolimigo.

Katenite de ekonomia, socia, religia kaj aliaj kaŭzoj, precipe la senprecedence granda kardinala nombro de loĝantaro kaj granda nombro de junaj loĝantoj, estas ekstreme peniga tasko por Azio bridigian loĝantaran kreskon.

PLADOJ KAJ LEGENDOJ


Blanka nuboj ĉirkaŭita de ruĝaj floroj kaj blanka jado kun verdaj pinoj

de SUN GŬOLJANG

Legendo diras, ke tiuj du pladoj estis unue preparitaj en la Okcidenta Han-dinastio (206-24 a.K.). La unua imperiestro de Han-dinastio Liŭ Bang (256-195 a.K.) estis frandema kaj drinkema antaŭ sia imperiestriĝo. Li eĉ je kredo aĉetis al si viandon kaj vinon, sekve li havis multe da ŝuldoj, kaj preskaŭ ĉiutage multaj venis postuli de li la ŝuldon. Liŭ Bang ne povis plu kviete sidi hejme. Li do iris al sia amiko maljuna Lju kaj ekloĝis ĉe li por eviti la ŝuldatojn. Li drinkis, manĝis kaj babilis kiel antaŭe.

Iutage drinkinte, Liŭ kaj Lju ripozis hejme. En la noktomezo Lju ellitiĝis kaj surpriziĝis, rigardante eksteren tra fenestro. Li vidis, ke la ĉambro de Liŭ Bang estas englutita de ruĝa flamo. “Ho, ve! incendio!” Kriante, Lju sin pafis eksteren. Atinginte la domon loĝatan de Liŭ Bang, li trovis, ke Liŭ dolĉe dormas kaj nenie estas brulego. Lju pensis, ke tio aŭguras la brilan estontecon de Liŭ Bang.

En la sekvanta tago Lju konsiliĝis kun sia edzino:



“Niaj du filinoj jam adoleskantiniĝis kaj ni devas fianĉinigi ilin.”

“Vi pravas. Kie estas taŭgaj junuloj? Tuj petu svatiston!”

Kun rideto Lju respondis: “Mi ja trovis iun junulon, kiu taŭgas por esti fianĉo de nia unua filino.”

“Kiu do li estas?”

“Li estas Liŭ Bang, kiu loĝas ĉe ni,” senhaste respondis Lju.

La maljuna edzino de Lju flamiĝis: “Tiu mallaboremulo, ĉu? Li eĉ ne povas vivteni sin mem, kiel li povus vivteni sian edzinon? Ne, mi ne konsentas!”

Lju persvadis: “Liŭ Bang ne estas ordinara homo. Oni malkovris, ke li estas talenta kaj scias preskaŭ ĉion en la mondo, kaj plie, li estas supersaĝa kaj trafe antaŭvidas la estontecon. Mi pensas, ke li certe faros sensacion, kiam venos al li la ŝanco.” Kaj post tio li koniĝis al sia edzino la vidaĵon. La maljunulino hezitante respondis: “Vi estas la mastro de nia familio. Vi do mem decidu la aferon!”

Lju ĝojiĝis kaj pretis serĉi ŝancon konsiliĝi kun

Liŭ Bang.

Foje Liŭ Bang pasumis surstrate kaj hazarde renkontis Fan Kŭaj, hundaĵ-vendiston. Ne havante tempon sin kaŝi, Liŭ estis kaptita de Fan. Tiu ĉi do postulis de li la kvitiĝon. Ĝuste kiam Liŭ implikiĝis en embaraso, Lju preterpasis la lokon. Li disigis kaj invitis ilin al sia hejmo. Lju diris al Fan: “Mi plenumu la kvitiĝon por s-ro Liŭ! Hodiaŭ ni ne tuŝos tion. Mi pretigos vinon kaj pladojn. Ni kune drinku, ĉu bone?”

La kolero de Fan disŝaŭmiĝis. Ili altabliĝis kaj ekdrinkis. Post kiam ili trinkis po 3 tasojn, Lju diris: “Mi havas ion por interkonsiliĝi kun vi ambaŭ, tamen mi ne scias, ĉu decas aŭ ne.”

“Onklo, se vi volas, diru malkaŝe!” respondis Liŭ.

“Diru jam! Kial vi hezitas?” senpacientiĝis Fan.

“Bone, mi diru malkaŝe. Vi ambaŭ estas bravaj kun bela aspekto. Mi havas du filinojn, kiuj atingis la edziniĝan aĝon, tamen ĝis nun ili ankoraŭ ne havas fianĉojn. Se vi konsentas, mi do fianĉinigu ilin al vi, ĉu bone?”

Liŭ bone sciis la konduton de Lju kaj ĝojiĝis de tio. Li tuj surgenuiĝis kaj adorkliniĝis al Lju. Fan estis hundaĵ-vendisto, malestimata en la socio, kaj ankaŭ li ĝojis kaj konsentis pri tio. (Poste Fan sekvis Liŭ Bang en la insurekcio kontraŭ Ĉin-dinastio, faris elstarajn meritojn en la milito por fondi la Okcidentan Han-dinastion kaj gajnis la rangon de ĉefministro.)

Lju tuj venigis siajn edzinon kaj filinojn. Lia edzino facile konsentis pri la fianĉiniĝo, vidinte Liŭ kaj Fan belaspektaj. Ĉiuj familianoj ekĝojis. Oni aranĝis alian festenon kaj ĝoje ekdrinkis. Lju diris al siaj filinoj, ke tiu tago estas tago por ilia fianĉiniĝo, kaj ke ili preparu du pladojn belformajn kaj bongustajn, kun nomo signifoplena. Post momento liaj filinoj prezentis po unu plado.

Meze de iu plado estis nubosimila lakto, ĉirkaŭ kiu kuŝis 5 masoj da anashepataj pecoj, similaj al ĉarmaj umefloroj. La plado estis bongusta kaj nomata Blanka Nubo Ĉirkaŭita de Ruĝaj Floroj. La alia plado estas Blanka Jado kun Verdaj Pinoj. La fiŝaĵo en ĝi similas al blanka jado kaj ĉirkaŭ ĝi la kampaj rapoj similas al verdaj pinoj belformaj kaj freŝaj.

Blanka nubo ĉirkaŭita de ruĝaj floroj

Ĉefaj materialoj:

freŝa bovlakto	250 g.
ovoblanco	200 g.
freŝa anashepato	250 g.

Akcesoraj materialoj:

kuirita ŝinko	25 g.
vintra bambuŝoso	25 g.
verdaj pizoj	25 g.

Spicaĵoj:

porkograso	175 g.
sojfaba oleo (aŭ arakida oleo)	500 g.
rizvino	15 g.
salo	10 g.
amelo	30 g.
mononatria glutamato	10 g.
sojo	20 g.
blanka sukero	5 g.
vinagro	15g.
ŝenoprazo, ajlo, zingibro kaj kokograso po iomete	

Preparado:

I. Zorge lavu la anashepatojn kaj tranĉu ilin en pecojn duoncentimetron dikajn. Metu en vazon la anashepatajn pecojn kaj 15 g. da amelo kaj miksu ilin.

II. Dispecigu la vintran bambuŝoson. Dishaku la sinkon. Brogu la pizojn kaj senŝeligu ilin. Dispecigu la ajlon kaj dishaketu la ŝenoprazon kaj zingibron.

III. Verŝu la 250 g. da bovlakto en bovlon. Metu en ĝin la 200 g. da ovoblanko, 5 g. da amelo, 5 g. da salo, 5 g. da mononatria glutamato kaj 15 g. da rizvino. Delikate kirlu ilin.

IV. Varmigu paton sur fajro kaj verŝu en ĝin 100 g. da porkograso kaj la laktan miksaĵon. Malforte skuu la paton kaj de tempo al tempo verŝu en ĝin restan porkograson, ĝis la kuirado en la pato fariĝos duondensa kun gras-tavoloj. Aldonu al ili la kokograson. Elpatigu kaj metu ilin en pladon kaj disŝutu sur ilin la dishakitajn sinkon kaj pizojn.

V. Metu alian paton kun 500 g. da sojfaba oleo sur fajron. Kiam la oleo estas duonkuirita, metu en ĝin la pecigitan anashepaton. Disigu ĝin, por ke ĉiu peco estu tegita per oleo. Elpatigu la hepaton kaj oleon kaj metu ilin sur legomkribilon. Verŝu en bovlon 20 g. da sojo, 5 g. da blanka sukero, 5 g. da salo, 5 g. da mononatria glutamato, 10 g. da amelo kaj iom da supo. Metu la paton, en kiu oni fritis la anashepaton, denove sur fajron. Verŝu iom da oleo en la paton. Metu tien la preparitajn ajlon, ŝenoprazon, zingibron kaj pecojn da vintra bambuŝoso. Fritu ilin por momento. Metu tien la frititan anashepaton. Skuu la paton. Verŝu la preparitan sukron. Denove skuu la paton kelkfoje. Elpatigu la kuiradojn kaj metu ĝin ĉirkaŭ la lakton je kvin masoj. Jen la plado estas preparita.

Blanka jado kun verdaj pinoj

Ĉefaj materialoj:

fiŝviando	250 g.
kampa rapo	500 g.

Akcesoraj materialoj:

kuirita ŝinko	75 g.
Spicaĵoj:	
porkograso	1 000 g.
sojfaba oleo	1 000 g.
ovoblanko	de du ovoj
amelo	15 g.
rizvino	15 g.
mononatria glutamato	10 g.
salo	7.5 g.
blanka sukero	10 g.
ajlo	2 pecoj
kokograso	iomete
supo el kokaĵo	unu bovlo

Preparado:

I. Zorge lavu la fiŝviandon kaj tranĉu ĝin en pecojn ĉ. 0.7 cm dikajn, 3 cm larĝajn kaj 5 cm longajn. Miksu ilin kun 5 g. da rizvino, 2.5 g. da salo kaj 3 g. da mononatria glutamato. Faru gluaĵon el ovoblanko kaj 10 g. da amelo. Tegu la fiŝpecojn per la gluaĵo.

II. Tranĉu radikojn de la kampa rapo en la formon de sagpinto. Duigu ĉiun kampan rapon kaj tranĉu ilin ĉiujn en pecojn ĉ. 7 c. longajn. Purigu ilin en akvo. Tranĉu la sinkon en maldikajn striojn.

III. Verŝu la 1 000 g. da porkograso en la paton sur fajro. Kiam la graso estas duonkuirita, metu la preparitajn fiŝpecojn en la oleon unu post alia. Kiam ĉiuj fiŝpecoj flosas sur la oleo, eloleigu ilin per legomkribilo. Elverŝu plejparton de la oleo el la pato kaj restigu iom da oleo en ĝi. Enpatigu la ajlopecojn, fritu ilin por momento kaj verŝu en la paton unu kuleregon kaj duonon da supo el kokaĵo. Metu en ĝin la fiŝpecojn, 5 g. da sukero, 3 g. da salo, 4 g. da mononatria glutamato kaj 5 g. da rizvino. Transigu la paton sur mildan fajron, stufu per la fajro por kelkaj minutoj kaj remetite la paton sur ardan fajron. Enpatigu 5 g. da amelo kaj iom da kokograso. Elpatigu la kuiradojn kaj metu ĝin meze de la plado.

IV. Verŝu 1 000 g. da sojfaba oleo en alian paton sur fajro. Per milda fajro varmigu la oleon ĝis duonkuirado kaj metu la kampan rapon en la oleon. Kiam la kampa rapo fariĝas verda, elpatigu la rapon per legomkribilo, dum restigu malmulte da oleo en la pato. Fritu la hakitan zingibron kaj sinkajn pecojn en la pato por momento kaj verŝu en ĝin 2 kulerojn da supo el kokaĵo. Enpatigu la preparitan kampan rapon kaj 2 g. da salo, 3 g. da mononatria glutamato kaj 5 g. da rizvino. Stufu ilin per milda fajro por momento kaj poste, metu la paton sur ardan fajron, por ke la buljono pli rapide densiĝu, kaj elpatigu la kuiradojn. Metu la rapojn ĉirkaŭ la fiŝpecoj sur la plado kun la kapo internen. Metu sur ĉiun rapon pecon da ŝinko. Jen la plado estas preparita.

Nova Aspekto de Antikva Urbo Ĝiŭĝjang

Teksto de MEJ ĜI Fotoj de LIŬ SIGONG

Veturinte unu horon de Daje-a Ferminejo orienten, mi atingis la urbon Hŭangŝi, de kie mi veturis per ŝipo al la urbo Ĝiŭĝjang de Ĝjangŝji-provinco.

SIPVETURADO AL ĜIŬĜJANG

Pli agrabla estas veturado sur Jangzi-rivero. La stabila ŝipado sentigas al la vojaĝantoj sekurecon. En varmega somero oni povas ĉiutempe sin bani en la ŝipo. Krome, la lita bileto de ŝipo estas malmultekosta. Tial, kvankam ŝipo veturas malpli rapide ol trajno, tamen vojaĝantoj de Jangzi-rivero preferas veturi per ŝipo.

Sur Jangzi-rivero navigas multaj pasaĝeraj ŝipoj, long-distancaj,

mallong-distancaj, grandaj kaj malgrandaj. La ŝipo "Ĝjanganhan N-ro 1" veturiganta min estas longa je 113 metroj, 4-etaĝa kun 1 252 litoj. Ĝi veturis laŭflue malsupren de Hankoŭ de Uhan al Ĝiŭĝjang kaj navigis rapide.


De Hŭangŝi ĝis Ĝiŭĝjang la akva vojo longas 126 kilometrojn, dum la vojaĝo mi ekscitiĝe aprecis pejzaĝojn ambaŭborde de Jangzi-rivero. Post 4.5-hora veturado, la urbo Ĝiŭĝjang pli kaj pli klariĝis antaŭ mi en la malproksimo. La antikva urbo, sidanta en la nordo de Ĝjangŝji-provinco, estas sola urbo ĉe Jangzi-rivero kaj estas porde de tera kaj akva trafiko de la provinco. Tre grava estas ĝia geografia pozicio, ĉar ĝi situas en la interliga loko inter la provin-


coj Hubej, Anhuj kaj Ĝjangŝji. Tial, frue antaŭ pli ol 2 000 jaroj, Han-dinastio konstruis tie la urbon Ĝiŭĝjang. Multaj famuloj en la historio vizitis la lokon. Ĝiŭĝjang estas ankaŭ trapasejo por viziti Luŝan-monton, faman pitoreskejon de Ĉinio, tial ankaŭ la urbo estas iagrade fama en Ĉinio. Dank' al la oportuna trafiko, ĝi iam estis komerca haveno kun longa historio, en la meza kaj malsupra basenoj de Jangzi-rivero. Prilumata de la antaŭvespera suno, Ĝiŭĝjang antaŭ mi aspektis kiel verda insulo. En la verdaĵoj vidiĝis ruĝaj tegmentoj de domoj kaj dise kelkaj etaĝdomoj. Ĝi estas kaj antikva kaj nove konstruata.

BELA GANTANG-LAGO

La urbo Ĝiŭĝjang, kun 3.72 milionoj da loĝantoj, havas totalan areon de 18 823 kv.km. inkluzive la urban areon de 699 kv.km. Ĝi aspektas kiel longa rubando, kuŝanta tuj apud Jangzi-rivero. La lagoj Gantang kaj Nanhu situantaj en la urba centro kiel du brilaj perloj pliĉarmigas la urbon.

La bela Gantang-lago estas vasta kaj klara. Laŭ la laga bordo iras nekontinua vojo, ombrata de arboj, beligata per gazonoj, florbedoj, fontanoj, kioskoj, ŝtonaj benkoj, skulptaĵoj, ili formis stratajn ĝardenojn. Movplenaj estas la stratoj, dum kvieteco regas en la ĝardenoj, kie oni povas ĝui malvarmeton kaj hoki ĉe la laga bordo tage





Ĝiŭĝjang-haveno

en somero kaj promeni vespere.

Ĝiŭĝjang estas fama historia kultura urbo, sed restas tie nemultaj antikvaĵoj. La konstruaĵaro de Janŝuj-kiosko en Gantang-lago estas postlasita antikvaĵo. Ĝi konstruiĝis en Tang-dinastio kaj estis detruita kaj rekonstruita plurfoje, ĝiaj nunaj konstruaĵoj plejparte havas stilon de la posta periodo de Ĉing-dinastio (1644-1911). Janŝuj-kiosko troviĝas en laga akvo, inter ĝi kaj laga bordo kunligiĝas zigzaga ponteto. Trapasinte la ponteton kaj enirinte en korton, mi vidis, ke ĝi similas al kvadrata korto en Pekino. Ĝi estis delikate kaj lerte konstruita el ligno kaj brikoj, kun supren levitaj tegmentrandoj. Legendo diras, ke en la tempo de Tri Regnoj (220-280) fama generalo Ĝoŭ Ju de la regno orienta U (222-280) trejniis tie sian akvan armeon. Hodiaŭ, tie troviĝas teraso "Komandejo de Ĝoŭ Ju". Starante sur la teraso mi vidis, ke la laga akvo brilas kiel spegulo, la malproksimaj montoj aspektas kiel ekranoj, nuboj ŝvebas kaj ekskursaj boatoj punktas sur la lago. Tio multe plezurigis la vizitantojn.

FOIRO

En la ĉina historio Ĝiŭĝjang estis fama pro sia riza foiro.

S-ro Li, direktoro de la Ganbej-a Riz-vendejo en Ĝiŭĝjang, diris al mi: La oportuna akva kaj tera trafiko de Ĝiŭĝjang en la historio formis tradicion, ke

homoj el grenproduktejoj de Hubej, Anhuj kaj Ĝjangŝji venas al Ĝiŭĝjang por vendi grenon kaj loĝantoj de Ŝanhajo, Kantono, Fuĝjan-provinco k.a. alvenas por aĉeti grenon. Tial, Ĝiŭĝjang iom post iom fariĝis fama grena foiro en suda Ĉinio.

Antaŭ ol veni al Ĝiŭĝjang, mi aŭdis, ke la riza foiro troviĝas okcidente de la urbo. Kiam mi venis al la loko, mi vidis foiron de agrikulturaj produktaĵoj. Ĝi sidas ĉe Jangzi-rivero kaj vendas diversajn agrikulturajn kaj kromokupajn produktaĵojn.

En la foiro vendiĝas ankaŭ grenoj kaj kuiroleoj. Mi babilis kun junulo, vendanta rizon kaj veninta de Anhuj-provinco, kaj informiĝis, ke lia rizo estis aĉetita de Anhuj-aj kamparanoj.

La riza foiro estas cirkulanta plurtavola reto. Oni aĉetis rizon, sojfabon, kolzoseman oleon, maizon k.a. el aliaj provincoj, kaj vendis ilin al la provincoj Fuĝjan, Hebej, Ŝanŝji k.a. En marto de la kuranta jaro, oni aĉetis tri milionojn da kilogramoj da rizo el Hŭangmej de Hubej-provinco kaj vendis ilin rekte al la grenmanka Ŝantoŭ-regiono de Ĝuangdong-provinco. En la urbo nun troviĝas pluraj gren-vendejoj, la Ganbej-a Gren-vendejo estas kompare granda. Direktoro Li diris al mi, ke unu el la ĉefaj taskoj de gren-vendejoj estas vigligi la grenan kaj olean cirkuladon de diversaj lokoj kaj reguligi la mankon kaj superfluan en la merkato. En la kuranta jaro

la gren-vendejoj jam starigis la gren-aĉetan kaj vendan reton kun gren-produktaj kaj aĉetaj regionoj de pli ol dek provincoj kaj urboj en la tuta lando.

SENVETURILA STRATO

En la malnova urboparto Ĝiŭĝjang estas senveturila strato, nomata Daĝong-strato tuj apud Jangzi-rivero, kiu multe interesis.

La strato kun malaltaj domoj longas 2.5 kilometrojn kaj ne estas larĝa. La strato ombrata de arboj havas multajn vendejojn unu apud alia, ili vendas manĝaĵojn, horloĝojn, okulvitrojn, porcelanaĵojn, pli multaj vendas diversajn vestaĵojn. Ĉiuj vendejoj malfermiĝas fronte tuj al la strato, oni povas klare vidi de sur la strato iliajn vendaĵojn. La diversstilaj kaj malsamkoloraj vestaĵoj kaj ŝtofoj allogis mian atenton. En la komenco mi eniris en ĉiun butikon kaj iam demandis pri prezo, poste nur rigardis. Fine mi ne eniris kaj rigardis nur de sur la strato. Post preskaŭ tri horoj mi finis mian viziton al la strato.

En la vendejoj de Daĝong-strato nemultaj kaj nekulfrapaj estis la vestaĵoj produktitaj de Ĝiŭĝjang, plejparto estis modaj vestaĵoj produktitaj de Ŝanhajo kaj Kantono. Fakte, Ĝiŭĝjang havas siajn produktajn bazlokojn de kotono kaj ramio. Ĝi havas grandan tekstilan industrion el entreprenoj de tekstilado, trikado, pres-tinkturado, ves-



En riza foiro

tofarado, kiu povas prilabori kotonon, lanon, ramion, silkon, kemian fibron k.a. Ĝi estas unu el la ĉefaj industrioj de Ĝiŭĝjang.

Mi vizitis la Duan Kotontekstilfabrikon de Ĝiŭĝjang, la plej grandan el la tekstilaj fabrikoj de la urbo. Ĝi komencis sian produktadon en 1965 kaj ĉiutage produktas kotonan ŝtofon de 120 miloj da metroj. Tre vasta kaj hela estas la ŝpina laborejo de la fabriko, la spindeloj rapide rotaciantaj sur la maŝinoj en vicoj aspektas kiel ŝvebantaj blankaj rubandoj. Sufiĉe granda parto de ĝiaj ŝpinitaĵoj estas eksportitaj.

PROMENADO SUR LA HAVENA KAJO DE ĜIŬĜJANG


La haveno de Ĝiŭĝjang estas centjare malnova. Min impresis malbone ĝia pasaĝera kajo. En la tago, kiam mia ŝipo atingis Ĝiŭĝjang, laŭ la homfluo mi eliris el la kajo. Mi trovis tie nek ŝipatendejon nek norman trapasejon. Premateco kaj malpureco regis ĉie. Ekster la kajo oni ne povis trovi vojmontrilon kaj eĉ aŭtobuson.

Poste, mi informiĝis, ke ĝia pasaĝera kajo estas en rekonstruado kaj la nuna kajo estas provizora. Iutage, mi suriris la digon de Jangzi-rivero. Estrino de la nova

pasaĝera kajo diris al mi, ke la digo 1.1 km-longa estas ebena kaj tre fortika, la nova pasaĝera kajo konstruiĝos tie. Ŝi diris plu, ke la jara transporta nombro de pasaĝeroj estas pli ol tri milionoj da homfojoj, tial la malnova haveno ne taŭgas por la nova postulo, kaj oni devas konstrui la novan. Montrante malnovajn domojn ŝi diris, ke tiuj malnovaj domoj estos malkonstruitaj, tie konstruiĝos nova kajo kun 11 ankrejoj, ŝipatendejo kun plankareo de 12 000 kv.m., placo, ĉirkaŭkajaj vojoj k.a. Tiam la transporta kvanto de pasaĝeroj atingos 5 milionojn da homfojoj. La kaja estrino ĉijare estas 41-jara, kiam ŝi parolis pri la estonteco de la haveno, ŝi montris sin emocia kaj memfida.

Okcidente de la digo, estas en rekonstruado la vartransporta kajo de Ĝiŭĝjang por la eksterlanda komerco. La riverborda havena linio de la urbo longas 28 kilometrojn, kie sidas pli ol 50 vartransportaj kajoj, kiuj ĉiu povas ankri marŝipojn de 3 000 -5000 toneloj, ilia jara ŝarĝ-malŝarĝa kvanto superis 6 milionojn da tunoj. La konstruota kajo por la eksterlanda komerco havos 2 ankrejojn por 5 000-tonelaj ŝipoj. Post finkonstruiĝo de la du ankrejoj, la haveno de Ĝiŭĝjang havos pli grandan transportan povon kaj pli multe da varoj estos transportita de tie al diversaj lokoj de la mondo.


Pro sia situo tuj apud Jangzi-rivero, Ĝiŭĝjang havas superajn kondiĉojn en surakva transportado, agrikulturo k.a. Kompreneble, ĝi nun estas tre estiĝinta kaj multaj aferoj por ĝi estas farotaj. Iutage, Ĝjang Gŭoĝen, sekretario de la urba partia komitato de la urbo Ĝiŭĝjang, diris al mi, ke Ĝiŭĝjang devas disvolvi sian superaĵon por sia rapida prospero. Ĝia telekomunika domo de program-rega telefonio kun 10 000 lineoj funkcios baldaŭ. Oni konstruos pontegon super Jangzi-rivero ĉe Ĝiŭĝjang. Ĝi estos la kvina ŝosea kaj fervoja pontego. Post nelonge ĝia surakva vojo kondukos okcidente al Ĉongĝing kaj Uhan, oriente al Nankino kaj Ŝanhajo, kaj ĝia tervojo norde ĝis Pekino kaj sude ĝis Kantono. Tiam Ĝiŭĝjang fariĝos unu el la gravaj urboj de la lando.





Parto de Ĝiŭĝjang

La Riveroŝlosa Pagodo konstruita en Ming-dinastio (1368—1644)





Janšuj-kiosko sur Gantang-lago



Pramejo ĉe Jangzi-rivero



Ĉanghong-strato al la pontego en konstruado

FOTO DE ĜOŬ ĈJIŬEJ



La Giūgjang-a Pontego super Jangzi-rivero

Ĉinaj salolagoj

de LAN ŜAN

Salolagoj situas en fermaj basenoj aŭ kavoj, kie la klimato estas seka aŭ duonseka. Dum longa tempo, ĉar la jara pluvokvanto estas malplimulta ol la jara kvanto de vaporigo, la akvo malpliigas iom post iom, la proporcio de salo pliigas kaj dika tavolo de salo formiĝas. Pro pliigo de salo en lago, la vaporigo malrapidiĝas, tial sur la sala tavolo formiĝas densa haloido. Kun tempopaso akvo komplete vaporigos kaj la lago fine sekigos kaj fariĝos sala mondo.

Ĉinio estas unu el la landoj kun plej multaj salolagoj. Laŭ statistiko Ĉinio havas ĉ. 1 000 salolagojn, kiuj troviĝas ĉefe en Ĉinghaj, Ŝingĵang, Interna Mongolio kaj Tibeto. Krome ankaŭ Gansu, Hejlongĵang, Ŝanŝji kaj aliaj lokoj havas kelke da salolagoj. Plejparto de ili dissemiĝas en sekaj altebenaĵaj basenoj, kie la jara vaporkvanto de akvo estas 10- eĉ 100-oblo de la pluvokvanto. Laŭ la epoko de ilia formiĝo, plejparto de ili naskiĝis antaŭ 16 000-15 000 jaroj.

La ĉinaj salolagoj ĝenerale formiĝis kune kun Gobio kaj leŭsa altebenaĵo. La plej alta salolago situas en la nordo de Tibeto je 4 200-5 000 metroj super la marnivelo. La plej malalta salolago -- Ajding-lago situas en Turpanbaseno je 154 metroj malsupre de la marnivelo. La areo de Carhan-salolago sur Ĉajdam-baseno estas 1 600 kvadrataj kilometroj. Ĝi estas la plej granda salolago en Ĉinio. En ĝi la akvo estas saturita de salo kaj formiĝis dika tavolo da salo. De post 1954 sur la sala tavolo oni konstruis ŝoseon, kiun oni nomas "Sala Ponto".

En Ĉajdam-baseno dissemiĝas pli ol 70 grandaj kaj malgrandaj salolagoj ĉiu kun siaj trajtoj. Cakalago situanta en la orienta limo de la baseno estas ovala kun areo de 105 kvadrataj kilometroj je 3 080 metroj super la marnivelo. Tie la klimato estas seka, temperaturo ŝanĝiĝema kaj en la sama tago oni povas sperti kaj vintron kaj someron. Eĉ en varma somero falas densa neĝo. Sur la salolago povas sekure veturi malgranda vagono kelkajn tunojn peza. Tie stariĝis salfabriko ekspluatanta maŝine. Ĝia salo estas manĝebla, ĉar ĝi, blua, estas nature kristaliĝinta kun granda proporcio de natria klorido kaj malmulta malpurajo, tial ĝia gusto estas bona kaj kvalito alta. La sala tavolo sub la Caka-salolago dikas 15 metrojn kun totala rezervokvanto de 450 milionoj da tunoj. Laŭ la nuna ekspluatado de salolago

spluata rapido la salo povas esti ekspluatata almenaŭ 1 000 jarojn.

Pro la geologia diferenco, la kemiaj elementoj de la salolagoj estas malsamaj. Ĝenerale ili povas esti dividitaj en la tipojn de karbonato (ĉefe en Interna Mongolio), sulfato (ĉefe en Ŝingĵang) kaj klorido (ĉefe en Ĉinghaj) kaj tipa estas la salolago en Ĉajdam-baseno. En salolagoj estas 52 specoj de salaj minajoj. La minajaj specoj de diversaj salolagoj estas malsamaj. La salolagoj de Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo abundas je boro kaj litio, tiuj de Ĉajdam-baseno je kalio kaj magnezio, tiuj de Interna Mongolio je natura alkalo, kaj tiuj de Ŝingĵang produktas ĉefe glaŭbersalon. La salo kaj gipso estas riĉaj en multaj salolagoj. Ilia rezervokvanto de litio okupas la unuan lokon en la mondo, la rezervokvanto de boro kaj magnezio estas en la unua



(Daŭrigo de p.40)

“Ne, nenio okazis.” Ĝang Mingming ŝajnis sin mira: “Mi nur volas laŭdi la pladojn...”

“Sed antaŭe vi neniam juĝis pri la pladoj, kial hodiaŭ vi...”

Ĝang Mingming ne povis daŭre kaŝi sian sekreton:

“Hodiaŭ mi juĝis ĝuste pro tio, ke antaŭe mi neniam juĝis...”

“Nu, vi kaŝas ion kontraŭ mi,” la saĝa edzino tuj divenis la aferon.

Ĝang Mingming suspiris demetante la manĝbastonetojn:

“Mi ne intencas kaŝi ion kontraŭ vi, ĉar mi mem ne scias, kiel mi klarigu al vi pri la afero.”

Ŝjue Minĵu ridetis en fiero. La edzo estas tre kompetenta sciencisto, scioplena. Tamen, rilate psikoanalizon li estis analfabeto kaj ĉiam estis venkito de la edzino.

“Ne estu maltrankvila. Vi diru.” Ŝjue Minĵu kur-aĝigis kvazaŭ pacienca instruistino lernanton.

“Hodiaŭ mi aŭdis, ke baldaŭ publikiĝos dekreto redukti ĉies aĝon je dek jaroj.”

“Simpla mito.”

“Sed vere.”

“Ĉu?”

“Nedubeble vere.”

Meditinte momenton Ŝjue Minĵu rigardis la edzon per la flagrantaj okuloj kun la diro:

“Vi perdos la oficon de buroestro.”

“Jes.”

“Ĉu vi bedaŭras?”

“Ne. Tamen mi ne povas ekspliki mian korstanton.”

Ĝang Mingming diris, fositante en sia bovlo per la bastonetoj:

“Fakte mi ne estas taŭga por gvidanto kaj mi ne volas esti gvidanto. Sed en la lastaj jaroj oni faris la impreson, ke nur mi estas taŭga por la rolo de buroestro. Kaj nun la afero abrupte ŝanĝiĝis, kaj mi sentis ion...”

Li ne trovis decajn vortojn.

Ŝjue Minĵu diris senhezite:

“Do ne estu. Mi preferas, ke vi ne estu buroestro. Ĉu vi opinias, ke la ofico de buroestro estas facila?”

Ĝang Mingming levis la rigardon al la edzino mirante pro ŝia kategorio kaj aplomba diro. Antaŭ nelonge, kiam li diris al ŝi, ke li estos buroestro, ŝi montris koran ĝojon. Ŝi diris: “Vidu, vi ne konkuris, sed la ofico mem falis sur vin.” Sed nun, li estis perdonta la oficon, ŝi montris nek koleron nek bedaŭron, kvazaŭ nenio okazus.

“Buroestro devus zorgi pri ĉiaj bagatelaĵoj en la buroo, ĉu vi povos elteni? Disdonado de loĝejoj, nomumo je profesiaj titoloj, disdono de premioj, mildigo de kverelo kaj malpacigo, kontrolo de la financaj aferoj de la buroo, profesiigo de la infanoj de la oficistaro, infanĝardeno... Ĉion vi devas zorgi. Ĉu vi povos plenumi tiujn laborojn?”

Jes, kiu povus zorgi pri tiom multe da aferoj!

“Vi zorgu vian profesion laboron. Kredeble vi multe atingos en la redonitaj dek jaroj.”

Ankaŭ li kredis tion.

Ĝang Mingming reakiris sian kvietecon kaj sentis agrablan facilecon en la koro.

Ĉe la enlitiĝo li kredis, ke li havos bonan dormon. Sed li vekigis en noktomezo kaj estis trafita de facila bedaŭro kaj sento de perdo.

Esperantigis Ŭang Sen

(Daŭrigota)

vico de la mondo kaj ankaŭ la rezervokvanto de kalio, rubidio, cezio kaj peza akvo estas granda. La ekspluato kaj utiligo de la salolagaj riĉfontoj havas gravan signifon por disvolviĝo de la ĉina ekonomio.

La Ĉinghaj-a Salolago-Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj sin okupas speciale pri esplorado de la riĉfontoj de salolago. En pli ol 20 jaroj malgraŭ vento kaj pluvo la sciencistoj kaj teknikistoj de la instituto postlasis siajn piedsignojn ĉe 121 salolagoj de 13 provincoj

kaj aŭtonomaj regionoj. Ili faris scienc-esploron pri 300 temoj kaj gajnis 180 scienc-esplorajn fruktojn, inter kiuj 37 estas aplikataj en produktado, kio donas grandan ekonomian efikon. La Ĉinghaj-a Salolago-Instituto kune kun botanika, geologia kaj geologi-paleontologia institutoj faris esploron pri la evoluo de la salolago. Ili argumentis la ŝanĝigon de la antikva medio kaj la evoluon de la salolagoj de malsamaj vidpunktoj pri kemio, mineralogio, sedimento-

logio kaj jarologio kaj donis novajn informojn pri la ŝanĝigo de la antikva klimato. Iliaj disertaĵoj estis rigardataj kiel la eminentaj en la Internacia Konferenco pri Salolagoj okazigita en oktobro de 1984. Nun sciencistoj de Usono, Kanado, Aŭstralio kaj Svislando kune kun la Ĉinghaj-a Salolago-Instituto faras internacian akademian interŝanĝon kaj kune esploron por ekspluati kaj utiligi la salolagojn kaj koni la ŝanĝigon de la antikvaj klimato kaj medio.

*La 5-an de aŭgusto Ĉinio lanĉis artefaritan sateliton por scienca sondado kaj teknika eksperimentado en Gansu-provinco. Ĝi revenis surteren post ok-taga flugado sur la difinita orbito. La satelito kunportis la eksperimentajn aparatojn de tri klientoj de Federa Germanio.

*La konstruado de 27 gravaj ŝoseoj en Ĉinio jam estas komencita. En 1990 en Ĉinio 8 810 km. da ekspresaj aŭtovojoj, unuaklasaj kaj duaklasaj ŝoseoj estos transdonitaj al trafiko.

*Ĉina ekonomia ĵurnalo elektis dek plej bonajn entreprenojn kune investitajn de ĉinoj kaj eksterlandanoj. Inter ili troviĝas la Tjanŝan-a Lanteksaja Limigita Kompanio de Ŝinĝjang, la Pekina Ĵipa Limigita Kompanio kaj Shanghai Volkswagen.

*Granda moderna paperpasta fabriko estos konstruita per kuna investaĵo de Ĉinio kaj Sovetunio. Ĝia materialo venos de siberia arbaro.

*La Ĝiŭĝjang-a Pontego super Jangzi-rivero kun longeco de 1 682 m. jam estas transdonita al oficiala uzado. Ĝi estas la kvara pontego super Jangzi-rivero konstruita post la naskiĝo de la nova Ĉinio.


*En Ŝunji-gubernio de Pekino aperis luitaj agrikulturaj entreprenoj, kie laboras dungataj kamparanoj. La kamparanoj memstare kultivas teron laŭkontrakte gvidate de la ĝenerala administrado de entrepreno. Ili faras agrikulturan laboron per maŝinoj kaj ricevas salajron ĉiumonate.

*Parto de la Fervojo de Jingtang ĝis Ŝjamen, la unua elektrizita fer-

vojo en orienta Ĉinio, de Jong'an ĝis Ĝangping, kun longeco de 105 km. estas finkonstruita kaj transdonita al oficiala uzado.

*Ĉinaj teksaĵoj, vestoj kaj aliaj teksitaj objektoj ne okupis evidentan lokon antaŭ la 80-aj jaroj sur la internaciaj merkatoj. Nun ili kon-

Ekfunkcias la elektrizita fervojo en orienta Ĉinio.



En la halo por ĉinaj silkaĵoj en la Foiro por Eksporti Ĉinajn Komercaĵojn





Gratulo al Cicio Mar (dekstre) post ties ricevo de la ordeno

sistigas dekonon de la totala komercvaloro de la internaciaj teksaĵaj kaj vestaj merkatoj. Ĉinio okupas la kvaran lokon de la mondo en eksporto de teksaĵoj kaj la sesan lokon en eksporto de vestoj.

*Ĉinaj kuracistoj sukcese transplantis la medolon propran de la malsanulo, kio donas novan eblon por kuraci leŭkemion.

*En aŭgusto de 1988 estas establita poŝtoŝtanco sur Nanŝa-insularo de Ĉinio, kiu havas areon de 600 000 km².

*Ŝjumiŝan-grotaro, alia granda grotaro de Ĉinio, estas oficiale malfermita al la publiko. Ĝi situas en Gujŭan-gubernio de Ningŝja-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono. La grotaro enhavas pli ol 130 grotojn, kiuj estis faritaj inter 477—499 p.K.

*La plej antikvaj kaj plej grandaj bronzaŝaj astronomiaj instrumentoj nun ekzistantaj en la mondo Ĝjanĝi kaj Huntjangĝi estas riparitaj. Iliaj kopioj estas jam elfar-

itaj kaj ekspeditaj septembre al Imperia Muzeo de Belgio por eksponiĝi.

*En Ŝangĝŭang-vilaĝo de Ĝjiŝji-gubernio, Anhuj-provinco estas riparita antaŭ nelonge la iama loĝdomo de s-ro Hu Ŝi, fama ĉina filozofo kaj instruitulo en la nuna jarcento.

*Materialo liverita de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio montras, ke en la dek jaroj de 1978-1987 la kresko de la ĉina loĝantaro malpliigis je 104 milionoj.

*En aŭgusto de 1988 okazis kanua konkurso de malpeza kategorio en Italio. Ĉinaj sportistoj partoprenis la finalon de kvin disciplinoj kaj gajnis unu oran medalon kaj unu arĝentan medalon.

*En la lastaj jaroj multiĝis la fruaj geedziĝintoj kaj reduktiĝis la nombro de gefraŭloj pli-aĝaj kaj dumvivaj. Nun estas 1.16 milionoj da dumvivaj gefraŭloj en Ĉinio.

*Pro eldonado de erotikaj libroj

ok eldonejoj estas monpunitaj de la Gazetara kaj Libro-eldona Administracio de Ĉinio je 1.41 milionoj da jŭanoj.


*La ĵurnalo "Renmin Ribao" raportis, ke en Ĉinio la proporcio de senlaboruloj estas 2 procentoj en la lastaj jaroj.

*La sovaĝaj nordorient-ĉiniaj tigroj vivantaj sur la ĉina teritorio restas nur 30, malpli multe ol la grandaj pandoj.

*Somere, ĉi-jare kelkajn regionojn de Ĉinio trafis pluvkatastrofo, en kiu mortis 1 406 homoj, disfalas 290 000 ĉambroj kaj kaŭziĝis rekta perdo de 4.495 miliardoj da jŭanoj.

*Aligatorino, antikva besto arte reproduktita, elĵetis 25 ovojn, dank' al kio saviĝis tiu rara bestospeco de pereco.

*Fama ĉina verkisto, tradukisto kaj esperantisto prof. Je Ĝjungjan (Cicio Mar) ricevis la ordenon de Dannebrog donitan de Reĝino Margrethe II-a pro lia sukcesa laboro en tradukado de ĉiuj verkoj de Hans Christian Andersen.



Hongkongo



Parto de Hongkongo

Hongkongo estas teritorio de Ĉinio. En la jaroj 1840—1842 Britio faris la Opian Militon kontraŭ Ĉinio kaj devigis la registaron de Ĉing-dinastio subskribi la malegalan Nankinan Traktaton, unu el kies artikoloj estis koncesii Hongkongon al Britio. De tiam Hongkongo ĉiam estas regata de Britio. La 19-an de decembro 1986, la reprezentantoj de la ĉina kaj brita registaroj oficiale subskribis en Pekino la Komunan Deklaron pri Hongkongo, kiu difinis, ke de la 1-a de julio 1997 Ĉinio restarigos la suverenecon super Hongkongo.

Hongkongo kun totala areo de 1066 km² konsistas el Hongkong-insulo, Ĝiŭlong

kaj Ŝingje (inkluzive de la ĉirkaŭaj 235 insuletoj). Tie loĝas 5.3 milionoj da loĝantoj, inter kiuj ĉinoj konsistigas pli ol 95%, kaj krome, tie loĝas ankaŭ 20 000 angloj kaj ĉ. 150 000 alilandanoj.

Hongkongo kun ondantaj montetoj, vasta kaj profunda maro, estas unu el la bonaj naturdotitaj havenoj de la mondo.


La kvantoj de vestoj, ludiloj, horloĝoj kaj elektronikaj produktoj de Hongkongo okupas la unuajn lokojn respektive en la internaciaj merkatoj. Prosperaj estas ankaŭ ĝiaj trafiko, turismo kaj aliaj servoj. Nun Hongkongo estas unu el la centroj de internacia financo.




Ĉe golfo

Hongkongo en nokto


En magazeno





Preğado antaũ templo

La Ćemara Parko





La Blanka Monto ĉe Sunleviĝo (proksime de la franca urbo Tournus)

FOTO DE TOMIZZOLI LÖRENT °



Balta marbordo ĉe Rostock, DR Germanio

FOTO DE PETER HAUSER